INTERNET ARCHIVE WaybackMachine http://verkoj.fw.hu/06.htm Go 13 captures 9 Oct 2004 – 19 Apr 2018 AUG OCT DEC 29 2005 2007 2016 About this capture

Jenő Rejtő

<<< REEN AL LA CXEFA PAGXO

LA NEVIDEBLA LEGIO

tradukis: László Balázs

UNUA ĈAPITRO

1

Ĉu vi jam aŭdis pri la Nevidebla Legio? Ĉu ne? Tiam vi certe ankoraŭ neniam estis en tia afrika urbo, kie troviĝas garnizono. Aŭ se vi estis en tia urbo, eble vi evitis tiujn gemutajn lokojn, kiujn vizitas modestaj pakaĵportistoj, senlaboraj fort-artistoj kaj gemutaj senrangaj soldatoj, dezirantaj amuziĝi kaj interbatadi, por pasigi siajn liberajn horojn kaj mortbati siajn kverelemajn kompanojn.

Nur simplaj, krudaj tabloj kaj tiel samaj gastoj troviĝas en tiaj ejoj, sed se ni estas scivolemaj pri la legendo de la Nevidebla Legio, ni povas ekscii ĉi tie ion kaj alion. Ekzemple ni rigardu la drinkejon, kiun oni nomis pri Abdullah. Oni kantadas, babilas, poste subite oni komencas paroli pri la Nevidebla Legio. La gastejestro estas eksiĝinta kaporalo, nome Kvörens, naskiĝinta en Danio, kiu akiris ŝtatanecon dum sia kvin jara soldatservo kaj malarion, sed poste li edziĝis al sesdek du jara, vidva drinkejestrinon antaŭ la altaro, kaj li atingis senzorgan, altan aĝon, kiel la proprietulo de la drinkejo Abdullah. Kiam li havis bonan humoron kaj ankaŭ li mem eksidis inter la malnovajn gastojn, ĉar cetere li ne amikiĝis kun la vizitantoj de la amuzejo, ili parolis pri la Nevidebla Legio, instigite de kelkaj malnovaj kamaradoj aŭ respektindaj poŝoŝtelistoj. Briso, kiu ekssoldatiĝis kiel senrangulo kaj estis kampogardisto en Maroko, li kapbalancante blovis la cigaredfumon, dume Kvörens lakone parolis pri la afero, kaj li rigardis ien en la malproksimon, kvazaŭ li vidus la forviŝiĝintajn ombrojn, aperantajn en la polvo de la dezerto, la marŝantan fantom-legion…

- Nu… kion ajn diras la fanfaronuloj, la Nevidebla Legio ekzistas. Mi vidis ilin per miaj propraj okuloj…

- Ĉu estas vere – diris rekruto, sidiĝinta tien, kiu ekmarŝos al la dezerto post kelkaj tagoj -, ke ilia gvidanto estas generalo, sed mankas lia kapo?

- Mi ne observis tion – respondis kvörens -, sed tre verŝajnas, ke ĝi estas tiel. La kompanio marŝas de Oriento al Okcidento, proksimume jam kvincent jarojn, ĉiam paralele kun la Ekvatoro. Ili iras en marŝkolono per rapideco dudek kilometroj po horo, atinginte la malbenitan ebenaĵon Ghidi ĉe la okcidenta parto de Saharo, la marŝkolono returniĝas, kaj ili iras al la Egipta limo.

Ili silentis. Tiu temo estis sinistra ĉi-regione. Cetere nun komenciĝis la pluva sezono, kiam la vaporplena aero sursidas la vertebron kun nekutima premo, kaj oni sentas lancinan doloron en la ostoj. Nur venu jam la unua infera uragano, tiam ĉio estus bona denove. Sed tiu eksudita varmego, malklara, flava aero kun langvoriga suda vento, kio estas tia, kvazaŭ malfermita pordo de forno elspirus ĝin en nian vizaĝon, kaj la miringo akre doloras, la nuko torporas, la skapolo lancinas kaj kraketas dum ĉiu moviĝo, tio ne estas tolerebla. Tiam la pereiga kolero, kaŝiĝanta en la homoj, kiu instigas nin al tio: „se jam estas malbone, estu do pli malbone” – ni rememoras historiojn pri fantomoj. Ĉu ni havas pli timigan, hororan kaj porĉiam ne kompreneblan fantomhistorion, ol la sekreto de la Nevidebla Legio.

Per tio oni timigas la infanojn en Eŭropo:

- Enlitiĝu rapide, Boby! Ĉu vi aŭdas? La vento estas tia, kvazaŭ sonus tamburo. Venas la Nevidebla Legio! Ili forportos la malbonajn infanojn!

Kiam malaperas kruelaj serĝentoj, ĉiu soldato scias, ke ili devis dungiĝi al la Nevidebla Legio. Ĝi okazas tiel, ke nokte (sed nur la komencon de la seka sezono, kiam ofte ŭzigzagas fulmoj sur la ĉielo, sed neniam tondras) aperas senranga soldato ĉe la kruela suboficiro. Lia vizaĝo estas blanka kiel kreto, li portas uniformon nigran kiel karbo. Li ne havas okulojn, li rigardas nur tra la orbitoj, kvazaŭ li vidus tiel. Li transdonas per siaj longaj flavaj fingroj ordonon, skribitan sur pergameno, kiu tekstas jene:

X. Y… la serĝento de la kompanio n-ro…. suprenu tuj sian novan uniformon, okupu sian novan postenon en la Nevidebla Legio, kie la nomita suboficiro devas tuj ekmarŝi, transdoninte siajn armilon, objektojn kaj sian koron al la sendito. Datite post noktomezo, en la ĉefkomandejo de la mond-armeo.

Nevidebla subskribo

La serĝento jam scias bone, pri kio temas, li transdonsas sian glavon sen konstaŭstaro, ŝanĝas mantelon kaj nur akra doloro signas, ke li demetis ankaŭ sian koron kun la ĝisnuna kamizolo, ĉar ĝi estis alkreskinta al lia malnova uniformo. Li surprenas la nigran mantelon, la legiano staras flanken kun laŭregula, militista estimo, lasante vojon al la serĝento, kiu iras malsupren el la fortikaĵo. Jam nenio karbatas en li. La pordo malfermiĝas per si mem, kaj la fantomlegio rigidiginte staras en la nokta dezerto, formante marŝkolonon de par fils de quarte.

La gardisto supre sur la remparo de la forotikaĵo trankvile rigardas, kvazaŭ li vidus nenion. Nom du nom… la kanajlo ekdormis. Tamen ne, li je ekmoviĝas. Ĉu li ne vidas, ke tia marŝkolono staras en la dezerto, kies fiono perdiĝas ie en la malproksima lunlumo ĉe la rando de la horizonto?

Leŭtenanto staras inter du plotonoj. Li ja havas kapon, sed tiu fakto ankoraŭ estas multe pli malbona. Li estas malnova mortinto. Li jam apenaŭ havas iom da velkintan karnon sur sia vizaĝo, sur lia glata, kraniosimila kapo estas kelkaj, stupaj, virinece longaj haroj, kiel ĝi kreskis plu en la tombo! Liaj okuloj kvazaŭ estus butonoj: tiuj ne moviĝas, nek liaj palpebroj ektremetas. Nun li metas fajfilon en sian buŝon. Li ekblovas ĝin. Sono ne aŭdiĝas, sed la senmova bildo ekiras kun soldata precizeco, kun samtempa ekmoviĝo. La rigidaj ĉevaloj, la mortintaj veturigistoj, la senvivaj soldat-figuroj.

Ili marŝas mute, samtakte kaj certe poreterne…

2

Nur tiuj ne kredas la ekziston de la Nevidebla Legio, kiun neniam forlasas la eŭropan loĝkvartalon de la grandurboj. En tre multaj kazoj koincidis la rakontoj de tiaj homoj, kiuj ne konis unu la alian, kiuj loĝis en du malproksimaj partoj de Akfriko, ili tamen rakontis certajn indikojn tute same. Ekzemple estas senduba antaŭ neniu, ke la fantom-figuroj de la Nevidebla Legio havas nigrajn okulvitrojn kontraŭ la sunradioj.

Kial asertas tion ŝuisto Ponson en la haveno de Rabat kongrue kun ĝendarma suboficiro Richett, kiu servas en la oazo Murzak? Iliaj asertoj koincidas eĉ en tio, ke tiu fantomoj portas samtipajn poŝospegulojn en la supra poŝo de sia kamizolo, krome ĉiu fantomo havas sian propran razilon. Ĝi faris ilin eĉ pli fantomeskaj, ĉar se la kapon estas ne malhavebla akcesoraĵo ĉe ili, tamen kial estas tiel grava afero la sin razado? Ĉu ili povas hanti sen kapo, sed kun barbostopla vizaĝo ne? Kaj kio estas ties kaŭzo, ke transmonda armeo, ke la soldatoj anstataŭ tornistro poru en sia dekstra mano malgrandan lakitan tekon, samtiele nigrakoloran?

Sed ni aŭskultu Kvörens-on, kiu parolis ĉe la granda tablo, laŭ sia trankvila maniero, kaj multaj aŭskutas lin starante, en ilia mano tenante ludkartojn, forgesante eĉ pri la ludo, en la premaera, vinodora drinkejo, plena de fumo de pipo. Kelkfoje, kiam la dano faras mallongan paŭzon, ili tiel ekcitite atendas la daŭrigon, ke eĉ la voĉo de la muezino de la tre malproksima moskeo Mektub filtriĝas ĉi tien.

„Allah il Allah…”

- Ĝi okazis tiel – li komencas kun trenata voĉo -, ke sude de Bein Abbes, ni patrolis ĉe Tafilalet, tiutempe ankoraŭ sovaĝa, proksimume kun du plotonoj da soldatoj de la kompanio la dua de Saida. Nur malnovaj, miaspecaj soldatoj. Juna, infanvizaĝa leŭtenanto gvidis la patrolon. Li estis bubo, estis sentebla sur li la freŝe akirita, skribita strategio. Ni do militvagis ĝis la ŝtonminejo de hammada-o, ĉe la suda deklivo de Atlaso, kie malaperis Gum; proksimume cent tuaregoj sur kameloj, post kiam ili masakris la loĝantojn de la oazo. La serĝento estis knabo el Brest, li partoprenis du militirojn batalante en la dezerto. Li vagas en Saharo ok jarojn, kaj lidiras al tiu bubo: „Ĝi ne estos bone tiel, mon commandant… Ni sendu esploristojn antaŭen, kaj ni lasu plotonon kun du mitraloj ekster la intermonto, kiel postgvardion, ĉar oni facile atakos nin el dorsdirketo aŭ ĉirkaŭos nin.” La leŭtenanto draste skoldis lin. Ke tiom da soldatoj eĉ tiam ne estos en danĝero pro ĉifonaj, militvagantaj araboj, se ili ĉirkaŭus nin. La serĝento silentis. Mi menciis, ke li estis knabo el Brest, kaj tiuj ne parolas multe. Ni nek atingis la mezon de tiu malbenita ŝtonkaldronego, kiam subite du-tri mitraloj ekpafi nin rapide el la fronta direkto. Dek homoj tuj mortis. Reen! Sed oni komencis telegrafi kuglohajlon el alia mitralejo de sur iu korbelo de la rokmuro. Neeblis trapenetri ĝin, ĉar ni ĉiuj estus pereintaj. Oni ĉirkaŭis nin! Kion fari? Ni serĉis ŝirmejon, kiel ni povis. La leŭtenanto, la kompatinda jam kuŝis sur la tero, kun sia ĉiu scio, en la brako de la serĝento. Li mortis. „Nu, knaboj – diras la serĝento -, se vi volas, ni sturmatakos la malamikon, ĉar decas tiel, ke ni batalu iomete antaŭ nia morto…” Ĉar li estis tia knabo. El Brest. Ili ĉiuj estas bravaj batalantoj. Li eltiris sian glavon kaj ekkriis: á mois! Kiam ni viciĝis malantaŭ li, li jam tuj ekiris. Fronte! Kaj ni sekvis lin. Ĉio estis kapute. Ni kuregis en la kuglohajlo kaj multaj falis el ni montinte.

Subite eksonis trumpeto. Kun ia stranga, ankoraŭ neniam aŭdita, melodia, zumanta, kaj tamen kun akra sono. Ĝi blovsignalis, ke: „Ek toreadoro.” Ni staris ŝtoniĝintaj. Sed vane. Ni aŭdis klare, ke oni ludas tiun multe gurditan, kontan kanton sur ia stranga trumpeto, kaj legianoj aperas ambaŭflanke de la hammada-o, en nigra kamizolo, kun stiletaj fusiloj. Eĉ se ilia trumpeto ne estis vera, sed ilia pafaro des pli efika. Nun jam la situacio ŝanĝiĝis. La tuaregoj estis inter du fajroj. Antaŭen! Ni kuregis! Sed la indiĝenoj jam ne pafis nin, ili provis fuĝi de antaŭ la armeo, falinta el la ĉielo, timiĝinte de la morte-nigraj uniformoj. Mi vidis ankaŭ la trumpetiston, kaj mi ĵuras je mia plej granda, sabata enspezo, ke li havis trumpeton el pura arĝento, kaj li konstante blovsignalis sur tio: „Ek, toreadoro!” Kaj kiel ili batalis! Amiko mia! Mi ne estas knabo el Brest, sed iuj povis senti ofte, ke mi havas malmolajn pugnojn. Sed tiuj! Ili frapadis dekstren-maldekstren per la kolbo tiel, kvazaŭ ili rompus dornujon, barantan ilian vojon.

Kiuj ankoraŭ vivis el la tuaregoj, tiuj fuĝis tie kaj ĉi tie inter la rokoj. La batalo finiĝis. Multaj bonaj soldatoj kuŝis tie, sed ilia nombro apenaŭ estis konsiderinda, rilate la multegajn burnusojn. Ni atendis, ke ni povu brakumi la kamaradojn, ĉar kiel ajn stranga estis ilia aspekto, ili tamen estis legianoj.

Sed kio okazis nun? Kiam ni staris tie vunditaj, en ŝirita vestaĵo, kaj ili mortpafis, mortbatis la amalamikon, ili ne malsuprenvenis al ni desupre. Eĉ! La arĝent-trumpisto blovis vespersignalon. Ĝi estas verŝajne vespersignalo ĉe ili. Ni konas tiun melodion, ke „Ne estas pli bela ol la noktomeza danco… kliniĝas la virino, kiel la kano…”

Kaj la melodio forsonis, malproksimiĝis, ili malaperis. Hoho, ni diris. Ne tiel ĝi estas! Ni volas premi nur ilian manon. Ankaŭ ni suprengrimpis tra la fendego de la hammada-o. Elveninte de tie, ni ankorŭ aŭdis el la malproksimo tiun strangan vespersignalon, sed ili jam marŝis en bela ordo. Avane de la marŝkolono rajdis oficiro. Muloj kun mitraloj, ĉaro de la Ruĝa Kruco, unu kirasita aŭtomobilo kun et-kalibra kanono kaj ĉe la fino fiakro. Jes. Unuĉevala… Kiel mi diras. Paradvestita koĉero sidis sur la veturigista benko, portanta cilindran ĉapelon, vipo pendis apud ĝia lampo, kaj ĉevalaĉo trotis, kvazaŭ ni estus en Parizo, nek mi scias kiam. Tiel ĝi iris fine de la trupo, en Saharo kompanio da sodatoj kaj malantaŭe fiakro. En ĝi sidis la ĉefoficiro. Tio estis videbla demalpoksime sur lia ĉapo. Niaj piedoj kvazaŭ enradikiĝis! Kelkaj homoj el ni faris krucsignon. Tiaĵo ne eblas. Nun la ĉefoficiro turniĝas en la unuĉevala fiakro. Li estas genealo! Li descendas. La koĉero eklevas sian ĉapelon… kaj… mi ĵuras, ke ĝi estis tiel… li fiksas la flagon sur la taksametro, kiu montras, ke la fiakro estas libera! Kvazaŭ li estus veturiginta la generalon ĝis ĉi tie, kaj nun li atendus alian pasaĝeron inter la sablomontetoj! La generalo kriadas ion, sed ne estas aŭdeble, kion, la homoj turniĝis kaj direktis la armilojn al ni. Ni komprenis, se ni iros plu, estos pafaro. Ni haltis. La generalo iris plu, antaŭ li la fiakro, apud la fiakro la kirasita aŭto, antaŭ ĝi la kompanio, dissemite la muloj kun la mitraloj, kaj la ĉaroj. Ni nur staris, kaj ili iom post iom malaperis, sorbiĝis en la ruĝa polvo de la subiranta suno. Se la mortintaj legianoj kaj indiĝenoj ne estus kuŝintaj tie, nek ni estus kredintaj ĝin…

Ili staris mirante. Eĉ la lampon ili forgesis eklumigi.

- Kaj mi – ekparolis nun Brison -, tute aliloke, malproksime en sudo mi vidis ilin. Mi soldatservis ĉe la saharanoj… Donu al mi glason da ruĝa vino, Kvörens, sed ne nur nature, sed solvu ĝin per io!

Kvörens diris malantaŭen:

- Mi petas du decilitrojn da ruĝa vino, solvante ĝin per tri decilitroj da rumo.

- Tiutempe – komencis Brison rapidriteme, ĉar dume li forte enspiris la fumon de sia pipo kaj enpremadis la tabakon per la ungo de sia etfingro – oni dungis la plej bonajn soldatojn al la saharanoj. Saĝo, kuraĝo, fera organismo estis bezonata tie kaj kelkjara soldatservo. Oni pagis duoblan soldon, ĉar ni patrolis en Saharo dum monatoj. La duono de la trupo rajdis sur kameloj, la alia dunon marŝis piede kaj irinte tridek kilometrojn okazis ŝanĝo. Ni havis skarlatan mantelon kaj ponardon, krome seskuglan revolveron. Ni ne ricevis karabenon. Ni vagis en la okcidenta parto de Saharo, ĉar ĉiuspecaj kanajloj rabadis sur la karavanvojo, kondukanta al Timbuktu. Tiujn ni mortpafadis. Foje ni komencis persekuti la ĉefan grupon, ĉar la rabista gum-o konsistis el multaj malgrandaj bandoj, sed ties akso konsistis el tribo multcent-membra. Ni ne povis neniigi ĝin. La radikojn. Iun belan tagon spionas iun maljuna dezerta sanktulo, ke la ĉefa hordo, gvidate de la bandestro Hudologu kaŝatendas ĉe la ŝoto Gemla. Ni provizas nin per akvo por kvar tagoj, ĉar estas puto antaŭ la ŝoto Gemla. Tie ni denove povos provizi nin, por ke ĝi estus sufiĉa revenante. Nia leŭtenento estis ĝisosta, dezerta temerarulo. Ne pli ol dudek kvin jara, krome markizo, sed li marŝis konkure kun la plej forta kamelo. Sed nun li devigis nin al fortostreĉa marŝo. Post kvar tagoj ni jam vidas la nubon de la ŝvebanta salovaporo super la ŝoto en la malproksimo, kaj antaŭ ĝi la du blankajn kolonojn, la dezertan puton. Sed neniu estis tie, nek akvo. Oni ĵetis kvintalajn, cilindroformajn ferpecojn en la puton, tiel barinte la akvon. Taĉmento de sapeistoj eble povus purigi ĝin pene, sed la saharanoj, leĝere ekipitaj povas nur batadi. De kie oni portis tiom multe da fero ĉi tien, mi ne scias, sed ĝi estis bela plenumaĵo kaj infera ideo. La maljunulo, kiu ŝajnigis „spionon”, certe estis ilia komplico. Baldaŭ ni vizitis lin, por informiĝi ĉe li persone, sed li malaperis. Nu, mi diris al la leŭtenanto, nia malgranda trupo ne plu militvagos. Ni havis akvon eble por unu tago. La leŭtenanto avertis min, ke mi fermu mian buŝaĉon, ĉar li ŝnurpendigos min strikte. Mi do fermis ĝin. Kion fari? Tion, kion la oficiro decidis. Saĝe. Ĝi estis la sola eblo. Tre mizera, tute ne multpromesa: fortosteĉa marŝo, ricevante kvaronon da akvoporcio tra la granda ŝoto, atingi la oazon Bangavello dum tri tagoj. Ni ekiris. Post la dua tago ni jam havis kelkajn mortintojn, du homoj freneziĝis. Nu, estis terure. Mi ne rakontos tion denove. Ni vagaĉis en la sala marĉo, la maldika krustaĵo rompiĝadis sub nia pezo, se ni flankenpaŝis de sur la vojeto, la salo fendis la hufojn de la kameloj, ke ni devis mortpafi la bestojn unu post la alia. La suda vento blovis alvizaĝe, kaj ĝi pelis la bruantan, blankan salon. Kapute. Ni perdiĝis. Ni ne havis eĉ guton da akvo kaj antaŭ ni estas la malproksima ŝoto. La leŭtenanto komandis ripozon. „Knaboj – li diris -, en la lazareta ŝranko estas kelkaj boteloj da alkoholo, tiun ni dividos inter ni, kiel bonaj fratoj. Vi estis bravaj knaboj, kaj mi pensas, ke eble nek mi estis tre malbona superulo. Se ĝi tamen estis tiel, pardonu min, ĉar ni jam restos en tiu ĉi eterna garnizono.” Ni diris al la leŭtenanto, ke li estis bona knabo kaj ni tre amis lin, ĉar ĝi estas tiel. La simpla soldato preferas ne la mildan oficiron, sed la malmolan, justan superulon. Fingringo da rumo kaj tiaĵo estis donita al ni ĉiuj, kaj ni ekbivakis. Ripozi antaŭ la granda, eterna dormo ne estas malutile. Sed ni apenaŭ starigis la tendojn kaj ĉirkaŭbaris la tendaron per laŭregula, unumetra ŝtonmuro, ni aŭdas blovtumpeti la marŝon de la legio!

- Ĉu ne ian kanton? – demandis iu. – Kvörens ja diris, ke la Nevidebla Legio proksimiĝis ludante mondfamajn melodiojn per la arĝenta trumpeto.

- Ne. Ili venis blovtrumpetante laŭregulan marŝon.

- Ĉu nenia strangaĵo okazis? – demandis la rekruto, kiu atendis ian hororan. – Ĉu ili blovtrumpetis normalan marŝon?

- Tio do estis stranga. La marŝo estis laŭregula, sed oni ne trumpetis ĝin. Oni ludis tion sur akordiono! Kiu vidis tiaĵon? Oni ludis ĝin sur tir-harmoniko, kiel la kortegaj muzikistoj. Ni pensis, ke ni sonĝas, aŭ ni jam mortis. Subite malforta lumo ŝanceliĝis en la nokto sur la pado, kvazaŭ ĝi estus marĉlumo, sed ia bruo akompanas ĝin. Fiakro do proksimiĝas! Ties lampo lumas. La leŭtenanto ekpremas mian brakon, ke mi preskaŭ ekkrias, kaj li diras miregante: „Olda rabisto… ĉu ankaŭ vi… vidas tiel… ke tie estas fiakro?… Ĉu vi aŭdas akordionon…?” „Jes, mon commandant” – mi balbutaĉas. Kaj sur la veturigista benko jam estas videbla la livreo kun orumitaj butonoj, la cilindra ĉapo kun blazono. Fiakro! Malantaŭ ĝi estas marŝkolono, kaj en la veturilo sidas tute kalva, monokla fantomo! Nun mi vidas, ke iu paŝadas antaŭ la fiakro. Li ne devis tre rapidi, ke la ĉevalaĉo povu sekvi lin. Li estas ilia gvidatno. Kaj, amiko mia, la luno ĝuste nun leviĝas. Minimume kompanio da soldatoj marŝas sur la pado de la marĉo. Kun muloj, kirasita aŭto, en nigra uniformo, sed ili aspektas tute tiel, kiel la legianoj, kaj estas inter ili kaporalo, en kies kolo pendas akordiono. Avane estas homo, kvazaŭ li estus en sako, en vestaĵo, butonumita ĝiskole. Estis horore. La veturigisto ekvidas nin kaj haltas. El la fiakro…

- Descendis generalo – daŭrigis la rekruto ekscitie.

- Tute ne. Ĝi ja estis la frenezaĵo. Ĉefkapitano de la fajrobrigado descendas el la fiakro kun belega glavo de maroficiro, li donas kelkajn frankojn al la koĉero, kiu fiksas la flagon, ke la veturilo estas „libera”. La fajroestingisto estas kun monoklo, kaj li krias malantaŭen: „Rein ne va plus!” Tiam la kompanio haltas kvazaŭ je komando. Ĉu vi jam aŭdis tiun komandon?! Li venas al mia leŭtenanto ridetante, sed kvazaŭ ili estus renkontiĝantaj antaŭ la Operdomo. „Bonvenon – li diras – ĉu vi ne havas hazarde ilustritan magazinon ĉemane?” La leŭtenanto havas humoremon, li respondas: „Ni ne havas tiaĵon. Ni ja ĵus mortos pro soifo.” La freneza fajroestingisto, la pasaĝero de la reaperanta fiakro diras ridante: Ho, ĉu vere? Dezerta aventuro, interese… interese… Ĉu vi ne trinkus ion?” Vi povas imagi! Ni staris tie anhelantaj, kaj ni devis kolekti nian ĉiun forton, ke ni ne kurataku ilin, kiel la brutoj por trinki gluton da akvo. Li diras al ni, kvazaŭ li estus en kazino: „Kion vi deziras: ĉu bieron, vinon, viskion? Ĉu fridigite per glacio, aŭ sen tio? Jes, amikoj miaj. Se iu ne kredas la Nevideblan Legion, diru al li, ke mi trinkis el ilia biero, mi manĝis el iliaj konservaĵoj. La kompanio staris mute, senmove, nur la kirasita baterio funkciis, tie estis enkostruita ilia grandega fridujo. Ili deprenis barelojn, ni manĝis kaj trinkis. La fajroestingisto rigardas sur sian horloĝon kaj mansignas al la veturigisto. Tiu formetas la flagon, li ensidas kaj komandas kun eltirita glavo. „Faites vos jeux!” Tiam ili ekiras. La leŭtenanto manĝis kaj trinkis ĝis nun, sed nun li rapidas post la veturilon: „Kiuj vi estas?” – „Faras nenion – respondas la oficiro de la fajrobrigado -, tute ne gravas.” Kaj ili preteriras bruegante. Ni ne povis reteni ilin. Nek pro dankemo, kaj kelkaj saharanoj ne povas batali kun kompanio da fantomoj. Ili preteriris nin en tute nigra uniformo, ili tenis lakitan valizon en la manol, sur ilia ŝultro estis fusilo kun stileto, la tero bruegis sub ilia plando. Ni nur staris, dum la Nevidebla Legio malaperis en la malproksima, sala nebulo. Nur la vento blovis kelkfoje mallaŭtiĝantajn sonojn de akordiono al ni…

…Oni nur ridis pri tiaj historioj. Sed kelkaj homoj, kiuj aŭdis la samon en aliaj punktoj de Afriko, tiuj nur balancis sian kapon eĉ tiam, se ili ne estis superstiĉaj. Sed la plimulto, loĝantaj ie ĉe la rando de Saharo, en malgranda urbo aŭ en oazo, ili ofte aŭdis tiun obtuzan tamburadon kaj akran akordion-melodiojn, pri kio la superstiĉaj homoj asertas, ke la vento malfermas kaj fermas la rompitan pordon de kampgardista kabano ie en la vitejo, ĝi krakas kaj grincas, kiel la tambursono kaj la akordiono. Sed la pli inteligentuloj sicas bone, ke dum la malamikema, tempesta, tropika nokto la nigra kolumno de la Nevidebla Legio marŝas en la dezerto, akompanate de akordiono, kun la timiga fiakro, kun la muta soldataro, kaj neniu konjektas, ke de kie ili venas, kien kaj ĝis kie ili iras?…

DUA ĈAPIRRO

1

Sed la superemuloj ne pravas en tiu ĉi okazo, kiuj malestime mansvingas aŭdinte pri la Nevidebla Legio ĝuste tiel, kvazaŭ temus pri la sankta Nikolao aŭ pri la sorĉistinoj de la nokto de Walpurgis. Ili malbone agas, kiam ili mansvingas malestime, ĉar la Nevidabla Legio vere ekzistas. Ĝi estas la sola fantom-historio en nia epoko, pri kiu oni faris aktojn, raportojn, eĉ fotojn, en oficialaj lokoj, fare de emeritaj dungitoj.

La historio komenciĝis la vesperfeston de la militista komandejo en Maroko. Tiun vesperfeston efektive oni aranĝis honore al la ŝtatsekretario. Lia ekscelenco alvenis el Parizo por mallonga tempo, kaj la vesperfesto propre estis okazo por fari monstran pridemandadon, ke la ŝtatsekretario povu okupiĝi pri multspecaj homoj kaj aferoj, sen tio, ke li devintus longe restadi ĉi tie.

Estas grava evento en la kolonio la akceptovespero de ŝtatsekretario. Sinjoro, portantaj frakon aŭ uniformon, ridetante decidas flustrante pri emeritigoj, promociigoj, detronigo de malgrandaj sultanoj, kreante novajn suverenojn, trinkantaj po unu glason da konjako dum valso. Kvazaŭ ili parolus nur pri klaĉadoj enuante, ili diras tiel kun trankvila rideto:

- Nu jes… ja… ne estus malbone estigi trategian bazon. Neniokaze ni devas urĝi tion, sed certe oni akceptus ĝin favore… se vi ne cedus, sed vi estus agema, sinjoro generalo, kaj vi okupus Gongut-on. Sed ĝi ja ne estas ordono, rimarkas la ŝtatsekretario mallaŭte, neglekteme.

Tamen post unu monato „la ĉiam pli oftaj ekscesoj” devigas la generalon okupi ĝin.

Al kapitano Durien okazas tute male. Li cigaredas reveme apud la ŝtatsekretario, sub dekor-palmo en la angulo de la bufedo kaj diras:

- Mi ekzercos tie kun mia kompanio en la venonta monato ĉe la regno de reĝo Kinibalu… hm… Eble mi vizitus lin… kaj mi postlasus plotonon… kiel garnizonon.

- Ĉu aneksi? – demandas la ŝtatsekretario, kaj li ridetante kapbalancas al beleta virino.

- Jes… Tiu homo patroprenis jam multajn friponaĵojn, kaj li ludas parodion de la suverena reĝeco ĉe la malproksima, suda parto de Saharo. Nun jam li volas estigi ambasadon, dume multaj kanajloj prirabadas tiun regionon, gvidate de lia reĝa moŝto. Mi konas lian agadon, mia garnizono troviĝas proksime.

- Mi scias, mi scias – diras la ŝtatsekretario kaj rigardas sian horloĝon – sed nur tiel estus eble fari tion, se… certe, mallonge. Ĉu batali? Subjugi negran tribon? Vi scias, kiel ĝi okazas. Oni tro pufigus la aferon. Sed… sendi regimenton, baterion, rezervon tien… ĝi estas multekosta kaj… kaj… brua.

- Via ekscelenco, mi aranĝos tion kun kompanio! Tiu fripono blufas. Li havas nenion, li nur estas ruza.

La ŝtatsekretario rigardis la pinton de siaj ŝuoj.

- Ĉu vi pensas, ke Kinibalu ne ricevas armilojn, kaj li ne havas militaj ekspertizistojn?

- Kun via permeso, ekscelenco: li ne havas! Kinibalu estas la plej granda ĉarlatano en la mondo. Mi ellaboris precizan planon kaj antaŭpreparis ĉion. Konstruinte pontonojn super la rivero Ubangin kun roto da soldatoj, mi surprizatakos lin el la direkto de la ĝangalo. Mi okupos la landon sen glavofrapo. Eĉ unu fusilo ne troviĝas tie. Kinibalu estas trompisto. Iu klarigis al li, ke li povas profiti el tio, se li komedias aŭtonoman popolon kaj kredigas, ke li havas armilojn.

- Ni ankoraŭ revenos al tiu temo. Se ĝi estas tiel, kiel vi diras, se vere ne subtenas lin sekrete aliaj eŭropoaj ŝtatoj, tiam ni povus fari ĝin nerimarkite. – Li ĝemis. – Eĉ konjekton vi ne havas, kiel gravan servon signifus tio… Tiu eta lando kaŭzas grandan problemon. Ĝi estas grava tereno al sudoriento… kaj krome… hm… Ĝi do estus grava. Sed la armeo ne povas risti tion. Miksiĝi en militon kun negra tribo, tio estas kompromito… Oni klaĉadus pri subpremo… Se ne eblas ĝin simple anekti…

- Ni povas ĝin anekti simple, via ekscelenco.

Poste la ŝtatsekretario paroladis kun generalo:

- Ĝi estas vere bonega vesperfesto. Mi aŭdis tiel, ĉu estos problemo pri la aŭtonomio de la reĝo Kinibalu.

- Pli-malpli poste – respondis la generalo. – Sed ni devas esti singardaj. Tiu negro havas armilojn. Oni subtenas lin. Ni ne povas riski fiaskon…

- Mi tute sampopinias. Sed ekzistas tia supozo, ke li blufas, kaj li havas nenion.

- Tio estas la opinio de kapitano Durien. Sed mi pensas, ke tiu eminenta soldato estas tro temperamenta. Eble tial li vidas ĝin iomete alie… Ĉiuokaze mi petos informojn de la sekreta servo… ĝi bezonas kelkajn monatojn, kaj tiam ni vidos la aferon pli klare.

- Bone – diris la ŝtatsekretario. – Estu nenia risko. Nek ŝajno de perforto. La soldatoj servas nur defendi la tutan koloniaron, kaj ili okupas indiĝenajn, rabistaj tribojn, sed ili ne volas konkeri… Tamen estus tre grave, se tiu Kinibalu, antaŭ ol li ruze eldevigi garantion de iu alia grandpotenco… Se ĝi fariĝus membroŝtato de Ligo de Nacioj, tiam ili sukcesus trovi tiajn kontaktojn, kaj ĝi perdiĝus por ni… Ne estus bone… Aŭtonoma lando en la mezo de la franca kolonio.

- Sinceredire mi ne kredas, ke li estas trompisto. Laŭ miaj informoj li havas armilojn.

La ŝtatsekretario serioziĝis.

- Tio estas problemo. Ni devas esti singardaj. Kaj tiu kapitano depotas proksime al tiu loko. Mi opinias, ke li estas tro temperamenta.

- Jes. Durien estas ĝisosta soldato, sed iom sangvina.

Bela virino venis al ili. La edzino de la urbestro. Lia ekscelenco brakuminte la virinon kondukis ŝin al la bufedo.

Baldaŭ lia ekscelenco preteriris la generalon, metinte sian brakon sur lian ŝultron kaj diris ridetante:

- Ne estas bone, se brulanta meĉo staras apud pulvobarelo.

- Jes… jes… ankaŭ mi pensis pri tio…

La ŝtatsekretario iris plu. Baldaŭ la generalo kroĉis sian brakon al la kapitano:

- Mi havus gravan taskon por vi… Ĉu vi akceptus, se mi komisius vin per la likvido de la rabistoj en la montoj? Vi ricevus eksterordinaran rangaltigon pro tio.

Durien sulkigis sian frunton.

- Mia garnizono estas tre malproksime de Atlaso.

- Vi povas peti, ke oni transpostenigu vin al Bu Malem. Mi volonte faros ĉion por vi…

- Dankon, sinjoro generalo. Kinibalu-on mi…

- Tie vi povas fari nenion. Vi ne rajtas agi kontraŭ li eĉ en okazo de provokado.

- Se vi ne estas kontenta pri miaj servoj, sinjoro generalo, kompreneble vi povas transpostenigi min, sed mi…

- Tute ne temas pri tio! Mi trovis, konvenan taskon por vi, sed se vi volas resti…

Durien staris tie malbonhumore. Li ŝatintus paroli ankoraŭfoje kun la ŝtatsekretario, sed li jam ne havis okazon al tio dum la vespero. Alveninte hejmen, ordono atendis lin, en kiu estis skribite, ke li povas tuj komenci sian ses monatan feriadon, tempfiksitan je Kristnasko, ĉar oni nepre bezonas liajn servoj ĝuste ekde decembro. Tial nun, de la dekdua de junio li estas sendita ferii ses monatojn, kaj li devas anonciĝi ĉe sia regimento la dekan de decembro. Oni zorgis pri lia deŝanĝo en la garnizono, kaj lia anstataŭiganto jam ekvojis.

Durien kunpremis la ordonon nervoze. Ĝi estis la respondo de la ŝtatsekretario. Oni forigas lin el la danĝera loko dum la kritika tempo. Post kiam li ellaboris la planon kaj antaŭpreparis la invazon…

2

Post tiaj antaŭaĵon ne estas mirinde, se Sir Oliver Yolland, eterna grafo de Denham, la prezidanto de la inspekta komisiono de la Angla Banko, la posedanto de la Ordeno de la Ĝartero, kaj de pluraj plej gravaj distingoj, la prezidanto de la Prezidenta Konsilantaro de la burso en Londono, iu ĉefakciuloj de la Afrikaj, Aŭstraj, kaj Kanadaj Ŝtatfervojoj kaj fine la ĉefdirektoro de la Unuiĝinta Franca-Angla Krudmaterialon esploranta, Prilaboranta kaj Komerca Trusto, la unuan fojon en sia vivo li petis ion de la ŝtatsekretario, kion oni ne plenumis. Ĝenerale oni povas diri, ke Sir Oliver Yollan la unuan fojon en la vivo deziris tiaĵon, kio ne tuj plenumiĝis. Ke ĝi kiel konsternige efikis la grafon, tion ni povas imagi laŭ la supre menciitaj.

Sir Yolland estis la plej altranga gasto post la ŝtatsekretario dum tiu vesperfesto. Entute kvin aŭ ses homoj vivis en la mondo, kun kiuj li havis socian kontakton. Onidire li estas eminenta financa kaj organiza geniulo, sed eksterordinare neinformita pro sia retiriĝemo. Laŭdire li legas nek ĵurnalojn. Post multaj jaroj evidentiĝis, ke li ne havas eĉ konjekton pri la ekzisto de la sonfilmoj, ĉar eble li ne vizitis kinejon en sia vivo. Danco, taga politiko, krimaferoj, skadaloj, sport-rakordoj, inventaĵoj estis nekonataj por li. Nur kio havis kunligon kun liaj negocaj ideoj, pri tiuj li informigis sin. Li sciis parkere la verkojn de Shakespeare, sed kiam oni prezentis al li Galsworthy-on al li dum vesperfesto, evidentiĝis, ke li konsideris la verkiston la plej supera tribunala prezidento, kaj nek poste li sciis, kiu li estas efektive. Ĉu verkisto?… li do estas tiulo… kiu redaktas ĵurnalojn?… Ah! Librojn?… Jes… ĝi estas bonega… Li demandis de kolonelo Lindbergh, kial oni titolas lin malgraŭ lia junaĝo, ke li estas „la heroo de la aero”, ĉar usonaj pilotoj apenaŭ partoprenis la mondmiliton. Ah!… ho!… - li miris, kiam lia sekretario diris al li, ke tiu homo traflugis la oceanon… Ĉu?! Jen vidu… tio estas brava afero… Kaj kie? Ĉu inter Ameriko kaj Francio? Ĉu vere? Nekredeble! Kia artisto li estas! Ĉu li traflugis ĝin?

Lia kapo estis tute kalva kaj iom oblonga. Kelkaj grandaj lentugoj estis videblaj ĉirkaŭ liaj rufaj brovoj. Li porti dikan monoklon dekstraokule, ĉar cetere li apenaŭ vidis per tiu okulo. Lia nazo estis iom longa, kaj ĝi etendiĝis ĝis lia supra lipo, sed ne kurbe, sed rekte, memorigante pri ruĝa papriko, kio donis oblongan formon al lia vizaĝo. Li havis ostajn, larĝajn ŝultrojn kaj tre maldikajn, longajn femurojn, sur kiuj, kiam li krucigis tiujn, eĉ la plej strikta pantalono svingiĝis. Li parolis per laca, mallaŭta, raŭka voĉo, krome li faligis kaj remetis sian monoklon, kiam li havis ian problemon. Tio malofte okazis, ĉar la mano de Sir Yolland ne nur reale, sed ankaŭ figure estis tre longa. Ĝi atingis ĉien de reĝaj apartamentoj ĝis malproksim-orientaj ĉefkomandejoj. La fervojo, la kanalo, la maro, la banko, la aero, la ĉielo, la akvo; la cemento kaj la gumo; do ĉio aparteni iomete al Sir Yollan en tiu ĉi mondo. Sed la oleo interesis lin unuavice. Dio scias, kial? Lia pasio estis la ole-esplorado. Ekzistas homo, kiu ĉasa, kvankam li ne bezonas la viandon aŭ la felon de la besto. Li sentis tiel, rilate la oleon. Li jam ne bezonis monon, potencon, famon. Li havis sufiĉe el tiuj. Sed trovi novan olefonton, fondi societon, emisii novajn akciojn, tio estis lia pasio, ĝi interesis lin pli ol ĉio ajn.

La gubernatoro, la ŝtatsekretario kaj generalo Pellier kunvenis kun Sir Yollan en malgranda salono, kiu ne ŝatis la diplomatiajn, flankumajn galimatiojn, li do transiris al la temo.

- Mi petus iom da volonteco de vi.

- Sir – respondis la ŝtatsekretario -, viaj entreprenoj faris tian oferon por Francio, kiam la kurzo de la franko falis, ke ni komplezeme rekompencos nun tion, laŭ nia eblo.

- Jes… jes… Oni faras ion kaj alion… mi do petus volontecon, kio efektive ne estas volonteco. Laŭ miaj informoj en la suda parto de Sudano, ĉe la ĝangalo, kie finiĝas la dezerto, sur la tereno de Urungi… troviĝas petrolo.

La ŝtatsekretario miris:

- Preskaŭ nekredeble!

- Tio sonas sufiĉe malverŝajne, sed ĝi estas vera. Neniu estus pensinta, ke oni trovas oleon en tiu parto de Afriko. Mi sendis homojn tien, kaj mi akiris opcion pri tiuj terenoj. Nun do, mi petas, via ekscelenco scias bone, ke la ĝis la limdato de la malvalidiĝo de la opcio mi devas pruvi, ke mi trovis oleon, cetere mi perdos la avantaĝojn de la esplor-rajto, kaj se iu poste trovos tie oleon, mi havos nenion komunan al tio.

- Ĝi estas tiel. Malsukcesa esploro ne certigos eternajn rajtojn. Se iu alia poste trovos oleon ie, tiu ne povos preni parton el tio, kiu vane esploris en la sama loko, iakaŭze.

- Mi scias… mi scias, kio koncernas la petrolon, tion, kun via permeso, mi scias tion. Sed nun mi petas… Mia opcio senvalidiĝos post kelkaj semajnoj. Mi torvis oleon. Mi faris sukcesan provboradon. Kaj tiam indiĝena rabisto, tiu tribestro Urungi, venas kun siaj batalantoj mortigi la grandan parton de miaj homoj, kaj li mesaĝas, ke li petas kvindek mil frankojn por la tero.

- Mi petas vin, Sir, Urungi estas rabistestro, kaj li ne rajtas fari tion – diris al generlo. – Kvankam ekzistas dendependaj triboj kaj terenoj. Ĵus ni temis ĝuste pri tiaĵo. Sed en la suda parto de Senegalio vivas nur arbaraj, negraj triboj.

- En kio ni povas esti je via servo? – demandis la ŝtatsekretario iom malcerte.

- Pruntedonu al mi malgrandan armeon. Irintze tien, mi pendumos tiun friponon kaj validigos miajn rajtojn, certigitajn en la opcio. Fine ja ĝi estas kontrakto inter mi kaj la franca ŝtato, kaj oni murdis blankulojn tie, krome ili ĉantaĝis min. Mi do pensas tiel, ke ne estos problemo sendi punekspedicion…

- Kara Sir Yolland – komencis la ŝtatsekretario ĝemante. – Ĵus ni temis pri okupo de grava, malgranda tereno. Pri la tero de Kinibalu, kiu estus tre valora por Francio, sed ni ne povas fari tion. Des malpli ni faros ĝin tie, kie ne landa intereso postulas uzi perforton.

- Kial ne? Ĉar jen estas la kolonia armeo! Ĝi estas por instrui tiujn friponojn pri moroj…

- Sed estas nekredeble multekosta, danĝera kaj malfacila – interrompis la ŝtatsekretario – sendi militan ekspecidion al la ekvatoro. Estas bezonata provizo, kunligo, ekipaĵoj, leĝera baterio. La franca armeo povas iri tien nur kun fortosupereco, ni ne rajtas batali, nur puni, kaj terure granda aparato estas bezonata al tio en tiel granda distanco.

- Krome – diris la ŝtatsekretario – vi scias bone, Sir, kiel granda kalumnia kampanjo komenciĝos, se ni sendos punekspedicion pro petrolo kaj krudmaterialo. Bedaŭrinde multaj friponaĵoj okazas en tiu regiono, ĉar ni ne havas garnizonon tie, kaj ni bezonos jarojn por konstrui la kolonian armeo ĝis tie. Ĝis tiam ĉiu mem batalos por sia vero. Aŭ li subaĉetos la rabistojn, aŭ ankaŭ li mem organizos rabist-bandon… Diplomacio kaj perforto, pacienco, saĝo, batalo decidos la aferon. Nur la kolonia defendoforto estas la certa, kiu disvastiĝas rektavoje, laŭ la finaco de la ŝtato.

- Sed mi ne konsenta kun tio! Ĉu vi ne povas pruntedoni al mi spahiojn? Aŭ… Tiajn legiajn soldatojn, kiuj akompanus min tien.

- Bedaŭrine, ne. Estus plej saĝe, Sir, sendi iun tien por intertrakti kun la ĉefo. Eble li kontentiĝos per malpli multe da mono.

- Ĉu vi… konsilas tion? Ke mi intertraktu kun ĉantaĝaj murdistoj? Ĉu vi proponas tion, kiel la plej supera oficisto de la ŝtato… - Li faligis la monoklon el sia okulkavo kaj nervoze purigis ĝin.

- Mi proponas tion, kiel privata homo. Bedaŭrinde, kiel ŝtatsekretario mi ne povas doni al vi legianojn, vi devas trovi individuan solvon, Sir.

Grafo de Denham leviĝis kun amara rideto.

- Ĉu mi organizu rabist-bandon, kaj mi efektivigu miajn leĝajn rajtojn kun ili?

- La ideo ne estas malbona – respondis la ŝtatsekretario enpensiĝinte. Sed la lentugoj ekbrulis sur la frunto de lia lorda moŝto pro la ruĝo de la indigniĝo.

- La ideo ne estas malbona! Sed ni angloj certigas la leĝon pere de la armeo kaj la efektivigon de la kontraktoj ligitajn kun la imperio! Ne kun rabistoj! Kien mi iris ĝis nun por jurisdikcia riparo, tie stiletoj estis malantaŭ mi, kaj ne rabistoj, via ekscelenco! Mi ŝatus sciigi tion al vi! Grafo liver Yollan intertraktas en la nomo de la vero kaj la ŝtato, protektate de la leĝa potenco. Ĝi estas en Anglio tiel.

La ŝtatskretario leviĝis kun malvarmkonduta mieno.

- Mi timas, Sir, ke vi opinias min neinformita. Cetere vi ne donus al mi instrukcion. Eble en Anglio oni povas sendi soldatojn kun stileton por efektivigi financajn kaj industriajn transakciojn. Kvankam eble vi eraras pri tio, Sir. Sed tio tute certas, ke francaj soldatoj kun stileto eĉ tiam ne ekiras, kiam temas pri la plej grandega petroltrovejo! Sed vi, Sir, tiurilate vi havas nenian problemon. Dungu soldatojn kun stiletoj, kaj iru tien batali, kie jam tiel multaj homoj luktis proprariske por sia havaĵo, kiam la indiĝenoj volis tion, ke ili retretu.

- Kiel komprenas via ekscelenco tion? – demandis Yollan same malvarmkondute.

- Neniu povas malpermesi al viaj homoj, Sir, ke ili defendu sin kontraŭ banditoj. Kiu estas malkuraĝa aŭ malforta, tiu ne petu ŝtatan helpon, se li elektu alian profesion. La esplorado de oleo signifas ankaŭ batalon. Sed ne regulaj armeoj interbatalas, sed kurĝaj, rezolutaj homoj.

- Ĉu vi… vi do… - balbutaĉis la lordo indignite – konsideras min… malkuraĝa homo?

- Mi defendis nin kontraŭ la ŝajno, kiu kulpigas nin francojn. Mi ankoraŭ ne aŭdis pri tio, ke la angloj estus glatigintaj la vojon de Royal Dutch per stiletoj en Borneo. Vi okupiĝis multe pli pri kruda oleo ol mi. Vi devas scii, Sir, ke la armeo helpas privatajn entreprenojn nur en okazo de necesbezono. La stileto, Sir, fariĝas sensacio, kiam soldatoj en uniformo estas malantaŭ ĝi, sed en privata mano ĝi signifas defendon, kiam kuraĝaj homoj uzas ĝin.

- Mi dankas la admonon – respondis la lordo kun ruĝa vizaĝo, kiel tiu de meleagro. – Mi rimarkis tion bone. Sed eble vi forgesis, ke Oliver Yollan ne estas gvidanto de ekspedicio. Grafo Oliver Yollan povas iri nur kun armeo por puni.

- Sed ne kun franca aremo, Sir, ĉar ĝi batalas nur por la respubliko.

- Mi do akiros armeon por mi. Sed malantaŭ mi povas stari nur uniformo, la simbolo de la leĝo, juro kaj potenco! Bonvolu rimarki tion bone!

La nazloboj de la ŝtatsekretario ektremetis kaj diris mallaŭte, malvarmkondute: - Ni kompleze konsideras la plendon de ĉiu ofenditoj ene de la efikradiuso de la defendoforto. Sed civilulo povas vojaĝi nur proprariske trans Saharon.

- Sed mi ne estas tia, kiel la aliaj civitanoj! Ĉu eble mi povus pretendi alian traktadon?

- Vi pravas, Sir, vi ne estas tia, kiel la aliaj civitanoj, sed multe pli nervoza. Tial vi estis multe pli takte traktata fare de franca ŝtatoficisto, kian vi meritis! – antaŭ ol Yolland, ruĝa kiel meleagro, povintus respondi, li lasis lin tie kun malvarmkonduta kapbalanco. Enpoŝiginte siajn manojn, la lordo skuadis sian ŝlosilfaskon en iu mano, kaj kelkajn pencojn en la alia:

- Nu bone! Mi akiros armeon! Mi pruvos al sinjoro ŝtatsekretario, ke mi diferencas ne nur nerve… nu bone… ĝis revido, sinjoroj… ni ankoraŭ aŭdos unu pri la alia!

Kapbalancinte li kuregis al sia aŭto. Li saltis en la veturilon, kiu staris antaŭ la pordego, li ekfunkciigis ties motoron, sed ŝoforo venis tien, ke la taksio apartenas al li. Tiam li sidis en sian propran aŭton kaj veturegis al la hotelo Mammunia.

TRIA ĈAPITRO

1

La grafo luis la tutan duan etaĝon de la hotelo Mamunia. Li rezervigis nur tutan etaĝon en hoteloj. Dum la mondekspozicio en Chicago, kie aliulo povis lui nek ĉambron, oni povis rezervi por Sir Yolland nur tian apartamenton sur etaĝo, kie jam loĝis du pasaĝeroj: maharaĝo kaj usona senatano. La grafo tuj forlasis la hotelon, ĉar nenie estis en urbo libera loko pro tranokti, li aĉetis por nekeredeble alta monsumo vapor-marŝipon de ŝipkompanio, li elkargigis ĝin, nome konservaĵojn de bovoviando, li disdonis tiujn inter la malriĉuloj de la urbo kaj enloĝiĝis en la ŝipon kun sia akompanantaro.

Alveninte en sian ĉambron, li jam estis trankvila. De jaroj nenio ekscitis lin tiel, kiel tiu ĉi interparolado. Nu bone… Li montros al ili… Oni nur pensu, ke ili povos vanigi liajn kalkulojn.

- Portu al mi ian alkoholaĵon Andreo – li diris al la lakeo -, kun multe da sodakvo kaj… ĝi estu konjako aŭ viskio. Kiu serĉis min? Cetere ne gravas tio.

Post la unu glaso li jam vidis la aferon en alia koloro. Fine ja la ŝtatsekretario iomete pravis… hm… ke Royal Dutch mem aranĝis sian aferon en Borneo. Ili eĉ atentis, ke la ŝtato ne miksiĝu en tion. Kaj kion tia Royal Dutch scias… Estas ridinde. Ĉu oni ne donos armeon? Nu bone. Li akiros ĝin. Ne rabistojn kaj ne mizerajn, ĝangalajn boks-ĉapionojn, sed normalan armeon. Jes… Oni povas atingi ĉion per mono. Nur fiaski ne. Li aĉetos ordinaran, kompletan, malgrandan armeon. Soldatoj kun stileto, disciplino, soldo, kiuj ricevos la ordonojn de li. – Mi petas ankoraŭ glason da trinkaĵo, Andreo! Dankon.

Post la tri glaso li jam estis dankema al la ŝtatsekretario. Li montris la ĝustan vojon al li. Cetere li ŝajnus malkuraĝa, kiu kaŝiĝas malantaŭ la jupo de la respubliko. Kelkaj stiletoj estas bezonataj. Li akiros tiujn. Kia stultaĵo! Longe li liveris stiletojn al Suda ĉinio, kaj Meksikio eĉ hodiaŭ ŝuldas per milionoj al iu fabriko de militmaterialoj por municio. Kaj nun li kondutas tiel, kvazaŭ misiisto, kies maldekstran piedon manĝis la njam-njam-oj, kaj nun li iras lamante de iu loko al la alia. Jes, li bezonas armeon, uniformojn kaj tiajn imperialistajn aĵojn… kio konvenas al la angloj… sed por mono oni povas aĉeti ĉion.

- Sendu al mi sinjoron Wilkie, Andreo, kaj la sekretario anonciĝu ĉe mi, kiam li alvenos.

Sinjoro Wilkie estis malalta, dika, ridetema, helblonda, kaj li portis okulvitrojn, similajn al tiu de strigo. En tiu priskribo estas lia karaktero, lia paseo, nuntempo, eĉ lia futuro. Ĉar ni povas vidi el ĉio ĉi, ke nenioam povas okazi al sinjoro Wilkie malbono, dum troviĝas mole pormetita lito en tiu ĉi mondo. Rilate lian profesion sinjoro Wilkie ne estis dungita. Per laboro oni ne povas akiri tiun minimumon de la burĝa bonstatro, kio estis nepre bezonata al tiu ĉi homo por la ekzistado. Nenia lukso, sed multe da komforto. Bonaj manĝaĵoj, eleganta vestaĵo, bonega ĉambro, fajnaj cigaredoj. Eĉ nun li ridetante paŝas tra la pordo, kvazaŭ lin akceptus la plej agrabla spektaklo. Sed Sir Yolland nun gratis sian kruron, ĉar insida moskito pikis ĝin.

- Bonan vesperon, Sir.

- Bonvolu sidiĝi, sinjoro Wilkie. – Post kiam la gasto komforte dorsapogiĝis en iu brakseĝo kaj serĉadis cigaro, li ankoraŭ aldonis kun dusenca afableco: - Nur tiel, kvazaŭ vi estus ĉe mi. Nur nenia ĝenateco… Nu, diru, ĉu vi estas lerta homo… ĉu ne?

- Jes, mi pensas tion.

- Ĉu estas io, kion vi ne povas akiri?

Wilkie pensadis.

- Ne – li respondis poste simple.

- Ĉu vi povus ekzemple akiri armeon?

La dikulo mansvingis ridetante.

- Infanludo. Ĉu vi deziras ĝin motorizite, kun tank-divizio aŭ sen tio.

- Vi estas vere lerta homo. De kie vi havas tiel riĉan sortimenton el militforto?

- Ne estas sortimento, sed kian vi deziras, mi akiros tian. Homo, uniformo, armilo kaj soldo, ĉio ĉi estas akirebla.

- Jes, jes… Nu faru do al mi kostoplanon, kiom kostos tia armea homgrupo aŭ tiaĵo…

Dume Wilkie ferbre pensadis. Pri kio temas? Kial bezonas Yolland armeon, kaj kion fari, se la grafo freniziĝis? Li elcerbumis planonjk, laŭ kio li koluzios kun Andreo, sekretinte la demencon de ilia mastro. Ĉar se la grafo estos sendita en frenezulejon, tiam ili povos iri almozpeti…

- Nu? – demandis Sir Yolland – pri kio vi pensadas?

- Pri tio, kiom ĝi kostos… Antaŭ ol transiri al miaj antaŭaj elspezoj, mi referos…

- Ĉu… jes?… bonvolu.

- Livingstone estas ĉi tie.

- Ĉu Livingstone? Kiu li estas?

Wilkie ĉiam forgesis la tiklan punkton de la grafo. Ĉar la grafo asertis pri Livinstone, ke li ne konas lin. Kvankam li devis koni lin malgraŭ lia ĉiu neinformiteco. Ĉar Livingstone estis en la servo de la plej granda usona ole-entrepreno. Li estis nek milionulo, nek bankiero. Livingstone estis preskaŭ aventuristo. Li vagis en la mondo kaj malkovris patrol-terenojn. Eventuale li antaŭpreparis malpli grandajn ribelojn tie kaj ĉi tie. Kiu estis Livingstone, kiun SirYollan malgraŭ la diritaj tute ne konis? Antaŭ dudek-tridek jaroj ili kune pasigis kelkajn jarojn inter la konservativaj muroj de la universitato en Oxford, kaj tiutempe ili estis la plej bonaj amikoj. Ilia malsama naturo estis la kaŭzo de ili amikeco. Livingstone estis malalta, larĝŝultra, sed ŝercema homo kun decidkarakterea vizaĝo. Malorda, neglektema, petolanta kun ĉiu, do, tia studento, kiu fajfas pri la praa nobelularo. Li restis tia eĉ poste. Li kartludis ĝis aŭroro kaj fumis cent cigaredojn ĉiutage, tial post iom da tempo li havis speciale raŭkan, vingustan voĉon. Livingstone estis la sola homo, kun kiu la ĉiam maniereca, enfermiĝema, eksterodinare afektema kaj vanta Yollan interamikiĝis sincere kaj profunde. Ĉar Livingstone malgarŭ lia ĉiu neglektemo, facilanimeco estis genia kaj eminenta karaktero. Ili havis dek jaran aĝdiferencon. Sir Yolland estis dekses jara, kiam ili konatiĝis. Livingstone havis dudek kvin jarojn, kiam dungiĝis al la ole-esplorado. Li serĉis oleon kun malgranda ekspedicio apud la Amazonaso en la ĝangalo. Baldaŭ li vojaĝis al Arabio kaj Sumatro, poste li travagis Aŭstralion. Post nelonge ankaŭ grafo Oliver komencis esplori oleon pasie. Se li batalis por la petrolo en la kabinetoj de prezidentoj, en la konferenciejoj de bankieroj, en privataj apartamentoj de monarkoj.

Grafo Yolland, kiel ajn strange ĝi estas: fariĝis amanta. Li volis edziĝi al la tre delikatanima, saĝa, eleganta filino de lordo Dilling. Sed kiio okazis, tion nun jam neniu povas diri precize. Ĝi certas, kiam Livingstone revenis el Nov-Zelando, Yolland prezentis lin al la familio Dilling. Li diris al sia amiko, ke li estas amanta al la knabino, kaj li edzinigos ŝin. Li ankoraŭ ne diris tion al la knabino, tiel lia decido estis unuflanka, sed Oliver Yollan (eterna sinjoro de Denham!) tute ne kalkulis tian eblon, ke filino de kiu ajn povas rifuzi lin, se li petas la manon de iu. Azenaĵo! Dume li vojaĝis urĝe en Novjorkon, pro likvido de bankrotita, mondfama entrepreno, kaj tiu afero daŭris tutajn tri monatojn.

Kiam li revenis, Johannes Livingstone fianĉiĝis al la filino de lordo Dilling, kaj estis fiksita ankaŭ la dato de la geedziĝa festo. Tiam okazis la miraklo. La eleganta, aristokrata knabino enamiĝis al la trampa, brua, bohema Lovingstone, kiu krome estis dek jarojn pli aĝa, ol Sir Yolland. La esploristo devenis el unuaranga praa familio, kaj lia stranga, gaja karaktero konkeris eĉ lordon Dilling. Sir Yollad restis ankoraŭ unu semajnoj en Londono. Poste li vojaĝis al Denham. Sed kiel li opiniis pri la afero, neniu sciis tion. En Danhem li ricevis la invitilon al la geedziĝa festo. Sed li ne iris tien.

Unu tagon antaŭ la geedziĝo li denove estis en sia londona loĝejo. Tie Livingstone anoncis sin ĉe li.

La grafo mesaĝis al li pere de la lakeo, ke li neniam plu deziras la viziton de sia amiko. Livingstone flankenŝovis el sia vojo la tiam ankoraŭ junan Andreon, kaj li simple enkurios en la ĉambron de Yolland:

- Ĉu vi estas idioto?! Ĉu vi koleras tial, ke mi amas fraŭlinon Dilling? Ŝi ja ne estis via fianĉino! Kaj mi scias de ŝi, ke ŝi ne volis edziniĝi al vi!

Yolland levis sian rigardo de sur la libro kaj ĝustigis sian monoklon.

- Mi ne konas vin, sinjoro… Kaj mi tute ne volas, ke… de nun babilaĉu kun mi… Al tio, mi opinias, ke mi havas rajton sen ĉiu klarigo.

- Aŭskultu min, vi, kakatuo… Mi protestas kontraŭ tio, ke vi konsideru la aferon tiel, kvazaŭ mi estus la kaŭzinto de la vanigo de nian amikeco. Ĉu vi komprenas? Vi decidis unuflanke edziĝi al fraŭlino Dilling. Tio ne signifas geedziĝpromeson.

Yollan trarigardis lin:

- Bonvolu foriri – li diris tedite. – Mi ne konas vin. Kion vi volas ĉi tie.

- Diskrevu! – kriis Livingstone laŭ sia kutima maniero, kolere kaj forkuris.

Nuptodonace Yolland aĉetis la terenojn, sur kiuj kondukis la vojo al la plej nova ole-trovejo de Livingstone, tiel malhelpinte la trafikon al la petrolo. Sekvan fojon, la malgrand grupo, kiu konsistis el la homoj de Yolland kaj serĉis oleon en Persio, ili falis en araban kaptitecon, kaj Livingston akiris la oleon antaŭ ilia nazo. De tiam daŭras la batalo kun alterna sukceso inter Livingstone kaj Sir Yolland. Yolland en la burso, en la financa mondo ĉion malbonigas kaj senvalorigas, kiam komencas fari la entrepreno de Livingstone, sed la alia batalas en la ĝangalo kaj en la dezerto, malebligante la vojon de la esploristoj kaj inĝenieroj de Yolland. Iu volas la pereon de la alia. Poste Livingstone havis eĉ pli koleran batal-taktikon, ĉar lia juna edzino mortis, dum la nasko de la unua infano. La esploristo dediĉis sian tutan tempon kontraŭ Yolland. Kiam oni menciis la nomon de Yolland, Livingstone mansvingis kaj diris: „Tiu pajaco.” Yolland, kiam li aŭdis la nomon de sia amiko, ĝustigis sian monoklon kaj post mallonga pensado demandis: „Kiu li estas?…”

Eĉ nun li diris al sinjoro Wilkie.

- La koncernulo estas la homo de alia entrepreno – klarigis la malgranda, dikulo, kvazaŭ li devus informi lin -, kaj nun viaj spionoj raportis al mi, ke li estas en Maroko. Mi ne kredas, ke li planas nenion kontraŭ ni.

- Eblas… Ne koleru, sed tio ne interesas min. Mi parolas miajn planojn ĉi tie kun vi kaj kun miaj homoj. Li ne povas trudiĝi ĉi tien, li do eĉ konjekton ne havas pri tio, kion mi planas. Wilkie! Mi bezonas fremdulan legion!

- Hm… unu jam estas en Afriko, kaj ĝi funkcias bone.

- Mi bezonas propran armeon, apartenanta nur al mi. Ĉar mi ne iros trakti kun rabistoj. Mi efektivigos la leĝon helpede armeo. Mi, Oliver Yolland, eterna grafo de Denham, iros en Sudanon kaj konkeros la terenon de Urungi, mia kontrakto kun la franca respubliko rajtigas min fari tion. Ĉar mi efektivigos la francajn leĝojn, tiu uniformo do estus franca. Tiu fremdula trupo…

- Legio.

- Egale, egale… Ĝi plaĉas al mi. Mi bezonas tian armeon. Mi reatendas vin post unu horo. Raportu, ĉu vi sukcesis akiri ĝin. Ĝis revido.

Sinjoro Wilkie revenis post unu horo kaj raportis, ke la armeo estas organizita.

2

Efektive nek la grafo, nek Wilkie povis diri, kian rilaton ili havas inter si. Ofte ili ne renkontiĝis dum semajnoj. Wilkie sekvis la grafon ĉien, kiu ne invitis lin, kiu sciis nek tion, kiam li venis en lian ĉirkaŭaĵon. Foje en Chikago, dum forio, li aĉetis marŝipon por la grafo, por ke Yolland povu kie tranokti. Li nur hazarde estis tie, kiam Sir Yolland menciis, ke jam ankaŭ ŝipo estus bone nur loĝi aparte kun sia akompanantaro. Post duonhoro venis sinjoro, kiu diris, ke li nomiĝas Wilkie, kaj li scias pri marŝipo, kiu estas nigre aĉetebla. De tiam li aperis fojfoje, kiam la lordo bezonis ion. Li aranĝas la aferojn ĉe la dogano, kaj kelkfoje li diras al Sir Yolland subite, ke li enskribigis lin al la aŭstrala Granda Premio, li skribas registritan leteron en ĉiu dua-tria monato al Sir Yollan, aldoninte longan fakturon pri liaj elspezoj. Tiuj ne estas tro pipraj, sed ĝi signifas sufiĉe altan monsumon, kaj la grafo pagas. Li neniam petas monon por si mem, li kalkulas nur tiujn elspezojn, kiujn li havis servinte la grafon. Estis enigmo, el kio li vivas. Kaj kiel bone. Ĉar la grafo havis lakeon, skretarion, kaj li ne konsideris Wilkie-on kiel sian amikon, ili do havis nenian rilaton inter si. Kelkfoje ili paroladis pri io, kaj tial sinjoro Wilkie havis elspezojn. Tio estis la situacio.

Ankaŭ nun li devis tuj elspezi monon en la afero de la armeo. En tiaj demandoj nur tiu povas esti sperta, kiu mem portas uniformon. Tial li ekkontaktis kun la liftisto.

- Diru, infano mia – kaj li transdonis moneron al la knabo -, kiuj oficiroj loĝas en la hotelo? Unuavice temas pri emeritaj aŭ feriantaj soldatoj.

- Ambaŭ loĝas ĉi tie. Sinjoro kapitano Durien komencos sian feriadon morgaŭ, li jam petis min aranĝi lian vojaĝbileton al Nico. Krome marŝalo Podvinecz loĝas ĉi tie.

- Unue ni komencu per la kapitano. Kie li troveblas?

- Li vojaĝis al Oran, li revenos nur morgaŭ.

- Ĉu lia ekselenco sinjoro marŝalo? Ĉu li estas pensiulo?

- Ne.

- Ĉu li estas akvtiva?

- Nek tio.

- El kio li vivas?

- Li estas alkoholisto – li respondis post mallonga hezito.

- Li estas mia homo! Akompanu min al li!

La knabo estis embarasita pro io.

- Bonvolu atendi min ĉi tie… Unue mi rigardos, ĉu la marŝalo estas en la kofro… - kaj li forkuris.

Kiel? Kion signifas tio, ĉu la marŝalo estas en la kofro? Ĉu eble temas nur pri ia bronzfiguro aŭ pri ceramikaĵo? Neverŝajne, ĉar la galanterioj ne drinkas, kaj la marŝalo estas alkoholisto. La liftisto revenis.

- Lia ekscelenco atendas vin, sinjoro.

- Diru, amiko mia – demandis sinjoro Winkie -, kion vi parolis ĵus pri la kofro?

- Ĉu mi? – miris la knabo. – Ĉu pri kofro? Pri kiu kofro vi bonvolas pensi?

- Mi aŭdis tiel, vi diris, ke… la marŝalo estas en la kofro.

- Sed sinjoro Wilkie! Kiel vi imagas tion? Kion serĉus marŝalo en la kofro?

- Kion li pakis.

- Mi diris tion: mi rigardos la marŝalon, ĉu li estas tie supre?

Aha! Tiel ĝi jam estas komprenebla. Tie supre kaj kofro estas du simile sonantaj vortoj. Tamen ne estas verŝajne, ke marŝalo loĝu en kofro meze de metropolo.

Li sekvis la liftiston.

La marŝalo atendis lin en la salono de belega duĉambra apartamento. Li portis blankan vestaĵon kun multaj oraj pasamentoj, kun nekalkuleblaj ordenoj, kaj rozkolora rubando tiriĝis sur lia kamizolo de lia dekstra ŝultro ĝis la prenilo de lia glavo. Sub lia koro pendis grandega stelo kun aglokapo. Ĝi estas la Granda Stelo de la Ordeno de la Unuarangaj Orientaj Ĉefkavaliroj en Birmo, kun la Aglo. Sur la tablo kuŝis ĉako kun ornambukedo, verd-roversa uniformo kun ora pasamento kaj sur la pantalontubo videbliĝis orumita, verda strio. Lia neĝe blanka hararo, griza imperiestra barbo kaj liaj siamplaj dratkadritaj okulvitroj memorigis tiun pri konservativa reganto, kiu vidis marŝalon Podvinecz la unuan fojon. Li proponis eksidi per gesto de monarko.

- Bonvolu preni. La cigaroj, cigaredoj, konjako estas sur tiu tablo.

- Dankon, mi petas nenion.

La marŝalo ekfumis kaj komforte dorsapogiĝis en la brakseĝo.

- Per kio mi povas servi, sinjoro?

- Mi bezonus armeon.

La marŝalo ne surpriziĝis. Li rigardis la fumon de la cigaro.

- Ĝi estas multekosta afero. Precipe, se ĝi estas motorizita.

- Tute ne temas pri tio. Mono, enkonduke mi diras tion, ne gravas. Via ekscelenco, kiel emerita, franca oficiro…

- Atendu, amiko mia. Mi ne estas franca oficiro. Mi estis la marŝalo de la armeo en Honduras, mi fariĝis diktatoro post la malvenko de la ribelo, baldaŭ dum malonga tempo mi estis prezidento. Poste mi devis fuĝi.

- Kiom longe estis prezidento via ekscelenco?

- Malpli ol duonhoron. De tiam vi vivas en ekzilo.

- Mi nomiĝas Wilkie, kaj Sir Yollan, grafo de Denham, estas mia malnova amiko. Li priparolas kun mi siajn gravajn aferojn. Nun temas pri tio, ke Sir Yolland volas konkeri tiun provincon, kie tribestro, nomata Urungi kontraŭrajte provas ĉantaĝi lin. Ĉar kolonia armeo ne estas tie, Sir Yollan volas organizi malgrandan, elitan armeon.

- Kiam vi bezonas la armeon?

- Post unu horo.

- En ordo.

- Kompreneble estus bezonate ankaŭ fidinda gvidanto por la trupo.

- Eble mi havos tempon, kaj mi estos je la dispono de Sir Yolland.

- Mi aŭdis, ke ferionta kapitano loĝas en la hitelo, nome kapitano Durien. Se via ekscelenco povus persvadi lin, ke li helpu nin…

- Ankaŭ tio eblas – pensadis la marŝalo. – Sed tio jam kostos tre multe. Fine ja oficiro ĉi tie ricevas duonjaran ferion nur en ĉiu deka jaro. Neniu oferas tion malmultekoste.

- Mi opinias, ke ĝi ne signifas financan problemon. Ĉu vi havas bonan kontakton kun la kapitano?

- La kapitano estas mia plej bona amiko. Mi edukis lin. Nenio pruvas tion pli bone, ke ni loĝas kune. Jen estas nia komuna apartamento. Bonvolu rigardi ĝin. Tie pendas sur la muro milita memorordeno, kiun li ricevis de la usonanoj ĉe Verdum.

Sinjoro Wilkie, kvazaŭ li estus scivolema, paŝis tien neglekteme. Efektive la dokumento tre interesis lin. Li volis kontroli la diktatoron. Sed vere: ĝi estis usona memordokumento kun la nomo de kornedo Durien pri dono de ordeno. Hm… Ŝajnas, ke la marŝalo tamen havas bonan kontakton kun la altranga oficiro.

- Mi petas vin – diris sinjoro Wilkie -, tiam ni konsentu en tio, ke unuavice via ekscelenco, sed ankaŭ mi zorgos pri la varbado de homoj. Poste, se la kapitano entreprenos gvidi la taĉmenton, tiam ni pritraktos pri la detaloj. Ĉar kiom ajn mi fidas la kapablojn de via ekscelenco, mi povas kontentigi Sir Yolland-on nur tiel, se ni sukcesos gajni afrikan kapitanon por nia afero. Se kapitano Durien entreprenos, ke li gvidos nin, vi estos, sinjoro marŝalo, la ĉefa direktanto de la militaj operacioj, kaj mi zorgos pri la provizo.

La marŝalo komprenis el tio, ke lia dungo dependas de la aprobo de Durien. Li ekstaris, kiel grandsinjoro kutimas fari tion, kiam ili finas aŭdiencon.

- Mi garantisas pri la kapitano – li diris elegante. – Mi tuj telefonos al Orano por paroli kun li, eble li tuj revenos, se mi vokas lin. Vi povas raporti al Sir Yolland, ke la armeo, gvidota de la kapitano jam estas je lia dispono.

Okazis tiel, ke sinjoro Wilkie vere raportis al Sir Yolland, ke la armeo estas organizita.

KVARA ĈAPITRO

1

Sekvan tagon la kapitano prezentis sin al sinjoro Wilkie kaj diris, ke li dediĉos sian ses monatan feriadon al la gvidado de la Divizio Yolland. Li kalkulis sufiĉe pipran prezon por fari tion, kaj li petis aparte sinjoron Winklie sekretigi la aferon, ĉar estas malpermesite al li, kiel aktiva oficiro ricevi salajron de privatuloj laŭ tiu rajto. La marŝalo ne havis tian pretendon, sed kiel unuanombra konsilanto kaj la „animo de la tuta afero”, petis kvin mil frankojn ĉiumonate, manĝaĵon, provizadon kaj dumvivan renton, se kiu ajn lia kapablo damaĝus survoje pro neatenditaj komplikaĵoj. Ili antaŭplanis por la homoj provizadon kaj kvin frankojn da soldo, por la suboficiroj dek du frankojn, kaj por la oficiroj kvindek frankojn potage. La kapitano preskribos, kiuj ekipaĵoj estas bezonataj, kaj sinjoro Wilkie aĉetos tiujn.

- Ĉar mi ne fidas la komercistojn – rimarkis la kapitano -, mi ŝatus fari la aĉetojn.

- Ne estas malbone, se tiuj homoj sentas, ke oni kontrolas ilin – diris la marŝalo – tial estus bezonata ankaŭ mia ĉeesto dum la aĉetoj.

- Mi opinias, ke vi trankvile konfidu tion al mi – diris sinjoro Wilkie -, mi aranĝos la aferon bone kun la komercistoj.

- Mi neniel volas sarĝi vin per la respondeco – senkulpigis sian la kapitano -, mi mem kontrolos ĉiun pecon.

- Bonne – diris la marŝalo -, kaj mi, kiel la organizanto de la divizio, volas partopreni ĉiun riskon. Mi aranĝos la mendon de la ekipaĵo persone.

- Ĝi estas honesta tiel – diris la kapitano.

- Ni ne lasos damaĝi vin – aldonis la marŝalo. Sinjoro Wilkie post mallonga hezito, ŝajne emocita pro tiom da bonvolo, ekmeditis. Poste li kapbalancis malgaje :

- Bone. Ni dividu la profiton inter ni je tri partoj, kion ni gajnos dum la aĉetado.

Unuavice ili aĉetis en Zirzin, malproksime de Maroko sude, malnovan, neuzitan hangaron, kaj ili liveris la ekipaĵon tien.

Ili ĉiuj tri varbis la personaron, kaj sinjoro Wilkie aĉetis en Tanger de kontrabandista societo la arsenalon, restintan el la hispana civitana batalo.Tutan ekipaĵon de kompanio kun mitraloj, reflektoroj, fusiloj, municio kaj kun ĉiuj ceteraĵoj.

La mono faris miraklon. Telefono, telegrafo, aviadilo zorgis pri la rapida aranĝo de la aferoj. Koruptado, lertaj helpemaj manoj, ĉio estis je ilia dispono. Post du semajnoj la priparolado Sir Yolland ricevis telegramon:

„Via militistaro atendas vin. Ili ekiros je via ordono. Escepte min. Wilkie.”

- Andreo! Paku! Ni ekiros! – diris la grafo.

- Kien?

- Konkeri.

2

Sir Yollan estis ekvojaĝonta. Li ankoraŭ devis partopreni ĝardenan feston. La angla ataŝeo organizis tion je la honoro de lagrafo. Terura devo. Sed li ne povas eviti ĝin. La sekretario antaŭtagmeze estis en la urbo. Li sukcesis plilongigi la esplor-opcion per kvar monatoj. Poste la sekretario metis ĉion en grandegan, ruĝan koverton, la desegnojn de la inĝeniero Gary, ellaboritajn laŭ la skizoj kaj ankaŭ la skizojn mem, la atestilon pri la petrol-samploj, aŭtentikigitaj fare de atestantoj, la dokumentojn de la publika notacio, la fotokopiojn.

- En tiu ĉi aktujo estas, Sir, ĉio kune, kio atastas vian prioritaton – diris Pidgin, la sekretario, antaŭ ol grafo Yolland ekveturis el la hotelo. – Krome la preciza mapo. Tiu loko troviĝas inter dezertoj kaj ĝangal-partoj, kie ni trovis oleon. Sinjoro Gary, la sola homo, kiu konas tiun lokon, malsaniĝis, kaj li ne estas en tia sanstato, ke li povus akompani vin, Sir. Tiu aktujo signifas la posedon de la petrolo, kaj sen la geografiaj planoj, garditaj en la aktujo perdiĝos ankaŭ la petrolo, ĉar sinceredire, ni havas malmulte da espero, ke sinjoro Gary resaniĝos.

- Mi estas klarvida pri tio, kaj dumvoje mi atentos la aktujon aparte. Nu… ĉu vi pensas, ke ni faris ĉion por tiu mezuristo Gary, kio… estis nia devo? Ĉu ne troviĝas ia eminenta profesoro aŭ ĉef-scienculo, kiu eble… povus fari ian miraklon por malrapidigi la morton aŭ nek mi scias kion…

- La organismo de la inĝeniero estas tre malfortiĝinta, kiu nun luktas kontraŭ la malario, Sir. Mi pensas, ke ĝi estas iu el la tipaj kazoj, kiam la naturo prenis la decidon el la mano de la homo.

- Sufiĉe malbone. Nu, en ordo, mi rajtigas vin al ĉio, kio eble signifas bonon aŭ faciligon… por sinjoro Gary. Vi povas venigi per aviadilo profesorojn aŭ tiulojn, se ili utilos. Ĉu vi raportos nenion alian?

- Livingstone…

- Mi jam aŭdis maltaŭgi tiel nomatan, nekonatulon ĉi tie. Ne maltrankviliĝu, sinjoro Pidgin. Mi estas antaŭzorgema. Li ne povas ŝtelumi sur la etaĝon nerimarkite por subaŭskulti, kaj li eĉ konjekton ne havas pri tio, kion mi planas.

…Kiam li foriris, malfermiĝis la pordo de la ŝranko, kaj Livingstone elpaŝis el ĝi. Li aspektis iom laca, ĉar li pasigis kelkajn horojn en tiu ŝranko.

3

Ankaŭ la ŝtatsekretario partoprenis la ĝardenan feston. Certaj homoj ŝatintus, se la streĉiteco mildiĝus inter li kaj Sir Yollan. Tio sukcesis sufiĉe facile, ĉar ekvidinte la ŝtatsekretarion, la grafo rapidis rekte al li kaj etendis sian manon.

- Mi petas vin – li diris sincere -, lastfoje… Mi ne pravis… Eĉ okazis multe pli malbona afero, vi pravis. Mi pensas, ke… vi akceptos mian konfeson kiel satisfakcion… ĉar mi tre bedaŭras…

- Mi tre ĝojas, Sir, ke vi ne dubas pri nia bonvolo, kiun ni havas al niaj bonaj amikoj, kiel vi. Kredu min, mi ĝojus sincere, se grandega industria entrepreno ekagus en tiu regiono. Ĝi estus grava ankaŭ por ni.

Baldaŭ larĝ-naza, dens-brova homo paŝis al li. Li memorigis pri foira sugastia fenomeno, kaj lia frako preskaŭ falis de sur lia alalata, dika korpo, ĝi estis tiel vasta kaj foruzita.

- Sir Yollan, ĉu vi permesas paroli kelkajn vorojn kun vi?

- Mi ne scias – konsideradis la grafo -, nur tiam, se vi diros, al kiu mi havas la honoron.

- Mi estas polic-prefekto Hugedin. Mi havas tre gravan direndon al vi.

- Ah! Ĉu vere? Mi do aŭskutas vin!

Ili eksidis sub malproksima palmo sur iu ĝardena garnituro.

- Sir! – komencis la prefekto kuntirinte siajn brovojn. – de tagoj la plej grandaj friponoj de Afriko ĉirkaŭas vin.

- Interese… mi ne vidis ilin.

- Tamen ĝi estas tiel. Miaj du homoj sekvas vin oficiale, de kiam vi alvenis ĉi tien. Specialaj gardistoj de la politika polico atentas pri eminentaj gajtoj. Miaj informoj estas sufiĉe precizaj. Vi serĉas ian petrol-fonton. Tiun petrol-fonton ŝatus akiri alia ole-komecisto.

- Ĉu vi komprenas tiel, ke… ankaŭ la koncernulo… estas ole-komecisto… kiel mi?

- Jes.

- Hm… Dankon, bonvolu daŭrigi.

- Tio certas, ke li estas en rilatoj kun la bando de Biskra. Tiu timita bandito estas nesuperebla ede ĉiuspecaj intelektaj trompoj ĝis rabistaj militvagadoj. Ankaŭ la indiĝenoj protektas lin…

- Ĉu ne ĝenos vin, kara… sinjoro… se mi ne atentas vin. Ĉar via historio pri krimafero ne interesas min.

- Bone, bone, Sir. Aŭskultu nur tion, kio koncernas vin. Biskra faros ĉion por kruci vian vojon. Nia spiono raportis, ke Biskra ordonis: ili devas akiri la ruĝan aktujon de vi ĉiumaniere. Mi certigas vin, Sir, se ne armeo gardos vian aktujon, tiam Biskra akiros ĝin.

- Ĉu vere? Ĉu li estas tiel lerta? Ne gravas. – De kie scius tiu policisto, ke armeo gardos lian aktujon. – Nu bone… estas afabla via zorgemo. Sed nenia kaŭzo por timi, sinjoro ĉefpolicisto, ĉar mi havas… sufiĉe da cirkonspekto kaj tiaĵo… sed estas agrabla por mi tiu tenero, kiel Afriko ĉirkaŭas min.

- Ankoraŭ nur tion, Sir, ke laŭeble suspetku ĉiun. Sokoloff, la ĉefkomandanto de Biskra, estas la plej eminenta trompisto de nia epoko. Li ŝajnas inteligenta ĝentilulo, sed li ludas samtiel ankaŭ ŝejkon. Ĝi certas, ke Sokoloff kaj Biskra havas senlimajn rimedojn. Iu oferas multe da mono kontraŭ vi, Sir, kaj oni ĉiumaniere klopodos trudiĝi en vian proksimon. Bonvolu gardu vin kontraŭ ĉiu nova konateco, kontraŭ la plej belal virino aŭ kontraŭ la plej promineta homo…

- Mi legis romanon sur la franca militkampo en jaro mil naŭcent dek sep. Tio ofte okazas en tranĉeo. En ĝi estis skribite tiaĵoj. Pri belaj spioninoj kaj pri inteligentaj kasorabistoj. Sed mi ne kredas, ke tiaĵo ofte okazus en la realo. Se tamen, tiel fidu mian akravidon. Mi ŝatus, se mia afero ne tro deturnus vian atenton de via agado. Mi alkutimiĝis mem aranĝi miajn aferojn… sufiĉe bone… Tamen mi dankas vian afablecon. Ĝis revido. Mi ĝojis…

Kaj li iris plu. Tiuj policistoj vidas viktimon aŭ friponon en ĉiu. Kiel povus trudiĝi trompisto en lian proksimon? Kio li estas? Ĉu etkomecisto, kiu estigas kafejajn kontaktojn kaj vizitas societojn? Kiu povas konatiĝi kun li?

- Bonan vesperon, Sir. Ne prenu kiel ofendon, ke mi prezentiĝas nur tiel: Mi estas Anna Morgenstern…

La plej bela virino de la mondo staris antaŭ li…

4

Sir Sir olland konsterniĝis. Tiaĵo okazis al li, kio estis senekzempla en lia ĝisnuna vivo. Ĝi estis tiel nekredebla afero, ke li nur staris, kun elstaraj okuloj kaj preskaŭ faligis eĉ sian monoklon sur la teron.

Nekonata virino alparolas viron en societo! Kaj ŝi preztentiĝas! Neniu prezentis ŝin al li, ili neniam vidis unu la alian, kaj irinte al Sir Yollan dum la vesperfesto de la ataŝeo, ŝi simple prezentas sin, kvazaŭ ili estus en kafejo!

- Mi esperas, ke vi ne prenas kiel ofendon…

La grafo viŝis sian monoklon kaj diris mallonge.

- Mi ĝojas.

- Mi scias, ke mia maniero estas nekutima en anglaj, sinjoraj societoj, sed mi jam aŭdis tiom multe pri vi, Sir, kaj mi ne scias, kiam mi havos okazon revidi vin. Tial mi kaptis la okazon.

- Jes… Ĝi estas laŭdinda. Kaj ĉiuokaze…

La virino estis tre bela, eble iom tro alta, tamen tre bel-statura, kun ridetanta, ronda vizaĝo de lernantino, kun grandaj, sinceraj, bluaj okuloj kaj kun admirinde densa, blonda hararo.

- Bonvolu akompani min al la bufedo, ĉar mi ne volas stari ĉi tie, en la mezo de la ĝardeno – diris la virino sufiĉe aplombe.

La grafo ekiris, kaj Anna Morgenstern brake kroĉiĝis al li. Simple kaj trankvile, kvazaŭ ĝi estus la plej natura afero.

- Ĉu vi estas tre indignita, Sir?

- Nu… Dio mia… kiel ni komprenas tion… - li murmuretis.

La knabino malgaje kapbalancis, kvazaŭ ŝi estus klarvida pri tio, ke oni nur trankviligas ŝin, sed efektive ŝi falis en tragikan situacion, kaj profunde ĝemante ŝi manĝis tri sandviĉojn.

- Mi ĝojas, ke plenumiĝis via sensignifa deziro, fraŭlino, konatiĝi kun mi, kaj se vi ne prenas kiel ofendon… - diris grafo Yolland.

- Ĉu vi volas lasi min ĉi tie? – balbutetis la virino mallaŭte, kaj kvazaŭ instinkte ŝi iomete alpremis al si la brakon de la grafo kubute. – Ho, ne faru tion! Fine mi pensus tion, ke mi vere kondutis maldece. Kredu min, vi tiel retiriĝas de la homoj, ke mi devis fari tion…

Tio certas, ke ŝi estas eksterordinare bela kaj kara virino. Hm… se ŝi kondutas tute strange.

- Kial ĝi estas, Sir, ke nek la gazetaro, nek la publikeco interesas vin? Vi ja estas tiel interesa individuo, oni volonte legus pri viaj geniaj transakcioj, kaj tio imponas… - ŝi diris ravite kaj rigardis sur la grafon, kiel naiva admiranto al la fama poeto.

- Nu… - Sir Yolland ĝustigis sian monoklon. – Ne estas bona la publikeco. Malagrabla afero. Ĝi konvenas al filmaktoroj kaj al panaceo. La nomo de angla ĝentlemano ne estas por tio, ke oni legu ĝin. Kaj cetere… Jen estas tiu hirudo… Dio mia, se mi povus akiri liajn akciojn…

La hirudo, kies akciojn Oliver Yollan sopiris tiom, estis Forster, la ĉefredaktoro de la ĵurnalo Sunday Morning Post, kiu provis fari ĉion por eldevigi de grabo Yolland ian publikindan materialon. Sed vane. La grafo estis nekonvinkebla.

- Bonvolu kredi, ke mi ne estas pajaco, kiel Caruso aŭ Emil Zola, pri kiuj oni skribadas – li protestis energie.

Kaj vane proponis ministroj, aristokratoj la altestimatan ĉefredaktoron: Oliver Yolland ne donis eĉ linion da gazeta interjuvo.

Dum la vesperfesto li evitis kvarfoje Forster-on, kiu estis ankaŭ ministro iam, sed nun li multe pli gravis en la angla publika vivo, kiel la ĉefredaktoro de la ĵurnalo Sunday Morning Post. Forster dungis aron da reporteroj por publikigi fine aŭtentikan historion pri Sir Yolland.

- Tial ne prenu kiel ofendon, se mi rompis la normojn, kiuj estas kutimaj en la societa vivo – senkulpigis sin fraŭlino Morgenstern. – Oni flustradas pri vi tiel multe da interesaj klaĉoj, vi estas tiel eksterordinara, enigma persono… ke malfeliĉa, angla sinjorino rajte estas scivola pri vi.

- Fraŭlino Morgenstern… se mi bone komprenis… ĉu vi estas malfeliĉa?

La knabino mallevis sian kapon, kaj ektremetis ŝiaj okulharoj.

- Jes, Sir… Mi vidis vin hodiaŭ vespere… Mi aŭdis tiom multe pri via potenco. Neniu estis, kiu estus prezentinta min… Mi konas neniun…

- Tiam… kiel vi venis en la balon? Oni malofte invitas nekonatojn.

- Mi estas… la fratineto de la sekretario de la angla ambasedejo de Maroko, kaj mia frato, ankaŭ kiu estas invitita, li ne venis hodiaŭ vespere. Li estas malsana. Mi konas neniun ĉi tie, kiu povintus prezentis min al vi, kaj mi tamen volis paroli kun vi, Sir.

„Ĉiumaniere ĝi faras pli komprenebla la procedon, kvankam ĝi estas samtiel nepardonebla” – pensis Oliver Yollan.

- Kion vi deziras de mi… fraŭlino Morgenstern?

- Ĝi ne estas neniaĵo, Sir. Nur via potenco povas helpi min. Eble vi jam aŭdis pri mia patro: pri d-ro Morgnestern…

- Bonvolu atendi… Ĉu li estas tiu advokato, kiu bankrotis pro la bond-spekulacio en Usono, kaj li akuzas min.

La knabino kunmetis siajn manojn, tiel ŝi rigardis sur lin.

- Sir Yollan, redonu al mi mian patron! Li estos enkercerigita, se vi ne helpos lin!

- Ĉu tiom miksiĝis en la aferon tiu homo? Hm… Mi helpos al li, kara fraŭlino, nur disigu viajn manojn, ĉar ĉiu rigardas ĉi tien… Mi promesas, ke mi aranĝos la aferon.

- Dankon! – diris la knabino entuziasme – se ni ne estus ĉi tie, mi kisus vian manon.

- Estas bone, ke ni estas ĉi tie – respondis la grafo timiĝinte. – Bonvolu kredi, ke mi zorgos, ke via patro ricevu moratorion, kaj ni transprenos la garantion, ĝi ja ne estas grava afero…

- Permesu al mi, Sir, ke mi aranĝu tion. Vi nur transdonu al mi la dokumenton… en kio vi efektivigos ĉion ĉi.

- Nu bone… Ankaŭ tion volonte. Nur bonvolu ne tiom entuziasmiĝi – li balbutaĉi ekster si.

- Tiam mi nun foriros. Mi ne volas resti sola ĉi tie. Ĝi ne decas. Nur la situacio devigis min al tio. Dankon, Sir. Kaj morgaŭ mi atendos vin, posttagmeze je la sesa horo en la kafejo Royal. Ĝis revido.

Kaj ŝi forrapidis. Ŝi ne demandis la grafon, ĉu li volas renkontiĝi kun ŝi, ŝi ne donis eblon sendi ŝin al la sekretario kun sia afero. Eldirinte la lokon kaj tempon de la rendevuejo, ŝi forrapidis, alfrontigante Oliver Yolland-on al preta situacio.

La nokto estis iom sufoke varma. La lumo ekscintilis sur la ŝvitosimila, brila, malseka, verda parto de la palmofolioj. Tre elegantaj homoj enuis ĉi tie en malgrandaj grupoj, konversaciantaj indiferente. Mallaŭta bruo kaj delikata, facila, eleganta, sed senlima enuo. Unutona salon-muziko.

- Nu, Sir Yolland, ĉu vi aranĝis la aferon de la petrolo? – demandis la ataŝeo, alpaŝinte la grafon. Li intervenis por pacigi lin kun la ŝtatsekretario.

- Jes… mi pensas… mi solvos la aferon iel. Mi ankoraŭ ne scias. Diru, kara… Ĉu la sekretaro de la ambasadejo estas malsana?

- Kiu?

- La sekretario de la ambasadejo en Maroko.

La ataŝeo eklevis sian ŝultron kaj kuntiris siajn brovojn.

- En Maroko ne troviĝas angla ambasadejo. Nur konsulejo. Kaj tie ne estas sekretario

Sir Yolland konsterniĝis. Jes vere. La angla ambasadejo ja troviĝas en Parizo! Hej…

- Certe ĝi estas ia eraro – murmuretis la grafo. – Mi pensis pri Morgenstern, kiu do estas oficiala funkciulo ĉi tie…

- Angla ŝtatoficisto ne laboras en Maroko, kiu nomiĝas Morgenstern.

- Tiam kiel vi invitis fraŭlinon Morgenstern al la hodiaŭa vesperfesto?

La ataŝeo elprenis liston el sia poŝo kaj tralegis ĝin.

- Fraŭlino Anna Morgenstern ne estas inter la invititoj.

La grafo longe staris senvorte…

KVINA ĈAPITRO

1

Mesaĝisto atendis lin sekvan tagon en la hotelo. Li estis rondbarba, senliphara, ruĝa, gorilosimila homo kun kurbaj kruroj kaj kun tiel plata vizaĝo, kvazaŭ pasto estus sur lia kolo anstataŭ kapo.

Li kunbatis siajn maleolojn:

- Leŭtenanto Polchon subordige anonciĝas.

- Aha, aha… Kie vi estas leŭtenanto?

- En la armeo de SirYolland. La stabo sendis min kiel kurieron. Ĉio estas preta. Ni atendas vian alvenon kaj partoprenon en nia defilo. Jam estas kune ĉiu ulo. Ili estas tre bonaj soldatoj. Oficiroj kaj senranguloj.

La grafo ekŝanceliĝis, kvazaŭ li estus trafita de kuglo pro la odoro de cepo kaj brando, kiun leŭtenanto Polchon elspiris.

- Ĉu vi estis iam leŭtenanto?

- Mi ekssoldatiĝis kiel leŭtenanto de la legio. Mi havas honorlegion, medalon de unuaranga soldato pri braveco kaj ventro-pafvundon. Mi estis eminenta soldato, kaj la respubliko eksigis min nur laŭ mia propra peto. Generalmajoro Wilkie mesaĝas tion…

- Bonvolu riperi kiu?

- Sinjoro generalmajoro Wilkie!

- Hm… kiel aspektas tiu generalmajoro?

- Li estas malalta, dika homo, kalva, kaj li ne scias, kie loĝas Disinjoro, sed li estas tre afabla. Li mesaĝas al vi, ke mi kaj alia oficiro liveru vian havaĵon, Sir, morgaŭ per la aŭto de la baterio.

- Bonvolu klarigi, pri kio temas? – demandis Oliver Yolland ĉiam pli mallaŭte.

- La generalmajoro, tiu dika homo, aĉetis nigre ian kirasitana aŭton kun kanono, en kiun oni povas meti multe da objekto, kaj ĝi bone veturas en la dezerto.

Eterna sinjoro de Denham iom post iom rezignis la strangajn, militistajn aferojn.

- Mi skribos liston ĝis vespero, kion vi devas liveri – li diris. Mi volas tion, ke Saharo ne signifu gravan ŝanĝon en miaj vivcirkonstancoj. Mia sekretario zorgos, ke vi liveru vinon, viskion, teon, ciegredon kaj ilustritajn magazinojn… per la aŭto de la baterio.

- Subordige: ni liveros ĉion. Tiu certa sinjoro ankoraŭ petas vin, bonvolu difini la tipon de la veturilo, per kiu vi gvidos nin. Li ne volis elekti ĝin. Li mesaĝas, se ankaŭ vi volas tiel, Sir, ĝi estu kamelo aŭ ĉevalo, aŭ kiu ajn besto.

- Estus plej oportune, se ĝi estus ia kabrioleto, aŭ io simila… Vi do akiru veturilon.

- Kaj de kie vi deziras ekiri, Sir? Ĉar de Maroko vi povas veturi sur longa parto per trajno. Ni bivakas apud ia polva nesto, nomata Zirzin en malplena hangaro, kiun luis tiu sinjoro.

- Atendu min morgaŭ ĉe la lasta fervojstacio kun la veturilo. Ĝis kie mi povas vojaĝi per trajno de tie ĉi?

- Ĝis Ain-Sefra. Mi atendos vin tie kun la veturilo. Ĉu do ĉaro aŭ ĉevalo?

- Eh… Kion vi volas, ĉu ĉaro aŭ triciklo… tute egalas, ĝi nur estus komforta. Kaj diru al ili, ke mi kontrolos la nomumojn… mi do, elektus la oficirojn… pli bone, ĉar… ne eblas tio, ke kiu ajn…

- Ankaŭ mi samopinias, Sir. Kelkaj homoj el ili ne havas tro agrablan, sinjoran vizaĝon.

Sir Yollan dum kelkaj sekundoj rigardis senkonsile la ruĝan rondbarbon, la pastosimilan vizaĝon de leŭtenanto Polchon, sur ĝi lia plata, dika nazo sidis tiel, kvazaŭ tomato estus metita tien.

- Jes… Ankaŭ mi pensas tiel. Nu, ĝis revido, kaj mi tre ĝojis, kaj… mia sekretario donos ion da alkoholaĵo al vi, sinjoro leŭtenanto… Badaŭrinde mi ne havas cepon.

Polchon foriris.

La grafo estis iom maltrankvila pro la armeo. Hm… Tiu Polchon estas tipa maristo. Sed kiu scias tion? En la legio ankaŭ el maristo povas fariĝi oficiro.

Li iris sur la straton. Nek li mem sciis, kial, li estis iomete ekscitita. Io nervozigis lin. Aĉetinte skatolon da cigaredo, li staradis antaŭ la moskeo Kutubia. Estas la kvina horo kaj duono. Jen vidu, ĝi estas la kafejo Royal… Li devus renkontiĝi ĉi tie kun tiu virino, nomata Morgenstern. Bonŝance li malkovris ŝin. Nun li almenaŭ ne eniros tien, kaj tiu virino ne plu povos trompi lin…

Sed kial ne eniri? Ridinde. Li timiĝos de virino nek tiam, se ŝi estas simila al Mata Hari. Fine ja estas saĝas taktiko eniri tien. Jes. La situacio postulas, ke li eniru pro saĝa taktiko! Ĉar se li diros al la virino, ke li malkovris ŝian falsan nomon, li divenis la trompon, tiam Harlington sendos alian ĉarlatanon por molesti lin. Eble li ne ekkonos tiun. Prefere estu ŝi en lia proksimo, kiu jam ne estas danĝera, li ja senmaskigis ŝin.

Enpaŝinte la kafejon, li ne vidis la virinon. La gargara kantado de la muezinoj miksiĝis, aŭdebla el la turoj de la ĉirkaŭaĵo. Kamelo blekis ie, kaj kvar elefantoj kirlis grandan povonubon, kiel trenpaŝe ili rapidis sur la vojo. Hu, kiel varmege! Egalas. Li atendos la virinon. Por ke ŝi ne konjektu, ke li divenis ion.

Li eksidis kaj atendis. Tutajn du horojn. Sed la virino ne venis, kaj Sir Yollan iris hejmen tre malbonhumore.

2

Dume Polchon foriris por aĉeti veturilon. En la araba urboparto Mellah troviĝas sufiĉe da frajtistoj, veturigistoj kaj tiuloj. Polchon vere estis maristo. Sed li trankvile proponis sin, kiam li aŭdis, ke oni serĉas eksiĝintan legianan oficiron al ekspedicio. Li akiris falsajn dokumentojn. Marŝalo Podvinecz ne tro interesiĝis pri lia paseo. Li dungis lin kiel oficiron. Polchon sciis, ke li plenumos sian taskon. Li scias marŝi, komandi, sed koncerne la konojn pri Saharo: ankaŭ vera oficiro estos tie, kiu scios kion fari, kaj li imitos lin en ĉio, li akceptos tion, kion li diros kaj fino.

En la granda varmego oni eniras ien por trinki ion. Jen estas tiu unuaranga loko, eble okazos ankaŭ interbatado. Kiu scias? Li eniris tien por trinki ion. Interbatado ne okazis, sed li havis alian bonegan eblon por amuziĝi. Araba ŝuflikisto, profesia embuskmurdisto kaj du miraklopovaj kurcistoj estis en la ejo, kiuj ĝuste nun ne havis laboron. Ili invitis lin kartludi. Polchon ne multe zorgis pri sia oficira aŭtoritato kaj sidis inter ilin. Pidgin, la sekretario de la grafo donis al li mil frankojn por aĉeti veturilon. Sed diablo vidis tiaĵon! Ke ankaŭ la tri partneroj estis trompludistoj, ĝi signifis nenion, ili ja kompletigis unu la alian. Sed ŝajnas, ke la sorto laboris kontraŭ Polchon, ĉar li perdis la monon dum kvaronhoro.

- Nu, nun mi povas iri kien ajn – li diris kolere. – Mi perdis ankaŭ mian novan rangon.

- Kial? – miegis iu miraklopova doktoro.

- Mi fraŭdis. Mi forludis alies monon.

- Nu kaj. Ĉu tio estas problemo?

- Ĝi ne estus problemo, sed mi havis tute bonan postenon. Longdaŭran, sinjoran laboron. Konvenan al mi. Mi povintus bele vesti min, fanfaroni, interbatadi, kaj nun fino. Mi ĵuras je mia glavo, ke mi bedaŭras tion.

- Kion vi devintus aĉeti por la mono? – interesiĝis la profesia embuskmurdisto bonvole.

- Veturilon. Kian ajn veturilon. Per kio povintus veturadi en la dezerto freneziĝinta anglo, kiu estas mia superulo.

La ŝuflikisto mediteme karesadis sian mentonon:

- Jen trovite – li kriis poste. – Ni iru al sinjoro Strudl. Li estos feliĉa, kaj vi estos savita. Estus domaĝe, se vi perdus pli multe ol mil frankojn. Vi estas bona trompludisto, kaj eble ni ne estus gajnintaj de vi la monon, se ankaŭ vi konus la kartojn dorse. Ni helpos al vi.

- Jes! – konsentis ankaŭ la miraklopova kuracisto. – Se ni gajnis mil frankojn, tiam ni devas reciproki ĝin. Ni pagos vian brandon, ni donos al vi kelkajn frankojn da kontanta mono, kaj sinjoro Strudl eltiros vin el la embaraso per la veturilo.

Polchon emociiĝis ĝis larmoj. Afablaj knaboj. Dumvoje evidentiĝis, ke sinjoro Strudl venis el Vieno post la milito. Li staris kun sia veturilo sur la belega strato Graben, portanta grizan ĉapelon kun blazono. Li veturigis la malnovajn grandsinjorojn de la imperio. Li venis en Afrikon inter malbonŝancaj cirkonstancoj. Ebria borsisto vetis, ke li veturos per fiakro de Vieno al Algiro. Li estis legende riĉega. Li ensidis ebria en la veturilon de sinjoro Strudl ĉe la Operdomo kaj diris neglekteme: „Veturigu min, amiko mia, en Algiron, al la hotelo Eŭropo…”

Sinjoro Strudl veturis, veturadis kaj la ĵurnaloj skribis pri la riĉa sinjoro. Sinjoro Strudl kalkulis la kilometrojn ekscitite. Tia veturo estas malofta. Ŝipo transportis ilin tra la maro, kaj ili haltis antaŭ la hotelo Eŭropo. Tie la borsisto enrigardis la ĵurnalojn kaj vidis, ke paniko estis en la borso, kaj li jam estas almozulo. Lia ĉiu havaĵo estas tio, kio estas en sia poŝo. La pasaĝero same, kiel ia fripono en Vieno, eniris la hotelon kaj foriris tra alia prdo. Sekvan tagon matene jam estis okulfrape al sinjoro Strudl, ke la pasaĝero ankoraŭ ne elvenis el la hotelo. Li eniris tien kaj eksciis, ke li estas trompita. Lia ĉiu havaĵo estis dek aŭstriaj ŝilingoj. Eble li povintus iri hejmen petante ian monhelpon, tamen li restis pro honto kaj malesperiĝo. De tiam li vivas ĉi tie. Li nur ĵetiĝis en Marokon dum la daŭro de la tempoj. Kiel li diras, li fariĝis „dresisto” ĉe arabo pruntanta kamelojn. La striglas, lavas la kaj batas la dromedarojn. Lia iama fiakro staras apud la rubejo, kaj fojno estas amasigita sur ĝia leda sidejo. Lia ĉevalaĉo, kun kiu li alvenis antaŭ dek kvin jaroj, malgaje staris en la stalo, kaduke. Ĝi melankolie gapas antaŭ sin per ĝiaj ruĝaj, blindaj okuloj. Ĝi revadas pri Prater kaj Augarten, krome ĝi manĝas la malbonan, afrikan fojon. Apud ĝi pendas la kolomb-griza jako kaj cilindra ĉapelo kun kokardo, la vipo, la pantalono kaj la falta pluvmantelo, kiun sinjoro Strudl surprenis vintre, ke la vento blovanta el la direkto de Reichsbrücke ne frapu la frostajn neĝerojn en lian vizaĝon. Certe ankaŭ Dirndel, la aŭstria Rosinante kun elstarantaj ripoj pensas pri tio.

Sinjoro Strudl aŭskultis la sinjorojn. Li estis skulptanta stangon en ĉemizo, sidanta sur la rubujo. Li volis apliki ĝin, kiel ringon de kamelselo.

- Kien mi devas veturigi la frenezetan sinjoron? – li demandis kun eksterordinare malbona prononco.

- Tra Saharo, ien en Sudanon.

Li eklevis sian ŝultron.

- Ĉu Sudano? Cetere estas egale, kie ĝi estas. Mir ist dez Wurst… Granda veturigo estas bona veturigo, li fiksis nur unu aferon. Pagi laŭ la taksametro ĉe ĉiu halto, antaŭ ol koĉeri plu.

- Li estas tia riĉa mens-malsanulo… - klarigis Polchon.

- Nix riĉulo. Mi faris veturigon el Vieno en Afrikon, kaj la pasaĝero forfuĝis. Ankaŭ li estis riĉa. Borsisto.

Fine ili interkonsentis, kaj sinjoro Strudl komencis reordigi la fiakron.

3

- Sir Issisez of Harrington lord – anoncis la lakeo.

- Venigu… la sinjoron – diris Yolland.

Harrington, la alia grandkapitalisto, posedanto de kontrolrajto de ĉefakcioj de fervojoj, minejoj, maro, aero, karbo kaj ŝipveturo estis multe pli maljuna, ol Sir Yolland, sed videble pli amikema.

- Sir Yolland… - li salutis lin kun iom da kapklino.

- Mi ĝojas, Sir… bonvolu sidiĝi – respondis la grafo.

Paŭzo.

- Mi pensas, estus plej ĝuste, se ni parolus sincere: vi, la eterna grafo de Denham, estas interesata serĉi oleon en Afriko. Ĝis nun neniu krucis la vojon de la Oil Company tie. Malgraŭ tio mi ne volas malhelpi vian planon, senigi vin de via rajta posedaĵo. Tial mi proponas al vi estigi komunan entreprenon, rilate vian petrol-trovitaĵon en Afriko.

Paŭzo.

- Bedaŭrinde, nu… kiel diri… - komencis eterna sinjoro de Denham – via estimata propono momente ne estas favora. Via tre respektata monopolio ne havas juran bazon, kaj mi mem volas… Do… mi ne povas uzi vian eminentan afablecon. Vere ne…

Paŭzo.

- Tiuokaze mi malhelpos vin en tio, Sir, ke vi povu labori en Afriko…

- Mi ne pensas, ke ĝi sukcesus al vi, Sir.

Paŭzo.

- Harrington ekstaris kaj klini sin.

- Ĝis revido, Sir Yollan. Mi tre ĝojis, ke mi havis la feliĉon renkonti vin.

- Vi distingis min per via ĉeesto, Sir Harrington.

Li akompanis sian gaston ĝis la lasta grado de la ŝtuparo.

Harrington loĝis unu etaĝon malpli supre, kaj enirinte en sian ĉambron, li ordonis al sia sekretario:

- Ekkontaktu kun Sokolof, kaj estu en konstanta kontakto kun li. Eĉ hodiaŭ mi ekveturos kun miaj homoj al El Golea.

4

Post la vespermanĝo la grafo volis iri en sian ĉambron. Tiun vesperon li trovis la atmosferon de sia apartamento premaera, kaj li manĝis en la belega palmo-ĝardeno de la hotelo. Kvankam ĵaz-bando ludis tie, kion li ne ŝatis. Li jam estis foriranta, kiam virino eksidis fulmrapide apud lian tablon.

- Bonvolu ne montri surprizon, oni atentas nin.

Ŝi estis la tiel nomata fraŭlino Morgenstern, la pseŭdo-fratineto de fikcia sekretario de neekzistanta ambasadejo. Sed ankaŭ nun ŝi estis tiel neimageble belega! Nur ŝiaj ruĝaj lipoj estas malfermitaj, kaj ŝi iomete spiregas pro ekscitiĝo.

- Bonvolu sidiĝi – diris la grafo iom malfrue.

La muzikistoj en blanka frako nun komencis ludis mallaŭtan tangon. Komence de la seka sezono ofte revenas la neeltenebla sudokcidenta vento, oni profunde ĝemadas, araneaĵsimila nebulo ĉirkaŭas la belajn arklampojn, kaj sur la vizaĝoj sidas glueca vaporo brilante. Eble tial ekĝemis la grafo laŭte, aŭ eĉ tio eblas, ke li jam antaŭvidis, kiel nekutime vulgare detruos la knabino denove lian malnovan, bone bazitan, majestan, mitan, anglece ĝentilhoman trankvilon, kiu estas metafora fratineto de elpensita sekretario, laboranta en nekezistanta ambasadejo.

- Se eblas, bonvolu rideti, ĉar oni atentas nin – ŝi diris ridetante, tiel montrante bonan ekzemplon, kaj vidiĝis du tiaj malsekaj dentaroj, respegulantaj la brilegon de la lampoj, ke Sir Yollan ekkonsternis. – Lastfoje mi tial malfruiĝis al la rendevuo en la kafejo Royal, ĉar oni kaŝobservis min.

- Tre interese, ŝed ĝi... ja havas…iom da bazo…

- Oni kaŝobservas ankaŭ vin. Oni jam scias, ke ni alianciĝis…

Eternan sinjoron de Denham kaptis tusado, kaj li faligis ne nur sian monoklon sur la tablon, sed ankaŭ sian cigaron.

- Kiel?!

- Ĉu mi ankoraŭ ne diris, Sir? Ni estas aliancanoj. Mi helpos vin esplori petrolon. Ni trovos ĝin! Mi decidis stari je via flanko!

- Vi estas tre afabla… vere… Sed vi intermikasas min kun petrolesploristo, kara… fraŭlino… fraŭlino… kiel vi diris…

- Se vi permesas, Sir, mi trinkos nigran kafon ĉi tie.

- Eble, se oni atentas vin… tamen estus pli sekure en via apartamento.

- Ho, mi ne timas. Kelnero! Mi petas nigran kafon.

Sir Yolland estis senkonsila. Li viŝadis sian monoklon kaj dorsapogiĝis ŝokita en la seĝo kun fiks rigardo, eĉ tiel grandigi la distancon; kun tia fierega rifuzo, kiel hinda idolo. Sed ŝajnas, ĉio лi ne ĝenis la fikcian fratineton de la elpensita sekretario de la abmasadejo, funcianta sur la luno, ĉar ŝi ekfumis cigaredon kun gaja rideto.

- Lastfoje mi ne venis en la kafejon Royal, ĉar oni sekvis min. Sed nun ni povas Ŭaroli trankvile.

- Ĵus vi diris, ke oni atentas nin…

- Ĉu mi?! Sed Sir! Ĉu mi diris? Jes, eblas, ĵus oni ankoraŭ atentis nin. Vere. Sed tio ĉesis.

- Ĉu ĝi ĉesis?

- Jes. – Ŝi sentis, ke estas iom tro, kion ŝi faras, ŝi do daŭrigis tuj ridetante: - Bonvolu kredi, ke mi estas stulteta virino, sed mi ne kutimas mensogi. Ĉu vi jam faris ion en la afero de mia patro, Sir?

Sir Yolland ruĝiĝis anstataŭ la virino.

- De tiam mi eksciis, ke vi, fraŭlino, diris… ne la veron al mi… nu do tiel dirite… Vi ne estis invitita al la balo, via frato ne estas sekretario de la ambasadejo…

Li atendis tion, ke la knabino paliĝos, ruĝiĝos, kaj ŝi rapide, embarasite foriros. Sed li vane atendis. La knabino ekridetis kaj komencis kirli sian kafon, kiun la kelnero dume metis antaŭ ŝin.

- Ĉu vi vere divenis tion? Mi povintus pensi ĝin. Vi ja estas tiel saĝa. – Kaj ŝi denove rigardis sur lin tiel, kiel juna admiranto al la fama poeto.

- Ankoraŭ per kio mi povas servi vin – li demandis malvarmkondute, kaj la knabino respondis entuziasme:

- Per ĉio…

La grafo denove konsterniĝis. Kiel ŝi mensogas! Malagrable. Tiel bela, juna virino…

- Mia nomo estas Anna Elsworth. – Kaj ŝi kunmetis siajn manojn. – Mi petas vin… savu mian patron!

- Fraŭlino Elsworth… por akcepti… vian alian, provizoran nomon… Mi povas fari nenion… morgaŭ mi ekvojaĝos. Cetere mi scias, se mi interesiĝus plu, vi elpensus alian ambasadejon, eble tutan landon al ĝi, kaj… vi ne devus pensi multe pri patroj… sed mi domaĝos vin penadi plu, kaj mi diras al vi, ke… mi scias pri la tuta afero rilate Mata Harion. Vi, fraŭlino Elsworth, se ni akceptos tiun nomon, oni komisiis vin spionadi en mia ĉirkaŭaĵo, trudiĝi en mian fidon, kaj poste, nu… tieldirite trompi min, se ĝi ne estas ofenda… Vi ne povos konvinki min pri ties malo, kaj mi jam antaŭe bedaŭras, ke vi devas nei ĉion ĉi.

La knabino ekĝemis.

- Vi pravas. Mi devus nei ĝin. Sed mi ne faros tion. Estas tiel, kiel vi diris.

La grafo konsterniĝis.

- Kiel?

- Vere mi volis fari tion. Trudiĝi en vian fidon. Kaj trompi vin. Mi pensis, ke sufiĉos flatadi. Ĉar la plimulto de la viroj estas stulte vantaj kaj ili kredas ĉiun komplimenton. Sed mi trompiĝis. Vi estas tre saĝa, genia homo, Sir!

- Ĉu vi deziras ankoraŭ ion? – demandis la grafo eĉ pli malvarmkondute, ĉar li timiĝis de la virino.

- Jes. Nur tion, ke kredu min. Mi ne kutimis mensogi… Mi petas vin, ne foriru, pro Dio! Sidiĝu. Oni atentas nin. Mi jam diris tion.

La grafo ekstaris aplombe.

- Eblas, ke oni vere atentas nin. Tiuokaze mi riskos tin, ke ili vidu tion, kiam mi iros en mian apartamenton… Permesu, ke mi finu la konversacion. Matene mi forvojaĝos frue.

- Kunportu ankaŭ min, Sir! Mi estas malriĉa knabino, kaj mi ŝatus serĉi mian patron en la dezerto, kiun la beduenoj forrabis kruele.

Sir Yolland konsterniĝis! Mutiĝis! Li staris ravite antaŭ la majesta impetineteco de tiu ĉi virino.

- Fraŭlino Elsworth, se ni supozas… Mia ĉiu kompato estas tiu de via malfeliĉa patro, sed mi havas laboron, mi povas fari nenion…

- Mia patro estas la viktimo de la devo! Kiel la sekretario de la ambasadejo…

Oliver Yolland ekspiris profunde.

Oliver Yolland ekspiris profunde.

- Via estimata frato estas la sekretario…

- Li anstataŭigis mian patron post lia malapero, kiu estas sekretario de la ambasadejo en Maroko!

- En Maroko ne estas ambasadejo.

- Sed sekretario de la ambasadejo jes. Ĉu la sekretario de la angla ambasadejo de Parizo ne povas vojaĝi al Maroko?!

- Kion vi deziras? – diris la grafo langvore.

- Via vojo preteros, Sir, la oazon Mukhtar, la beduenan neston, kie oni tenas mian patron en kaptiteco. Kunportu min! Mi ne havas monon por la vojaĝo. Kaj mi ne kuraĝas vojaĝi sola… mi ja estas tiel timema.

- Mi ne rimarkis tiun vian econ… Mi bedaŭras fraŭlino, ke mi ne povas kunporti vin…

- Vi pravas – ŝi diris kun tragika indiferenteco kaj plorsufetis. – Vi iras kun tuta arme, tamen vi nePhelpas min.

- De kie vi scias, ke mi iras kun armeo? – li demandis iom nervoze.

- Ĉu mi ankoraŭ ne diris, ke iu dum semajno subaŭskutis vin tra la serurtruo?

- Kiu?

- Mi – ŝi ĝemis anime rompite -, kaj tiam mi pensis, ke Ůe estus granda problemo por vi liberigi mian patron helpe de via armeo. Ne estintus problemo por Julius Caesare, se iu petus lin iri sur vit-monteton, kiam li trairis eĉ Alpojn…

- Li estis Hanibalo.

- Estas egale. Gravas, ke li estis anglo kaj viro.

La lordo flustris lace:

- Li ne estis anglo… mi petegas…

- Sed li estis viro!… - Ĉar la lordo ne respondis tion, ŝi daŭrigis tiel. – Vidu, ke mi pravas en ĉiu diskuto, vi tamen kontraŭdiras. Nu bone. Ne kunportu min. Oni ne atendu dankemon nuntempe.

- Mi petas vin… li konsterniĝadis – ĉu mi devus esti dankema al vi?

- Ĉu ne?! Mi konfesis sincere, ke oni volis uzi min kontraŭ vi. Mi diris sincere, ke oni atentas vin, ke insidaj homoj kaŝaŭskultas vin. Mi alianciĝis honeste al vi, mi aliĝis al via movado, kion vi komenci por trovi oleon. Kaj mi petis nur tion, ke vi liberigu mian fraton…

La grafo ektremetis, kvazaŭ serpeto estus lin pikinta. El la patro fariĝis frato.

- Kara fraŭlino! Mi ne esploros plu viajn enigmajn asertojn. Mi konfidas mian sekretarion doni sufiĉe da mono por via vojaĝo. Per tio mi kvitigis mian dankon, kaj mi esperas, ke… okaze de viaj farmiliaj dramoj… eble vi neglektos min… kiel savanton…

- Dankon! – ŝi respondis akre. – Mi ne aspiras vian monon. Nek vian protekton. Prenu tiel, ke ni ne renkontiĝis!

Ŝi okulmezuris Sir Yolland-on per fulmantaj okuloj kaj forrapidis.

La grafo linge kuŝis en sia lito kun malfermitaj okuloj, kvankam alifoje li kutimas ekdormi kvazaŭ je ordono, kiam li volis, precipe, se li devas vekiĝi frue sekvan tagon.

La jajroj, kiujn li pasigis en la batalo por la petrolo, nun la unuan fojon okazis, ke li devas fari tiun laŭ li subrangan laboron: trovi kaj sendubigi la trovaĵon. Ĝi devas estis inda al li. Oni kutimas diri pri li, ke li estas vanta kaj megalomania. Ĉar li sciis bone, kion oni klaĉadas malantaŭ lia dorso. Sed li ne zorgis pri tio. Kion oni nomis megalomanio aŭ cezarismo, tio ja finiĝis ĉiufoje per la malvenko de Oil Company de Harlington kaj per la ekstermo de Livingstone piedpreminte. La granda ole-trovaĵo de Livingstone neniom valoris en Mezopotamio. Vane estas la ole-riĉa baseno tie, se oni ne povas meti la „pipeline”-on, la ole-tubojn. Kial oni ne povas fari tion? Ĉar Sir Oliver Yollan aĉetis ĉiun teron ĉirkaŭo ĝi. Kaj li ne permesas meti la tubojn sur sia tereno.

Kaj Livingston… bankrotos pro tio… Ĉar li investis sian ĉiun havaĵon en tiun negocon…

Li enlitiĝis.

Li sonĝis tion, ke liaj soldatoj masaktis tutan oazon, kaj sola, sendifekta konstruaĵo staris inter la fumantaj ruinoj: la angla ambasadejo de Maroko, en kiu sidis okulvitra, blankhara sinjoro malgaje, kaj li diris tion al la enpaŝanta, ferganta Yolland: „Vidu, Sir, mia filino kaj fratineto Morgenstern, Anna Elsworth, tamen ne mensogis. Tial ne estas anglal ambasadejo en Maroko, ĉar oni forrabis ĝin kune kun mi. Kion vi trinkas?…”

- Estas la sepa horo, Sir. – Bonŝance la lakeo vekis lin.

SESA ĈAPITRO

1

Li havis strangan aventuron ĉe la stacidomo. Antaŭ sia pulmano, ĉar oni kroĉis apartan vagonon al la trajno, dik-malata homo staris antaŭ lin. Liaj taŭzitaj, blankaj haroj senorde pendis sur lian frunton, liaj krudaj trajtoj esprimis miksaĵon de ironio kaj ŝerco. Cigarstumpo fumis en lia buŝangulo.

- Oliver. Antaŭ ol vi ekvojaĝos, ni interŝanĝu kelkajn vortojn…

- Kiu vi estas? – demandis Yolland.

- Mi nomiĝas Livingstone, vi komedianta papago, se vi estus forgesinta tion. Aŭskultu min, via vanta orgojlo ne interesas min. Mi nur ridas pri ĝi. Ĉa mi konis vin kiel bonan knabon, malgraŭ tio, ke vi estas iom frenezeta. Sed forprenu viajn manojn de tiuj terenoj, kie miaj oledukoj devas trapasi. Mi petas vin pri tio. Mia tuta havaĵo perdiĝos, se mi ne povos ekspluati la terenojn.

- Mi ne kutimas respondi al nekonataj kaj malĝentilaj homoj. Ĉar temas pri via havaĵo: mi memoras tiel, ke mi proponis al vi… transpreni la petrolkampojn… por kontanta mono…

- Ne pri tio temas. Foprenu viajn manojn de tio, kio estas la mia, ĉar mi ekbatos vin tiel, ke vi memoros tion, dum vi vivos!Ĉu vi komprenas? – tondris Livingstone.

- Lastfoje mi staros antaŭ vin honeste: lasu tion paca, kio estas la mia, kaj nek mi okupiĝos pri vi. Vi povas koleri, kiom vi volas, sed…

- Ĉu vi bonvolus stari flanken, kiel mi diru…de antaŭ la ŝtupetaro?… Mi ne konas vin. Foriru de tie ĉi.

- Mi tuj foriros. Kaj ankaŭ vi iru, Oliver Yolland! Sed la tuta mondo ridos pri vi! Ne forgesu: mi vokis vian atenton. Mi avertis vin!

Kaj li foriris.

Grafo Yolland envagoniĝis, kaj post kelkaj minutoj la trajno kuregis al Oriento kun peza suspiro, surpren sur la montdeklivo de Atlaso. Al Saharo.

2

Sir Yolland studis la mapon. Ĝi estas grandega vojo, tio certas. Sed kun armeo, tiel bonege ekipita, kiel la sia, kaj kun nelimigita kapitalo, ĝi estos facila promeno. Inter la oficiroj troviĝas kelkaj tiaj homoj, kiel Polchon, kiu trudiĝis inter ilin. Gravas, ke ili sukcesis dungi kapitanon Durien. Wilkie faris tion lerte. Nenia problemo povos okazi grvidate de legiana kapitano.

Li signis la vojon sur la bonega militista mapo per ruĝa linio. Unue ili marŝos ĝis El Golea, kio estas ducent kilometra distanco, duondezerta tereno kun montetoj. De tie la oazo Ideles situas jam multe pli malproksime. Tie ili povos zorgi pri la rekompletigo de la provizo, sed sur la plua itinero de la vojo troviĝas nur malpli grandaj oazoj: Air-Asben, Bilma kaj Mao, kie ili povos preni maksimume akvon kaj aĉeti iom da nutraĵo. Entute ĝi estas proksimume dumil kilometra vojo. Okaze de antaŭnevideblaj malhelpoj ĝi signifas tri monatan marŝadon.

Notinte ĉion ĉi, li metis la signitan mapon en celofanan ujon, al kio li havis apartan, koloran ŝnuron por pendigi ĝin ĉirkaŭ sian kolon en okazo de bezono.

Malgranda aŭto, havanta koloron de sigelvakso, vetkuris kun la trajno. La ŝoforo de la eta, ruĝa aŭto akcelis kaj iom post iom atingis la vagonaron. La grafo elkliniĝis tra la fenestro kaj rigardis la pejzaĝon.

La aŭto kuris apud la trajno. Li povintus ektuŝi ĝin per sia etendita mano. Subite la ŝoforo turnis sin. Li ekkonis fraŭlinon Elswort-on (se ni akceptas tiun nomon) malgraŭ ŝiaj ĉapo kaj aŭtistaj okulvitroj. La virino suprenrigardis al li kaj ridetis, ke ĉiuj ŝiaj neĝeblankaj dentoj ekbrilis, poste levinte iun sian manon de sur la direktilrado, ŝi gaje mansvingis al la lordo, kiu elrigardis tra la fenestro, kaj ŝi denove kaptis la stirilon, donis gason, kuplis, kaj la aperta fumgasellasilo superis la bruon de la trajno, kaj la aŭto de sigelvaks-koloro ekimpetis sur la vojo tiel, ke post sekundoj nur ties polvonubo videbliĝis, kiel ia longa, maldense teksita kurteno apud la reloj.

La virino venas!

Maltrankvila sento diluis lian firman, militestran aplombon en la unu momento. Kion volas tiu virino? Li rigardis, kie troviĝas la oazo Mukhtar. Ĝi ne ekzistas. Li foliumis la liston de la oazoj en la mondatlaso, ke eble Mukhtar estas tute malgranda oazo. Ĝia nomo ne rolis tie. Nek eta alibio de oazo kaŝiĝis malantaŭ la mensogo de la virono. La fabelecaj beduenoj kuntrenis ŝian elpensitan patron en neekzistanan oazon.

Ili atendis duonhoron ĉe la sekva fervojstacio. Li descendis por aĉeti ĵurnalon. Apud la budo de la stacidoma pavilono estis benzinstacio, kie staris ruĝa aŭto, kiun oni plenigis per benzino. Ankaŭ la virino estis tie en polvo-matelo apud la veturilo, en iu mano ŝi tenis siajn ĉapon kaj olulvitrojn, en la alia cigaredon, kaj rimarkinte la grafon, kvazaŭ ŝi estus ekvidinta sian malnovan, karan dancpartneron, ŝi kriis al li per sonoranta, gaja voĉo:

- Alo! Sir! Kia surprizo! Ĉu ankaŭ vi vojaĝas tiudirekten?

Nun kion respondi!

- Jes… Mi pensas, tiudirekten… Sed ne ankaŭ.

- Ho, vi estas rigida homo. Ne timu, mi ne kroĉiĝos al via kolo.

- Kia tono? „Kroĉiĝi al via kolo!”

- Mi ne… timas… kaj mi ĝojas revidi vin en bona sanstato. Tiu klimato ne estas tro bona por virinoj.

- Ho, mi estas forta virino. Mi iros ĝis la fino de la dezerto, kaj mi ne malsaniĝos.

- Hieraŭ… hm… kvazaŭ via estus dirinta, ke… ke vi ne kuraĝas sola…

- Mi ne diris tion! – ŝi tuj kontestis.

- Mi petas vin… - balbutaĉis Sir Yolland mortepala – ĉu vi ne asertas, ke eble mi mensogas?

Eklevinte sian ŝultlron, ŝi subite eligis iom da aero tra siaj kunpremitaj lipoj, pro kio aŭdiĝis stranga voĉo, poste ŝi diris simple:

- Kial ne?

- Tial, ĉar Oliver Yollan ne rajtas mensogi! Mi petas vin, fraŭlino Elsworth, se ni akceptas tiun nomon… Ne asertu tion pri mi… Ĉar vi tre ofendas min.

- Ĉu vere? Mi do ne asertas tion. Kien vi iras?

- Reen en mian kupeon. Ankaŭ la benzinujo de via taksio estas plenigita.

- Ĝi ne estas taksio. Tio estas la mia. Ĝi estas la plej nova serioaŭto Bugatti.

Oliver Yollan ruĝiĝis.

- Tio… Ĉiuokaze montras ŝpareman vivtenon. Malriĉa knabino, kiu povas aĉeti aŭton Bugatti.

- Kiu diris al vi, Sir, ke mi estas malriĉa?

- Vi diris tion, hieraŭ vespere – respondis la grafo iom incitiĝeme, ĉar ĝi jam estis tro.

Fraŭlino Elsworth mirante suprentiris siajn brovojn arkigante, metinte sian manon surbrusten, ŝi gape rigardis dekstren, maldekstren:

- Ĉu mi??! Kiajn aferojn vi elpensas!? Mi estas riĉa virino. Mia patro sendas dek mil frankojn ĉiumonate…

- Ĉu la malliberuloj havas tiel altan salajron ĉe la beduenoj? – Ĉar ankaŭ la virino timiĝis, li uzis la paŭzon kaj rapide kapbalancetis: - Mi tre ĝojis.

Li forrapidis.

Li eksidis en la kupeo tiel ekscitite, ke elpeninte sian monoklon en sia poŝo, li komencis viŝpurigi pro eraro la brulantan cigaron per sia silka naztuko. Tia impertinenta kreaĵo ŝi estas! Sen palpebrovibro ŝi neas, ke la steloj troviĝas sur la ĉielo, kaj ŝi mensogas tiel malbone, ke ĝi estas konsterniga. Nek ŝia spiro estas vera. Kaj ŝi parolas kun li per tiel vulgara, popola tono, kvazaŭ ili pasigus kune semajnfinan ferion en la ĉirkaŭaĵo de Londono, kaj oni priservus nin en la sama magazeno dum labortagoj.

La trajno rapide veturis plu, eligante fumnubojn, kaj la malgranda aŭto denove vetkuris kun ĝi. La virino gaje mansvingis, kvankam la grafo nun kaŝrigardis nevidate tra la fenestro, retiriĝinte en la profundon de la kupeo. De kie scias la bestieto, ke li vidas ŝin?… Kial li pensas tion, kiam li ne estas ĉe la fenestro? Li tute ne postrigardos ŝin. Cetere kial ne? Li povas rigardi ankaŭ la pejzaĝon. Elkliniĝinte tra la fenestro, li glutis nur la polvon, kaj la malantaŭa fumgasellasilo, mallaŭtiĝinta por momento, impertinente bruis al li el la malproksimo.

Vespere ĉe la rando de la dezerto ili atingis la finstacion Ain-Sefra. La grafo havis nur kofron, liajn aliajn havaĵojn „leŭtenanto” Polchon sendis per ŝarĝaŭto al la hangaro la antaŭan tagon.

Densa pluvo falis dum la tuta tago, kaj en la varmega vespero zumis nekalkuleblaj moskitoj. Venis en la kapon de Yolland la ofte videbla surskribo ĉe la fervojaj stacidomoj, kiun la instituto Pasztör farbis ĉien:

ANTAŬ OL EKVETURI AL LONGA VOJAĜO
PROVIZU VIN PER KININO
KAJ PRENU EL ĜI PLURFOJE DUM LA TAGO!

- Mi anonciĝas subordige – staris antaŭ li ruĝa, rondbarba homo. – Polchon.

- Ah! – Ĉu vi estas tiu?… Nu?

- Ĉio estas en ordo – li diris kaj preskaŭ falis, ĉar li estis tiel ebria.

- Ĉu tio estas en ordo ĉe vi? Nu, egalas… Ĉu la veturilo?

- Ĝi alvenis!

Li iris antaŭ la domon, kaj la grafo preskaŭ dorsenfalis.

Fiakro staris sur la ŝoseo de la dezerto, kies flago montris, ke ĝi estas libera, sur la veturigista benko sidis dika, ruĝvizaĝa, veruka koĉero, portanta grizan pelerinon, cilindran ĉapelon kun kokardo, kaj liaj blankaj vangharoj finiĝis peniksimile ĉirkaŭ lia mentono. La lampo de la fiakro limis, kaj apud ĝi pendis la vipo fantomeske.

- Kio ĝi estas? – li balbutaĉis.

- Lukaleso. Oni povas nomi ĝin ankaŭ fiakro. Bonvolu kredi, ke ĝi estas la plej komforta, la plej bona dezerta veturilo. La radoj estas ferumitaj kaj gumitaj, kaj la ĉevalo estas mirinde forta dezerta besto. Tial ĝi estas tiel maldika…

- Nu… ĉu veturi per fiakro en Saharo?

- Kredu min, oni trafikas en Saharo ankaŭ per ĉaro, tirata per mulo… Bonvolu rigardi tion en la foiro de Maroko, ke negroj, araboj venas per ĉiuspecaj veturilaĉoj de Timbuktu ĝis Marakesch.

Ĝi estis tiel. Kiun Saharo ekkoleris, tiun ĝi enterigis kun kirasita trajno kaj kun ĉio ceteraĵo tiel, ke eĉ ekzemplero ne restis el tio, kiun la samumo evitis, tiu povis travagi la dezerton kun azeno aŭ kapro.

Yolland rigardis la fiakron. La koĉero, portanta kokardon sur sia ĉapelo, memorigis lin pri karaj, malnovaj tempoj. Julius Caesar aŭ Napoleono ne estus sidintaj en ĝin.

- Oni jam trairis Saharon piede, per aviadilo, biciklo kaj tanko. Vi estos la unua, kiu uzos la veturilon de la malnovaj, belaj tempoj. La fiakron! Vivat!!!

Sinjoro Strudl subite vekiĝis kaj eklevis sian ĉapelon:

- Bonan vesperon.

Kion li povintus fari? Ĉu returniĝi, aŭ retreti ĉe la komenco de la vojo pro fiakro? Cetere la unuĉevala veturilo estas komforta kaj konservativa… Li sidis en ĝin, Polchon sur la veturilbenkon. Sinjoro Strudl deprenis la flavon, la taksametro tiktakis.

- Kien mi veturigu vian sinjoran moŝton?

- En Sudan Sudanon – diris la lordo kolere.

- Laŭ via ordono – respondis sinjoro Strudl trankvile, li lango-klakis, ektiris la bridon kaj svingis per sia vipo. – Hot, ho! Diendl, du Ass!

Kaj ili rule ekveturis sur la vojo.

3

Apud la ŝoseo, konstruita sur taluson jam tie kaj ĉi tie tra kilometroj dezerto ŝanĝis la sod-grundan pejzaĝon, kovritan per maldensa vegetaĵo.

Sir Yollan dorsapogiĝis sur la varma, leda sideje, kiu ankoraŭ ne elradiis la dumtage ensorbitan varmegon. Li metis siajn disetenditajn brakojn sur la feran kadron de la mallevita ombrelo de la veturilo kaj rigardis la larĝajn faldaĵojn sur la pelerino de la koĉero, kiujn li renkontis lastfoje en la romanoj de Dumas.

La hufferoj de la maldika, blinda ĉevalaĉo, ekipita per okulŝirmiloj laŭte klakis, kaj la ferumitaj, gumkovritaj, kadukaj radoj bruis, kaj tiuj ritme balancis la malnovan barkon. Ĝi estas vere agrabla. Estas io trankviliga en tiu veturilo. Kaj ne minacas ĝin tiu danĝero, ke ĝi atingos la ruĝan aŭton.

Ĝi tuj atingis tion! Ĉe la unua vojkurboĝo. La virino staris ĉe la malfermita kapoto.

Unue ŝi miregis kaj ĉesis la munti, ekvidinte la fiakron, trotantan al Saharo. Poste ŝi komencis ridi, fine ŝi staris antaŭ la fiakron kun disetenditaj brakoj.

- Ho he! Diendl… Herrgottnoamoht!…

La radoj grincis, kiel li ŝraŭbis la bremson.

- Mia pneŭmatiko difektiĝis – diris la virino dramece. – Sir, ĉu vi ne havas hazarde rezervan radon?

- Bedaŭrinde… mi ne kutimas kunporti ĝin – ekskuzis sin la grafo -, sed vi certe kunportis ĝin?

- Mi forgesis. Mi estas ege distrita.

- Mi spertis tion. Se vi deziras, mia fiakro reportos vin al Ain.Sefra, ni estas proksime al ĝi.

- Mi komprenas. Ĉu vi ne revenus kun mi per la veturilo?

- Mi atendos ĝin ĉi tie.

- Dankon – ŝi respondis sarkasme. – Ne ĝenu vin, Sir. Mi havas aŭtolevilon, mi gluos kaj denove pufigos la internan pneŭmatikon.

- La gluita gumo ne estas longdaŭra.

- Ne zorgu pri tio. – Kaj ŝi turnis sian dorson al li.

Kion ŝi serĉas en la motorujo, kiam la pneŭmatiko estas difektita? Hm… Kaj neniu rado aspektas mola.

- Ni povas iri – diris Oliver Yolland. Li proponis sian fiakron al ŝi. Li ŝuldas per nenio plu kiel ĝentilulo.

- En orodo. Mi povas iri, sed pasis la dek dua horo. De nun validiĝas la dua tarifo ĝis la sesa matene – respondis sinjor Strudl, metinte la flagon unu gradon malsupren. Poste li turnadis la kupran krankon por lozigi la bremson kaj diris:

- Hot! Du zau… géma!…

Aŭrore jam videbliĝis la dezerto. Ĉie estis nur sablodunoj, ĉirkaŭe ĝis la plej malproksima punkto de la horizhonto. La grafo ekdormis, sed laŭtega kornado kaj motorbruo vekis lin. La ruĝa aŭto atingis kaj pretersiblis ilin. Malgranda mano etendiĝis tra la fenestro, kvazaŭ mansvingante malantaŭen.

Kial ŝi ĉirkaŭflankumas lin?…

- Sinjoro Polchon – li diris al la antaŭe sidanto sur la veturigista benko. – Kiam ni atingos tiun hangaron?

- Eble tagmeze. La vilaĝo, nomata Zirzin jam estas relative proksime.

- Ĉu la ŝoseo kondukas tien?

- Jes, Sir. Ĉu vi deziras trinki brandon? Ĝi freŝigas.

- Dankon.

Li dormis proksimume duonhoron, kiam li denove vekiĝis je bremsogrincado.

La vojo fariĝis iom dekliva kaj akre kurbiĝis inter kelkaj grandegaj montetoj. Subite sinjoro Strudl ekkriis terurite kaj retiris la ĉevalon ambaŭmane, per sia tuta pezo retrokliniĝinte.

- Sankta Dio! Hoo, ho! Diendl! Du verfluchta!

La grafo elsaltis el la veturilo, antaŭ ol ĝi estus haltinta.. Terura vidaĵo!

Ŝajnas, ke la malgranda, ruĝa aŭto kuris de sur la vojo kaj puŝiĝis al ŝtonamaso. Ĝi kuŝis rompiĝinte, renversite. Malpli proksime estis la virino boriĝinte en molan sablodunon, sveninte, en ŝiriĝinta vestaĵo.

Ili portis ŝin al la fiakro kaj kuŝis ŝin sur la ledan sidejon. Ŝi ne estis grave vundita. Ili atendis vidi tie kaj ĉi tie frakturon aŭ vundon sub ŝia ŝiriĝinta vestaĵo, sed ne okazis tiaĵo. Ŝajnas, ke la mola, dezerta polvo obtuzigis la falon. Se ŝi falintus sur la ŝtonamason, tiam estus kapute al ŝi.

Ŝi malfermas siajn okulojn malrapide, sed ŝi denove fermas tiujn post profunda ĝemo.

- Ni veturigos ŝin ĝis Zirzin – diris Sir Yolland. – Tie ni havas kuraciston, medikamenton, kaj ni liveros ŝin kien ajn per ŝarĝaŭto!

Kuŝiginte ŝin sur la leda sidejo, ili iris piede apud la fiakro.

La virino post nelonge side leviĝis kaj palpadis sian frunton.

- Kie mi estas? – ŝi demandis la grafon, kiu tuj rapidis al la trotiranta veturilo.

- Via aŭto renversiĝis… Ĉu vi ne sentas doloron?

- Dio mia… - ŝi viŝis sian frunton. – Mi estas tiel narkotita.

- Bonvolu kuŝi tranvile, ĉar se vi havas interan lezon, tiam vi devas singarde moviĝi.

- Vi pravas… Kiel saĝa vi estas… - Ŝi rekuŝiĝis kaj fermis siajn okulojn.

Yolland turnis sin al Polchon.

- Vi, sinjoro oficiro, iru al Ain-Sefra. Aranĝu, ke oni remorku tiun rompiĝintan aŭton de sur la vojo.

- Jes ja. Kiel mi revenu?

- Per ĉevalo, aviadilo, kamelo, laŭplaĉe, nur rapidu.

Polchon turniĝis kaj rapide ekiris sur la ŝoseo. Sir Yolland enpensiĝinte tretis sub la varmega suno malantaŭ la veturilo. Tiu virino kaŭzas multe da malagrablaĵo. Se ŝi ne havas internan lezon, tiam li feliĉe transvivis la teruran karambolon, kaj li reveturigos ŝi en Zirzin. Hu, kiel malbone estas malrapidiri tiel, sed ja lezita virino… Kio fumas en la fiakro?

Li rapidis por atingi la barkon.

La tiel nomata fraŭlino Elsworth kuŝis dorese sur la falava, leda sidejo, kiel oni metis ŝin tien kaj cigaredis. Oliver Yollan ŝvitegis.

- Hm… Ĉu vi fartas pli bone?

- Nur iomete – ŝi respopndis ĝemante. – Vidu – ŝi daŭrigis lamente -, vi estas ties kaŭzo. Sir.

- Ĉu mi??!

- Jes, jes, vane vi rigardas sur min tiel, kvazaŭ vi volus min formanĝi. Mi diris al vi, ke mi estas malforta, forlasita kreaĵo, kaj kunveturigu min. Sed vi ne faris tion. Tial mi devis lui aŭton. Kaj malriĉa knabino ne estas sperta pri la aŭtostirado.

La grafo ĝemis. Li jam laciĝis pro la konstanta malkaŝo de la mensogoj de la virino. Ŝi do denove estas malriĉa kaj malforta, kaj la aŭto ne estas ŝia, sed luita. La virino estas tute distrita kaj mensogas konstatne. Pro tio estas la komplikaĵoj.

- Vi denove diras alian aferon… ol kio estas la pura vero.

- Vi denove prineas min. Ĝi estas via pasio. Kion mi diras, ĝi ĉiam estas tiel. Se mi estus veturinta per tiu fiakro, tiam ne okazintus la katastrofo.

- Vi pravas.

- Jen vidu. Ĵus vi diris, ke mi mensogas. Vi dementas per iu via vorto la alian, dum mi kuŝas ĉi tie, neniu scias kiajn internajn lezojn mi havas.

Kaj ŝi fermis siajn okulojn lace. La grafo nur glutis. Sed li ne kuraĝis ekparoli. La kompatindulo tiel laciĝinte cigaredis sur la sidejo de la fiakro.

- Nun bonvolu nur ripozi, se ni alvenos en Zirzin-on, mi reveturigos vin per ŝarĝaŭto.

La virino salte leviĝis de sur la sidejo kiel sovaĝa kato kaj bataleme rigardis al li, kubutante sur la kadron de la klapŝirmilo.

- Mi protestas, ke vi orodonu pri mi! – ŝi kriis. – Vi povas sendi min nenien! Vi rajtas helpi virinon, kiu suferis akcidenton sur la ŝoseo, sed se vi estas ĝentlemano, tiam vi ne misuzos mian situacion nur tial, ĉar mi havas internan lezon! Bonvolu akcepti tion!

Sir Yolland unue rigardis al la ĉielo, poste kolektinte sian ĉiun paciencon, li ekparolis kun profeta mildeco:

- Mi pensis, ke mia devo estas veturigi vin hejmen, kiam vi estas malsana.

- Dankon. Sed kiel mi jam tiomfoje mi diris: mi estas sufiĉe forta. Mi iras antaŭen. Ĉar mi ne havas aŭton, eĉ akcidento trafis min, maksimume vi povas helpi mian pluveturon, sed vi ne rajtas resendi min.

- Kien vi vojaĝas, fraŭlino Elsworth, se ni akceptas tion…

- Mi jam diris, ke oni gardas mian patron en la oazo Gondar.

- Vi menciis la oazon Mukhtar…

- Kie oni gradas mian patron, mi pli bone scias, se vi permesas tion. La oazo Gondar estas ĉe la limo de Senegalio, kaj se vi volas esti afabla al mi, vi veturigos min per fiakro tien, se ne, tiam mi ekiros piede.

La grafo preskaŭ ekridis. Kiel travidebla, naiva artifiko.

- Se vi deziras, mi luos karavanon. Mi, bedaŭrinde ne povas kunveturigi vin.

Sir Yolland anhelante, ŝvitante marŝis malantaŭ la unuĉevala fiakro. La suno varmege brilis, kaj sinjoro Strudl kelkfoje klaketis per sia lango.

Polchot alvenis post unu horo.

- Kio okazis? – demandis la grafo. – Vi ja ne povis esti proksime al Ain-Sefra.

Polchon postrestis iomete, ke la fiakro ruliĝu antaŭen de ili, poste li diris malgaje:

- Mi ne devis iri al Ain-Sefra. Kiam mi atingis la okazejon de la akcidento, grandega kamiono staris tie, kiu ĵus ekremorkis la malgrandan aŭton.

- Ĉu ĝi hazarde alvenis tien?

- Intence. La ŝoforo rakontis, ke hieraŭ vespere vizitis ilin en la garaĝo virino, nomata fraŭlino Elsworth, kiu komisiis ilin remorki rompiĝintan, malgrandan aŭton je la dek unua horo hodiaŭ antaŭtagmeze de la meljloŝtono kvardek sep.

Ĉrrr… La monoklo de Sir Yollan falis sur la vojon, kaj ĝi rompiĝis je pecoj.

SEPA ĈAPITRO

1

En la hangaro apud Zinzir estis eksterordinare vigla vivo. La plej dubindaj elituloj de Nord-Afriko kolektiĝis en la grandega konstruaĵo el ligno. Estis inter ili senlabora maristo, eksterdeĵora dokisto, eksigita doganisto, enŝtelumanta rabisto, agento pri avelnegocisto, filmstatisto, hundkaptisto kaj advokat-kandidato. Ili ĉiuj estis registritaj, kiel eksiĝintaj aŭ dizertintaj legianoj. Ili ĉiuj kredis, ke la aliaj estas veraj legianoj, kaj li atentos kaj imitos ilin. Ĉar kiel ajn strange sonas, en Afriko estas tre malfacile trovi veran, dizertintan legianon. Kiu ekssoldatiĝis, tiu malfermas vendejon, fariĝas drinkejmastro aŭ iras en sian patrolandon, kaj kiu dizertis, tiu ne estas freneza reveni denove ĉi tien.

Estas tute bonŝance, ke la situacio, rilate la oficirojn, estas pli bona. Jen estas la kapitano Durien. Li estas gaja, belvizaĝa homo, havanta elegantan manieron, firmkarakterajn trajtojn, bluajn okulojn kaj diskombitajn, blankajn harojn, kiuj kovras lian maldekstran frunton per grandega ondumo, kio povus estis esterordinare avantaĝa eksteraĵo ankaŭ por heroo de dramo. Krome marŝalo Podvinecz kun sia flor-bukeda ĉako, en sia ora verda kaj kremkolora pantalono, kun siaj ordenoj kaj firma karaktero. Jen estas ĉefleŭtenanto Renoir, tiu delikatanima, fragila, kara, silentema oficiro, kies iun okulon kovras pansaĵo. Leŭtenanto Polchon apenaŭ havas oficiran aspekton, kun sia ruĝa, marista barbo, sed liaj dokumentoj estas korektaj, kiuj atestas dek jaran soldtservon en la dezerto. Tio ja faras iomete kruda lian aspekton. Serĝento Bayonne alvenis ĉi tien el la dispelita bando de kontrabandistoj. Iam li estis suboficiro en la legio.

Por rapidigi la aferojn, oni ne kontrolis la dokumentojn de la senranguloj popersone. Tiel evidentiĝis pri la trumpetisto, ke li estas pistonisto. Fine ja la du muzikiloj estas similaj, kaj gravas, ke estu blovmuzikisto en la roto. La trumpetisto estis la dirigento de la orkestro Keep Smilling Jazz. Ili du: Houben, la pistonisto kaj Jordan, la membroj de la orkestro, ĝuste nun ne havis laboron. Jam du montojn. Fine ja ili perlaboros sian panon per muziko ankaŭ ĉe la militistaro. Tiel ili rekrutiĝis. Ke ankaŭ King Roswang, la Reĝo de la Leonoj soldatiĝis kun sia ensemblo, al tio jam estis bezonataj dokumentoj. King Roswang prezentis la ekssoldatiĝ-paperojn de la itala, legiana kaporalo, nomata Cavelotti, kaj certigante garantion, oni soldatigis lian tutan cirkan ensemblon: la filon kaj edzinon de King Roswsang. Jes. Lian edzinon, Izabelan, kiel subkaporalon Marcel Cavelotti en vira vestaĵo. Kaj kiu pensas tion, ke ni devas timzorgi pri subkaporalo Izabela, rilate tian vojon, tiu eraras. La subkaporalo estis kvardek ses jara kaj tre falta, sed ŝia alda voĉo eĥis pli tŭmige ol la krio de veterana serĝento. La unuan tagon ŝi vangofrapis agreseman soldaton tiel, ke lia dentaro loziĝis. Ĉar la edzino de King Roswang, subkaporalo Izabela laboris kiel halterlevisto en la ensemblo. Ĉar tri soldatoj loĝas en unu tendo, la virino ne ofendis la puritanajn, morajn regulojn, kiam ŝi dormis kun siaj edzo kaj filo, kiel ĝis nun. Kaj rilate la parolmanieron de la soldatoj, ŝi multe superis ĝin en delikateco, ol tio estas kutima ĉe malgranda, migra cirko. La malgranda cirko tial fuĝis al la legio, ĉar Pipi, la berbera leono, en momento preteratenta, liberiĝis el sia kaĝo kaj manĝis kelkajn spektantojn. Fuĝinte de antaŭ la polico, li anonciĝis kun la dokumentoj de sia amiko, nomata Cavelotti ĉe serĝento Bayonne, kiu varbis komisiite de Durien kaj Podvinecz. Oni dungis lin kaj lian familion.

Ĉar oni organizis la malgrandan roton fine de la ŝipad-sezono, la plimulto de la armeo tamen konsistis el maristoj, ŝtelfiŝistoj, kontrabandistoj kaj el la tuta personaro de la skuno Lukrecia, gvidate de „bier-veselkapitano” Fleur de Bac. Jes! Tio estis la rango de Fleur de Bac: bier-veselkapitano. La skuno Lukrecia kontrabandis anglan bieron en Oranon el la havenoj Port Said kaj Port Sudan, tiel oni rajte nomis ĝin bier-ŝipo kaj ties estron bier-veselkapitano.

Kiel pereis la bier-ŝipo Lukrecia, tio ne apartenas al la temo de la romano. Mar-tombo, mortiga tempesto ĉiutage minacas la vaporŝipojn de la oceano. Tempesta nokto sigelis ankaŭ la sorton de la skuno Lukrecia.

Oni perdis ĝin en kartludo!

…La tempesto, diboĉanta super la Ruĝa Maro, repremis la sudan aerblovon, kaj la akvonivelo de la kanalo leviĝis. Bier-veselkapitano Fleur de Bac ne ekveturis, kiel li planis, kaj li vizitis la varietenon „la Sep Patromurdistoj”en la societo de siaj maristoj, kie li implikiĝis en ardan kartHudanon kun kontrabandist-kolego, nomata Sovaĝa Kornulo. La kartludado aŭrore finiĝis malbone, la proprietulo de la ŝipo Lukrecia perdis ĉion, la ŝipon, ties kargon, eĉ Toutain, la stiristo perdis sian duonan vizaĝon en la int?rbatado post la kartludado.

Ankaŭ la aliaj estis similaj homoj, eble estis escepto la remburisto Kratochvill, kiu verkis sian romanon, kaj li soldatiĝis por trovi trankvilon, liberiĝinte de la infanoj de la ĉefluanton, kiuj estis tiel viglaj kaj petolemaj, ke la plej aĝan knabon la tribunalo de junaĝuloj kondamnis al unu jara puno en reedukejo jam dufoje.

En la grandega hangaro kuŝis ĉio amasigite. Sinjoro Wilkie (kiu eĉ nun portis civilan vestaĵon), Podvinecz kaj Durien faris laŭdindan laboron. Nur sepcent gantoj el gumo kaŭzis iom da problemo. La soldataro povas uzi iel la lakitajn valizojn kaj la okulvitrojn kontraŭ la suno, sed kion komenci per la gumaj gantoj? Dank' al dio ili devis aĉeti nur kvardek pecojn el la rakedoj.

Durien preskribis la ekpaĵon de la soldatoj. Sed li ne postulis de la militistoj uzi la gumajn gantojn, la rakedojn, kaj tiujn sepdek dekduojn da sekuraj pingloj tipo MacWulf-Gruber, kiujn ili trovis en la pakaĵoj lastfoje. Li nur skribis liston pri tiuj objektoj, kiuj nepre estas bezonataj en la legio. Ĝi tekstis jene:

Inventaro, pri la necesaj objektoj, aĉetendaj por la kompani:

1. Kompleta uniformo por ĉiu homo kun la apartenajtaj krurŝirmiloj kaj seskugla pistolo.
2. Konsidere la arde brilantan sunon en la dezerto po unu okulvitroj kontraŭ la sunradioj, ladbotelo, ĉapo kaj monujo, krome bajoneto.
3. Por ĉiu senragulo aŭtomatan razilon kun du razosapoj, ke la sinrazado,deviga en ĉiu dua tago, ne kaŭzu problemon en Saharo. Gamelo, glaso por trini, ladbotelo, ses naztukoj kaj la bezonta municio (revolver- kaj fusilkugloj ktp, ktp).
4. Tri kompletoj da subvestoj, duon dekduo da ŝtrumpoj, franca flago, paketo da pansaĵo (por ĉiu persono).

Baldaŭ evidentiĝis, ke kelkaj ne tro gravaj objektoj ne estis skribitaj en la inventaro, ekzemple por ĉiu homo minimume unu paro da ŝuoj, sed senkonsidere tion la ekipaĵo estis bonega. La armiloj, aĉetitaj de la kontrabandisto estis kompleta. Mitraloj, fusiloj, pistoloj kun la apartenanta municio. Ili devis aĉeti nur mulojn al ĉio ĉi. Kunmetebla kirasita aŭto, kiu havis malgrandkalibran, rapidpafan kanonon, estas utila okaze de milito. Ili dungis ŝoforon kaj mekanikiston al tio. En la interno de la veturilo estis multe da loko por la bezonata personaro, tial oni deponis la vin- kaj rum-barelojn, la botelojn, la putriĝeman viandaĵon, aplikante malvarmigan aparaton, kiun la motoro funkciigis. Mi diras, ke la ekipaĵo estis bonega, nur la komercistoj ne volis kalkuli la varojn sufiĉe multekoste.

Sed sinjoro Wilkie volis akiri profiton el tio. Tial li devis esti cedema. Ekzemple la komercisto de tualetaĵoj bonvolis fakturi altpreze la razaparatojn, sed nur tian, se sinjoro Wilkie aĉetos la sepcent gantojn el gumo, sekiĝintajn en la deponejo, kiujn li mendis iun varmegan tagon pro momenta senkonscia stato. La proprietulo de la vendejo de sport-varoj nur tiam konsentis la maĥinacion rilate la fakturon de la ladboteloj kaj turistaj glalsoj, se ili aĉetos ankaŭ kvardek rakedojn. Konato de marŝalo Podvinecz, ŝu-fabrikisto vendis la soldatbotojn, sed dio scias, kial, kaj kiel, oni liveris kun la ŝuoj ankaŭ sepdek dekduojn da sekuraj pingloj tipo MacWulf-Gruber. Laŭ la opinio de la marŝalo tiaĵo estas tre utila en la dezert, kaj kiam Wilkie postulis pli da informoj, li diranis tion, ke ili povas alpingli la gumajn gantojn al la rakedoj provizore, se iam doniĝos tiel, ke prezentiĝos la demando de la uzo de la sekuraj pingloj.

Sed tio ne plu preneztiĝis.

La vestaĵoj iom diferencis la uniformon de la legio. De malproksime tiuj ne multe diferencis, ĉar la fasonado, la kompilo, la butonoj, la insignoj de la kompanio estis perfekta. Sed la koloro de la teksaĵo… Nu jes, ĝi havis iom da antaŭaĵo. Kapitano Durien portis la teksaĵon. Lia bona konato, kiu estis enteriga entreprenisto, transloĝiĝis en alian kolonion kun sia firmao, kaj tie la koloro de la funebro estis blua. Li do devis liberiĝi de la tuta sortimeto de la malhelaj ŝtofoj, kaj la natura mortado ne ebligis ties rapidan vendon. Tiel Durien (kiel li diris) ekkompatis la povran grandkomerciston, kaj li pensis tiel, ke fine ja la legianaj soldatoj povas porti nigran kamizolon. Ankaŭ la sudanaj infanterianoj havas uniformon el nigra teksaĵo. La drapiraĵoj, la morto- kaj ĉerkotukoj, eĉ la nigraj kovriloj, tajlitaj por la ĉevaloj estis aĉetitaj fare de sinjoro Dubois, kiu hazarde estis malproksima parenco de sinjoro Wilkie, kaj li bonvolis fari kamizolojn kaj mantelojn el la nigra drapo, sed nur tiam, se ili mendas violkolorajn pantalonojn. Ĉar li havis tiajn vestojn grandnombre, kiujn li ricevis rekompence por ŝuldoj post la bankroto de revu-ensemblo. Fine ja la koloroj viola kaj nigra sufiĉe bone harmonias. Ili ricevis ĉapon tre malmultekoste, nur ili devis aĉeti al tio po unu lak-valizon, ke la afero iru glate. Tiel anstataŭ tornistro ĉiu soldato portos apartan valizeton en sia maldekstra mano. Dekstraŝultre fusilo. Ĝi estas tute komforta, feroca, tamen laŭmoda. Kie estas gravurite en marmoron, ke la tornisto estas nepre necesa? Eblas, ke la tuta mondo imitos ilin, ĉar oni divenos, ke la militaro estas multe pli moviĝema kun kofro.

Sinjoro ankoraŭ zorgis pri la aĉeto de kurtonda radio sendo-ricevilo, pri medicinaj instrumentoj, pri sanitara ĉaro kaj pri la dungo de regimenta kuracisto en la persono de Jeremio Oblath. Li naskiĝis en Nederlando, kiun la instituto Pastör maldungis pro lia drinkemo en Meknes, kaj de tiam li vivis en granda malriĉeco kiel falsisto de dokumentoj. Li estis silentema, ĝentilkonduta, dika, silur-liphara homo, iomete malgaja, kion kaŭzis la ebria melenkolio de liaj kongeste ruliĝantaj okuloj, en tiu poezia, komenca stadio de la alkohola tema deliro. Li uzis tre multajn latinajn, medicinajn esprimojn, ĉar se oni oficiale malpermesis al li praktiki sian kuracistan profesion, li restis poreterne humila adoranto de Eskulapo, kaj li venis ĉi tien nur tial, ĉar li esperis, ke li povos operacii iun dumvoje.

Tiel aspektis la improvizita fremdula legio de la grafo.

2

Kiam oni sendis Polchon-on al grafo Yolland, komenciĝis la febra prepariĝo.

King Roswang, kiu estis suboficiro laŭ la pseŭdonomo Cavelotti, alvokis la oficiraron en la nomo de la soldatoj, informi ilin pri la vojdirekto kaj celo.

- La kono de la vojdirekto ne apartenas al vi – diris sinjoro Wilkie -, nia celo estas ricevi ju pli multe da mono.

- Nu tamen ni devus scii, kien ni iros! – murmuris subkaporalo Izabela per sia alda voĉo.

- La soldato – diris la marŝalo aplombe – ne demandas, sed iras! Notu bone tion. Ĝi estas granda diro.

- Ĝi estas granda idiotaĵo! – respondis la subkaporalo. – La soldato ne demandas kaj iras, se temas pri lia patrio. Sed ni estas solduloj en Afriko.

- Subkaporalo! – diris la marŝalo dure. – Se vi ankoraŭfoje forgesos la devigan estimon, mi degrados vin!

- Ja estas vere! – interrompis Kratochvill, la remburisto. – Diru al ni, kien ni iros! Tiel estas dece – kaj li kolere ŝovis sian verkatan romanon sub sian akcelon. Oni ne povas degradi lin, ĉar li estas senrangulo.

Ankaŭ la milda Renoir staris tie, kiu estis populara inter la soldatoj.

- Ni devas obei, knaboj – li diris -, vi ekscios ĝustatempe, kien ni iros.

- Alo! – kriis kapitano Durien. – Nun ni faros provon rilate la defilon. Post nelonge la komandanto estos ĉi tie, li venos akompante de leŭtenanto Polchon, kaj mi ne ŝatus honti pri vi. Oficiroj, suboficiroj kaj senranguloj vestu vin, la du tajloroj, kiuj respondecas pri la uniformoj, kaj la veturigistoj, komisiitaj pri la gardo de la ekipaĵo helpu al ili! Ĉiu povas preni eksplodajn kartoĉojn el la lignokesto, sed la razosapojn ankoraŭ ne tuŝu!

Tial li opiniis grava ĉi-lastan rimarkon, ĉar li sciis bone pri liaj homoj, ke ili ne ŝtelas fusilkuglojn.

Estis randa tumulto. Blasfemado, tie kaj ĉi tie aŭdiĝis klako de vangofrapoj.

Suboficiro Izabela en la angulo de la hangaro kaŝiĝis en la niĉo, rezervita por la akumulatoroj, kie du soldatoj gardostaris: King Roswang, kaj lia filo, la tronheredanto de la cirkodirektado, Duke of Roswang, la Diablo de la Aero. Duke of Roswang havis tian vizaĝon, kvazaŭ li estus la karikaturo de si mem. Ĝi estis tute granda, ronda kaj larĝa. Li rikanis konstante, kaj de kiam li falis de sur la trapezo en Toulouse, li idiotiĝis iomete.

Renoir estis tiel beleta kun sia malgaja, infaneca vizaĝo, kun sia maldika, knabeca staturo, kvazaŭ ia subreto, kiam ŝi devas roli en pantalono. Li elektis dudek-tridek ordenojn el lignokestego, inter aliaj grandegan, oran stelon sur blanka fono, kiun li fiksis sub la poŝo de sia kamizolo. Baldaŭ li deprenis ĝin, ĉar sinjoro Wilkie diris al li, ke la ordeno distingis iam la plej belan stalonon de la bred-konkurso en Birmingham. Fine ili ĉiuj vestis sin, kaj trovinte la proksimume plej konvenajn uniformon, ŝuojn laŭ ilia mezuro, ili kaptis siajn kofrojn kaj rapidis el la hangaro.

Nur bier-veselkapitano Flur de Bac aspektis iom strange, ĉar li ne trovis konvenan ĉapon pro lia kapo, kies grandeco estis sesdek ok centimetroj, tiel li devis porti civilan ĉapelon, ĉar oni ne povas marŝi nekovrinte la kapon sub la suno de Afriko.

Dume regiment-trumpetisto Houben, la diridento de la orkestro Keep Smiling Jazz vigle interparolis kun serĝento Bayonne, sinjoro Wilkie kaj Durien.

- Ĉu vi povas trumpeti viciĝon? – demandis la kapitano.

- Eĉ unu viciĝo ne estas en la repertuaro de la orkestro. Se nur la marŝo Radetzky… - kaj li jam ekprenis la trumpeton.

- Ne, ne! – retenis lin sinjoro Wilkie. – Ĝi ne estos bona. Vi tamen devus koni la trumpetsignalojn.

- Bedaŭrinde en la repertuaro de la orkestro Keep Smiling Jazz ne estas trompetsignaloj.

Ili staris senkonsile. Houben diris al sia kolego Jordan.

- Ĉu vi ne povas ludi ian viciĝon?

- Jes, kompreneble.

- Tiam la problemo estas solvita! – ĝojadis Wilkie.

- Mi tuj portos la akordionon. – diris Jordan -, ĉar mi estas basviolonisto kaj akordionisto. Trumpeti povas nur Houben.

- Sed ne viciĝon…

Ili denove estis senkonsilaj. Tamen ne eblas komandi viciĝon per akordiono. Nek per basviolono.

- Se vi konsentas – intermetis Houben -, eble ni povus ludi ion el la opero Aida. Tie estas multe da trumpetoj, kaj mi scias ĝin bone, ĉar ni muzikis ankaŭ dum supeo en Palermo. Alterne la operojn Aida kaj Vilhelmo Tell.

Ili povis fari nenion alian. Ili restis ĉe la opero Aida. En tiu estas bonega militista marŝo, rilate la triumfiron, kaj kiam la serĝento kriis ordone en la deponejo: „Nu kio estos! Komencu jam!” – ekstere eksonis la marŝo, kaj la kompanio, kiel unusola heroa tenoro paŝis sur la batalkampon. Renoir preterrapidis antaŭ ili kaj komandis akravoĉe:

- Alo, sinjoroj, fine jam viciĝu! Tiel ne eblas suldatumi, pro amo de Dio!

- Nu bone, - respondis Fleur Bac -, nur donu ĉapelon al mi!

- Mi ne povas buki mian rimenzonon – diris ia alia.

Ili ordigis sin en malgrandaj grupoj, blasfemante. Renoir kriadis ĉiam pli kolere: „kio estos al tiu viciĝo, mi ne havas tempon komandi al vi unu horon…”, la soldatoj respondis kolere, ke oni lasu ilin trankvile vesti sin, la opero Aida sonis, kaj timiĝinta mulo, histeria pro la okazaĵoj levis sian kapon kaj kalcitris per la malantaŭaj piedoj.

Sed fine ili staris unu apud la alia, kaj kiam la leŭtenanto preteriris antaŭ ili, subkaporalo Izabela ekgrumblis per sia alda voĉo:

- Mi esperas, ke vi nun jam estas kontenta!

- Oni konstante maceras nin – murmuretis Kratochvill, la remburisto. (Kiu verkis romanon.)

- En la vico estas malpermesate paroli! – kriis kapitano Durien kaj okulmezuris ilin.

La kamizoloj faritaj el la nigraj drapiraĵoj, kovrintaj la pordon de la funebrejo krome la katafalkojn, kaj la akrakoloraj pantalonoj aspektis iom strange.

- Kion vi pensas – li demandis mallaŭte, maltrankvile Wilkie-on.

- Nu… - li eklevis sian ŝultron. – La kompanio estas ĝis la rimenzono unuaranga funebra ceremonio, sed ĝisplande soldatoj. Fine ja ni devas diferenci… kaj… la nigra koloro… hm… Mi pensas, ke ne estos problemo.

Sed ne multe da konvinkiĝo estis sentebla el lia voĉo.

- Nu… - diris Durien post mallonga, ĝena paŭzo, ĵetante maltrankvilan rigardon sur la iom malpacience starantan kompanion. – Mi opinias, ke ni devas priparoli la komandvortojn.. Aŭ…

- La ekzercigo de la kompanio ne estas prokrastebla – daŭrigis la marŝalo aplombe.

- Ba – respondis Duke of Roswang la „Diablo de la Aero” el la vico -, kial estas necese ekzercigi nin? Diru al ni, kien ni iros, kiom ni devas interbatadi aŭ kiun ni devas kuntreni kaj fino. Ĉu mi ne pravas?

- Jes vi pravas – jesis Toutain, kiu perdis sian duonvizaĝon dum tempesta nokto.

Sinjoro Wilkie ekĝemis. Leŭtenanto Renoir gratis sian kapon, kaj la marŝalo mire rigardis al kapitano Durien, kvazaŭ li jam longe estus atendinta de li dekumi la nedisciplinitan bandon.

Kapitano Durien paŝis antaŭ la vicon rezolute.

- Soldatoj! – li komencis aplombe. – Vi dungiĝis kiel solduloj kaj devigis vin obei, batai, marŝi, labori…

- Pardonon – interrompis Fleur de Bas, la bier-veselkapitano mallaŭte, sed kategorie. – Vi tute ne temis pri laboro.

- Tio certas! – evitis Durien la rektan respondon. – Ni postulas disciplinon kaj ordon. Ni devas komandi kaj ekzercigi vin.

- Diru sincere, ĉu vi volas ludi militon – interrompis Wolfram, la lokomotivestro iom grumble.

La marŝalo nervoze, kolere frapis sur sian glavon. La kapitano ektiris sian kolunon per unu fingro, kaj leŭtenanto Renoir nervoze elspiris tra siaj tremantaj naztruoj la fumon de la cigaredo. Estis varmege, kaj kelkaj homoj grumbladis, efektive ĝis kiam ili devas staradi ĉi tie?

Ĉiu rostiĝos…

Tiam elpaŝis la sola civilulo, sinjoro Wilkie, ridetante, kun sia freŝe lavita vizaĝo, kun la sereno de sia afabla kalveco, kaj diris:

- Pardonon, ke mi miksiĝas en vian aferon kiel civilulo, sed mi informas vin, ke la ĵus aŭdita rimarko estas bona. Mi diras sincere: ni ludas militon. Sir Yollan, eterna sinjoro de Denham pagas vin tial, ke vi ludu rolon de soldatoj. Al kiu ne plaĉas tiu kondiĉo, tiu transprenu sian unutagan soldon, elstaru el la vico, malvestu sin kaj povas foriri.

Jes, ĝi estis sincera parolo!

Ili komprenis tion. Ĝi estis klara. Neniu staris flanken. Ili atendis silente.

- Sinjoro kapitano – diris fine Wilkie -, sciigu la komandvortojn!

- Mi subordigas min en ĉio al la instrukcioj de sinjoro marŝalo.

- Nu… Dio mia… Estas malfacile decidi tion – murmuris la diktatoro, palapante siajn blankajn lipharojn. – Estus plej saĝe, se leŭtenanto Renoir zorgus pri la komando.

- Mi petas vin, efektive ĝi estas la tasko de la suboficiro – rimarkis la leŭtenanto malvarmkondute.

- Tre bone! Tre bone! – diris Durien haste, kaj li jam komandis:

- Serĝento Bayonne!

La nomito elpaŝis kun modera entuziasmo.

- Nu, kio estas? – li demandis.

- Nun mi komisias vin pri la ekzercigo de la soldatoj en tagordono!

Paŭzo.

Kuntirinte la brovojn, sinjoro Wilkie atentis la grandiozan spektaklon. Malklara suspekto trafulmis lian kapon. Ĉi tie estas ia problemo. Io ne estas en ordo. Se okazos problemo, tiam la finiĝos la elpago de liaj fakturoj.

Dume la sekva interparolado okazis iom trenate.

- Mi raportas al vi – komencis la serĝento soldatece -, ke la kaporaloj povas fari la ekzercigon sub mia kontrolo.

- Vi nur ne proponu aliajn – rimarkis King Roswang gale. Li estis iu kaporalo.

- Estas egale mi petas vi – mansvingis Podvinecz malpacience. – Gravas, ke ni fine komencu tion.

- Vi pravas, sed ni ne devas hasti – admonis sian superulon la senrangulo Kratochvill el la vico.

Sinjoro Wilkie denove trovis la tempon taŭga interveni.

- Ni interkonsentu pri niaj ekskluzivaj komandvortoj, kiujn aliaj militistaj formacioj ne uzis ĝis nun. Ja ne estas bezonataj multaj esprimoj, nur „Ekiru!” „Haltu!” „Atentu!” kaj tiaĵoj.

- Unuaranga! – kriis Durien. – Ĝi estas tre saĝa ideo. Ni serĉu do konvenajn komandvortojn.

Ĉiu ekspiris. Almenaŭ la oficiroj kaj suboficiro Bayonne.

Poste relative ĉio iris rapide.

Strange, sed ili lerte elektis komandvortojn. La marŝalo demandis la soldatoj, ĉu ili povas kartludi? Ili aklame konfesis tion.

- Sed mi ne ludas – deklaris Fleur de Bac. – Tute ne temis pri laboro kaj kartludo.

- Ni ne faros tiaĵon. Mi opinias, ke la esprimoj en la kartludo estas konataj kaj mallongaj kiel komandvortoj, ja ankaŭ la krupiero tiel direktas la ludon – instruis la marŝalo la soldatojn per saĝaj vortoj.

Kial detali? Post nelonge la ekzercigo okazis, kaj kiam Dirndel ruliĝis kun la veturilo antaŭ la hangaron de Zirzin, en kiu sidis grafo Yolland en la societo de okulfrape ĉifonvestita, sed tre beleta virino, la marŝalo kriis akrevoĉe, superante ĉiun:

- Ruĵenoar!

Ili straris en streĉa kopopozicio.

- Fetvoĵoe!

Ili sammomente ekris, kaj eksonis la opero Aida.

Kiam ili pretermarŝis antaŭ la fiakro, la voĉo de la marŝalo stridis trenate super la ebenaĵo:

- Rein… Nouveauplü!

La kompanio haltis per unu ekbruo, kaj aŭdiĝos alia komandvorto, kiu signifis tion en la
lingvo de kartludistoj, ke marŝalo Podvinecz tenas ĉiun vetmonon.

- Bankuver!

Ili ĉiuj subite etendis sian manplaton super sian nazon al la viziero de sia ĉapo, kvazaŭ ili rigardus en la malprosimon. Ĝi estis la mansaluto de la soldatoj!

La grafo timiĝinte retiriĝis en la fiakron, kaj sinjoro Strudl flustris konsternite:

- Dez ganze gsindl is naris gvoan…

2

La sorto donis lecionon al sinjoro Wilkie: Kiu estas tiu virino? La virino malaperis en la hangaro kaj surprenis el sia necesujo (kiun li savis el la vrako de la aŭto) komb-negliĝon, ŝi ordigis sian hararon, pudris sian vizaĝon, poste ŝi preteriris fumante antaŭ la vico de la rikanataj soldatoj.

Dume Sir Yolland konatiĝis kun la oficiraro kaj aŭskultis la raporton de leŭtenanto Renoir, poste li interkonsiliĝis kun sinjoro Wilkie.

- Ĝi aspektas stranga societo. Ĉu vi pensas ilin taŭgaj plenumi nian entreprenon?

- Sir, iu kapitano de la fremdula legio aranĝis ĉion persone. La respondeco estas lia – li respondis diplomatie. – Sed mi opinias, ke kapitano Durien estos utila por ni, se li taŭgis al la Franca Respubliko.

- Hm… Mi ne ŝatas, se vi parolas pri mi en multenombro. Sed estas egale… Ni do ekiros ne pli ol unu horo.

- Ankaŭ vi devas surpreni uniformon, Sir.

La grafo timiĝis.

- Ĉu vi ne imagas, ke mi…

- Sir… se civilulo gvidas cent soldatojn en Saharo, tio estas iomete okulfrapa. Sed vi bezonas uniformon ankaŭ pro la aŭtoritato. Eĉ ĝis nun estis malfacile disciplini la homojn, imagu, Sir, kiom maleble estas atendi obeemon de ili, se civilulo gvidas ilin.

Konvinkinte la grafon, li kondukis lin en la hangaron, kie li montris sur belegan, blankan, sed or-pasamentitan uniformon. La grafo surprenis ĝin, sed li ne konjektis, ke la vestaĵo antaŭ nelonge apartenis al fajroestinga oficiro, kiun li uzis dum forpermeso.

Kalve kaj kun monoklo la grafo aspektis sufiĉe strange en ĝi, sed surmetinte la korkoĉapelon, la efiko estis pli favora. Nur la altkruringajn botojn li trovis iom varmaj al la dezerta ekskurso, sed fine ja li veturos per fiakro. Ĉar la fajroestingistoj ne havas glavon, sinjoro Wilkie aĉetis uzitan, maroficiran glavon kun orumita, nigra ingo, kiun oni faris en la pasinta jarcento.

Dume oni jungis la ĉevalojn antaŭ la tendajn ĉarojn. King Roswang, kaj lia familio: Duke of Roswang, kaj subkaporalo Izabela pruviĝis bonegaj specialistoj en tiu laboro. Dek jarojn ili vagadis sur ĉaro en la mondo, ĝis la kaprica Pipi manĝis parton de la spektantoj.

Kelkaj militservintaj homoj ekipis la mulojn, la mekanikisto ekfunkciigis la kirasitan aŭton kun la malvarmiga aparato. Post unu horo la kompanio estis ekironta, kaj grafoYolland, instigite de la marŝalo, faris mallongan parolon:

- Estimataj soldatoj. Vi marŝos kaj batalos por la vero de angla sinjoro. Kiu mortos aŭ invalidiĝos, tiu povas esti certa, ke mi zorgos pri li, aŭ pri liaj proksimuloj. Tial mi salutas vin ĉiujn, mi dankas vian kunlaboron, kaj mi fidas viajn gvidantojn, marŝalon Podvinecz kaj kapitanon Durien, kiuj estas viaj superuloj…

- Vivat! – kriis sinjoro Wilkie laŭte, kaj ili ĉiuj vivuis. Poste la grafo paŝis al fraŭlino Elsworth, kiu dolĉe ripozis sur minĵetilo.

- Ĉu vi ankoraŭ deziras ion de mi, fraŭlino Elsworth? Mi faros ĉion por vi, kion mi povas, sed veturi kun mi ne eblas.

Ŝi ne respondis. Ŝi fajfis sensone kaj impertinente.

Dume oni elkondukis la ĉevalon de marŝalo Podvinecz. Ili havis multe da problemo pri la bestoj. Tiuj jam kutimiĝis al la konstanta ripozo kaj malfacile volis ekiri. Precipe la mulojn oni riproĉis kaj batis longe.

- Ĉu do? – demandis la grafo. – Kion mi povas fari por vi, fraŭlino Elsworth antaŭ ol iri plu?

- Nenion, Sir – diris la virino kun moka rideto, kio ofendis Oliver Yolland-on. Asolute nenion. Mi vidas, ke la timo tute terurigis vin.

- Ĉu timo?… kiel vi komprenas tion, bonvolu diri!?

La knabino laŭte, gaje ekridis, kaj la grafo, nek li mem sciis kial, tre koleris ŝin.

- Bonvolu diri… al kio mi proprigu tiun… gemuton?

- Kara Sir Yolland, de kiam mi ekkonis vin, mi spertas nur tion, ke vi timiĝas de mi. Nu bone. Nun jam mi ne plu timigas vin. Ne timu, kara Julius Caesar, la knabino ne manĝas vin.

Kaj ŝi denove ridis laŭte. La grafo tute perdis sian paciencon. Oni mikas lin, kiel arlekenon!

- Vi intermiksas la timon kun la reteniĝemo. Mi ne havas la feliĉon koni vin, fraŭlino Elsworth aŭ Morgenstern… ĉar viaj personaj indikoj estas iom konfuzaj…

La grafo ĝustigis sian monoklon. La knabino oscedis kaj mansvingis, poste ŝi ekstaris.

- Nu, ĝis la revido, Sir, mi dankas vian afablecon, kaj mi ekiros al la dezerto piede.

Ankaŭ tio estas idiotaĵo. Kredigi al li, ke ŝi ekiros al la dezerto, piede. Sen akvo kaj manĝaĵo. Nu, bone.

- Ĉu vere. Mi ne retenos vin, fraŭlino Elsworth.

La virino kapbalancis malvarmkondute, kvazaŭ ŝi dirus adiaŭon ĉe stratkruciĝo kaj iris. Al la dezerto.

Piede!

En negliĝo, uzata al la kombado!

Ŝi faris nek dek paŝojn kaj returnis sin.

- Cetere… estas varme. Mi pensas, ke estos pli saĝe, se mi ripozos iomete. – Ŝi revenis kolere kaj denove eksidis sur la minĵetilon. Ŝi ekfumis cigaredon.

La grafo ekkompatis ŝin.

- Se vi diros sincere, kien vi volas iri, tiam mi kunveturigos vin.

- Nur ĝis la plej proksima oazo. Tion vi povas fari por mi. Neniel mi povus veturi kun vi, ĉar mi planis nur mallongan ekskurson per aŭto, mi kunportis nenion por la vojaĝo. Mi telegrafos el la plej proksima oazo al mia konato, kiu kunportos mian valizon kaj mian karavanon.

- Ĉu vi havas propran karavanon? – demandis la grafo kun sincera rekono.

- Jes. Ĉu eble vi dubas tion, kion mi diras? Ĉu mi jam mensogis al vi?

Sir Yolland ruĝiĝis kaj honteme rigardis malsupren. Sed li ne respondis. Kion li povus respondi?

Poste, kiam li iris iom malproksimen, li vidis, ke la knabino flegas siajn ungojn per malgranda raspilo…

4

Sinjoro Wilkie paŝis al la grafo kaj atentigis lin, ke la ruĝa aktujo restis negardita en la fiakro.

Ĉar Sir Yolland decidis ne lasi tion en sia valizo, sed li konstante kunportos ĝin. Tage-nokte. Precipe de kiam fariĝis evideta fakto, ke fraŭlino Elsworth veturos kun li. Ĉar en la ĉaro la virino estas pli proksime al la aktujo, sed ŝi ne povas akiri ĝin antaŭ la okuloj de la grafo.

- Vi sufiĉe rapide kaj lerte organoizis tiun strangan kompanion – rimarkis la grafo rekone. – Ni vidos dumvoje, kion ni atingos kun ili.

- Pardonon, Sir, sed ĝuste vi estas tiu, kiu ĝenerale protestas kontraŭ la pluralo. Kial vi diras: ni atingos?

- Mi pensis, ke vi ne deziras partopreni la entreprenon. Ĉu ne?

- Mi volas esti la motoro de la dentrepreno – li rispondis. – La malgranda armeo estas perfekta, sed mankas io. Ĉu vi povas imagi modernan armeon sen Intelligence Service?

- Kiel vi komprenas tion? – demandis Sir Yolland, ĵetinte esploran rigardon al la organizanto.

- Dum marŝos en Saharo, mi sidos tage-nokte senlace en la hotelo Mammunia, apud kurtonda radio sendo-ricevilo, kaj mi informos la kompanion. Mi faros observojn, akiros informojn, mi do plenumos sola la laboron de la sekreta servo, ĉar se temas pri vi, Sir, tiam mi estas senlaca.

- Dankon, sed, mi ne deziras tiom da oferoj de vi. Vi ne devas superforte labori en la hotelo. Nur venu komforte kun ni en Senegalion. Sed se vi pli volonte restus en la hotelo, mi konsentas.

- Mi pli volonte entreprenus tion…

- Mi ne povas akcepti vian komplezon. Mi povas uzi nur tiujn servojn, kies kostojn mi pagos. Kiel mi diru… mi do ne havas kovron en mia budĝeto… por tiu restado en Maroko… Mi esperas, ke vi komprenas tion, sinjoro Wilkie?

Sinjoro Wilkie komprenis tion. Li jam decidis antaŭe plenumi ian oficon en la hotelo, kio estas laciga, tamen li povos matenmanĝi en la lito. Tiu decido pli fortiĝis en li, kiam li komencis ekkoni la oficir- kaj la suboficiraron. Sed la fakturo pri la elspezoj… Ne partopreni tiun aferon estas neeble, kaj…

- Mi pensas tiel – li respondis fine -, mi sekvos vin, Sir, kvankam mi ne scias, kian rangon mi havu.

- Hm… Kio vi estis dum la milito?

Sinjoro Wilkie mallevis siajn okulojn.

- Suboficiro en la administrejo. – Li daŭrigis post ĝena paŭzo. – La rolo de la duobla librotenado estas tre grava dum milio.

- Nu bone… vi do estu rezerva… librotenisto… Mi nomumas vin…

- Ĉu vi opinius min trudiĝema, se mi demandas vin, kial venos la virino kun ni?

- Mi ja ne opinius vin trudiĝema, sed nenio senkulpigus vian scivolemon. – Li aldonis post mallonga pensado: - La virino estas fraŭlino Elsworth, al kiu okazis aŭtoakcidento, kaj ŝi maltrankvilas pri siaj familianoj. Nek mi scias pli multon pri ŝi.

Ĉefleŭtenanto Polchon paŝis al ili, kiu surprenis la lastan, restintan oficiran uniformon, kaj interese ĝi estis la pitoreska kostumo de la akriduko, rolanta en la opereto Sibilo, kompletigante la vestaĵon per la ĉapelo de pordisto.

- Bonvolu enfiakriĝi, Sir – li raportis -, ni ekiros.

- Kiel?… - li demandis mire – Kiu ordonis tion?

- Fraŭlino Elsworth – respondis la ruĝa rondbarbulo.

5

Fraŭlino Elsworth mansvingis el la fiakro kaj gaje kriis al li:

- Rapidu, Sir, ĉar ni lasos vin ĉi tie. Ni ne havas tempon atendi!

La marŝkolono jam staris. Malregule kaj senorde, sed ĝi staris. Kaj tio gravis. La soldatoj brue interparolis, kaj la ĉevaloj kelkfoje ek-ekiris kun la ĉaroj.

La serĝento vidis, ke la marŝalo levas sian glavon avane de la vico, sed neniu alia rimarkis la komandon. Bayonne rapide kriiegis laŭte.

- Alo! Oni komandis ekiron.

- Kio okazis?! Kio estas? – rapidis kelkaj interesiĝantoj tien el la vico, aŭdinte la kriegon, kaj ili ĉirkaŭis lin.

- Ĉiu iru sur sian lokon – kriegas Bayonne kolere. Kelkaj homoj reiras, sed venas aliaj interesiĝantoj anstataŭ ili, rumoro, bruo. Bayonne kriegas.

Dume iuj rimarkas la altenlevitan glavon kaj ekiras. Sed tre multaj homoj returnas sin al la fiakro, en kiu sidas la virino, tial plotono da soldatoj falas sur la teron, pro kio okazas arda interbatado.

Leŭtenanto Renoir kuradas severe, tusadas kaj kriadas:

- Kial vi ne ekiras, sinjoro senrangulo Kratochvill! Ekiru jam pro amo de Dio, ĉu vi ne aŭdas, ke oni komandis?!

Ili fine ekmarŝas post la granda tumultado, kriegado. La kompanio iras, la homoj formas malgrandajn grupojn, kaj kelkiuj komencas kanti pro soldata bonhumoro. Bedaŭrinde sen ĉiu ajn antaŭa konsento, do kiom ili estas, tiom da kantoj ili kantas. Sed la trumpetisto konstante blovas nur la operon Aida…

OKA ĈAPITRO

1

Ĉe la kilometroŝtono n-ro 200 aperis la aŭtomobilisto.

Li estis belvizaĝa, brunhaŭta viro kun angla liphararo. Li sidis sur la ŝtupo de la aŭto, legis libron, kaj termobotelo kuŝis apud li sur la tero. Li havis bluan ĉemizpantalonon, kiu estas duone vestaĵo de pilotoj, duone tiu de laboristoj, kiun portas ĝenerale la ban-gastoj. Liaj okulvitroj por aŭtistoj kaj korkoĉapelo kuŝis sur la tero, kaj estis videbla, ke li havas glate kombitan, densan, nigran hararon. La aŭto Renault, sur kies ŝtupo li sidis estis tre bela, taŭga por fari ekskursojn en Saharo.

La kompanio povas preteriri komforte la aŭton sur la bela, larĝa ŝoseo. La ŝoforo levis sian rigardon el la ĵurnalo, trinkis el la termobotelo kaj observis la kompanion. Estis infera varmego, kaj ĉirkaŭe la flava, senlima dezerto eligis multobligante la varmegon al ili. Tial la soldatoj ĵetis iomete kolerajn rigardojn al la aŭtomobilisto, komforte sidanta apud sia aŭto, kiu legas ĵurnalon en Saharo kaj trinkas malvarman akvon el la termobotelo. Li ne scias, kiel malfacila estas la vivo de la soldatoj.

- Li devus provi la legianan vivon dum unu tago – murmuris King Roswang moroze.

- Kial vi plendas? Ankaŭ vi faras tion nur unu tagon – respondis la lokomotivestro.

La aŭtisto scivoleme postrigardis ilin en la mano kun ĵurnalo, dume li fajfadis.

La fiakro tretis malantaŭ la kompanio

Tiam li jam nekredeme kapbalancas, sed li ne ĉesis fajfi. La maljunega ĉevalaĉo ritme tretis en la varmego, kaj kelkfoje ĝi svingis sian voston dekstren-maldekstren por forigi la muŝojn. Sinjoro Strudl langoklakis kaj elprenis sian vipon, ornamitan per nodoj el la leda ingo, fiksita apud la lampo.

- Hot… Diendl du olda Hex… no voat!

La juna aŭtisto balancis sian kapon deksten-maldekstren kun tia rekono, kvazaŭ li dirus tion: „Nu jes… ĝi jam estas io…”

Ekvidinte la virinon en komb-negliĝo, apud la fajroestingista oficiro, li ekridetis kaj senintence kapbalancis.

- Kiu li estas? – demandis fraŭlino Elsworth mirante.

- Mi ne scias – respondis Sir Yolland. – Mi pensis, ke li salutis vin.

La knabino scivoleme returniĝis. Iom da maltrankvilo miksiĝis en ŝian scivolemon.

- Tiu homo estas stranga – ŝi diris al la grafo. – Li tute ne surpriziĝis vidante la strangan kompanion. Li do jam sciis pri ni. Eble li delonge atentas nin, kaj nun li atendis nin. Atentu. Estu singarda.

- Hm… kial, bonvolu diri?

- Mi avertas vin – diris la knabino minace -, ke eble trompistoj provos trudiĝi al vi.

La grafo rigardis sur ŝin konstenite, kaj li ne povis respondi.

2

Poste la tragedio ekiris per rapideco de eksprestrajno. Je la kvara kaj duono Durien diris tion, ke ili faros „pranzan bivakadon”. Oni deĵetadis siajn ŝarĝojn kaj strarigis tendojn ĉie.

La fiakro haltis.

- Mi nevolis peti ĝis nun, Herr Graf – diris sinjoro Strudl al Sir Yolland -, sed mi interkonsentis kun tiu ruĝbarba, ebria korusano – li montris al Polchon -, ke ĉiu itinero estas aparte pagenda.

- Nu, sed, amiko mia… mi, mi… estas sufiĉe riĉa al tio, ke vi… do kreditu min…

- Dez könt a jeda sagn… Mi konas tiaĵon. Poste vi iras en hotelon kaj eliras tra alia oazo…

La grafo ekmeditis. Tiu ĉi homo ne konas lin. Cetere, kial li bezonus krediton de veturigisto? Ŝovinte sian manon en la poŝon, li rigardis la taksametron kaj pagis, doninte du frankojn da trinkmono.

- Dankon – diris la koĉero kaj eklevis sian ĉapelon -, ne prenu kiel ofendon, sed mi jam veturigis sinjoron de la kafejo Ring ĝis Nord-Afriko, kaj tie li fuĝis nepaginte. Mi ne ŝatus pli da trompo. Sed tio ne konsernas vian sinjoran moŝton, vi, bestaĉo, haltu do… Pardonon, sed la ĉevalo ekiris. Ŝajnas, ke ĝi estas soifa. He!… Diendl!… ferflushta Simi… Na voat du Blediant! Voat!

Li tute ne ŝvitis en sia peza pelerino kaj cilindra ĉapelo. Lia ruĝa vizaĝ ĉiam rigardis la senelekte koletkitan popolaĉon kun orgojlo de sinjoraj lakeoj, ne miksiĝinte kun ili, li sidis sur la ŝtupo de la fiakro kaj ekfumis longan, maldikan cigaron Virginia laŭ komplika maniero. Li forigis pajleron el ties mezo kaj ekbruligis ĝin, metinte la cigaron al la brulanta pajlero, poste li rapide, ŝmacante snufadis, fine li surmetis sian dratkadritan nazumon kun revema, volupta mieno, kiun li fiksis al sia supra poŝo per nigra laĉo, kaj li legis ĵurnalon.

Oni starigis tendon por la grafo, kiu invitis fraŭlinon Elsworth-on por trinki teon.

Post nelonge la tendaro estis plena de rubaĵoj, forĵetindaĵoj, paperoj kaj ladskatoloj.

Nu, ĉi tie okazis la unuan fojon, ke Fleur de Bac, la bier-veselkapitano, sentis sin febra kaj vizitis la stabkuraciston Jeremias Oblath sur la ĉaro de Ruĝa Kruco.

He! Amiĉjo stabkuracisto! Donu al mi kininon. Mi pensas, ke mia malario reaperis.

La stabkuracisto ĉirkaŭrigardis, serĉadis, poste li diris mirante:

- Hm… Kininon… ni ne havas… Ĉu eble oni ne elpakis ĝin?… Venigu la dikan vicdomprizorgiston, kiu aranĝas ĉion.

Sinjoro Wilkie venis.

- Ni ne havas kininon. Kvankam mi opinias, ke la soldatoj, kaj ankaŭ vi konstante devas preni ĝin. Sen kinino eĉ unu tago povas esti danĝera en la tropiko.

- Kial vi diras tion al mi? – diris sinjoro Wilkie akre – ĉu mi estas la stabkuracisto?

- Mi estas la stabkuracisto, sed bedaŭrinde aliuloj faris la aĉetojn – li respondis melankolie.

La afero diskoniĝis pere de Fleur de Bac, kaj la soldatoj brue kolektiĝis ĉirkaŭ la oficiroj.

- Mi petas vin! – kriis Durien aplombe – vi estas senranguloj, do silentu!

- Kiel vi pensas tion! – kriis subkaporalo Izabela – sen kinino en Afriko! Ni ĉiuj malsaniĝos post unu semajno!

Dume Sir Yolland trinkis teon kun fraŭlino Elsworth.

- Ĉu vi ne aŭdas, Sir, kiel granda bruo estas ekstere? Eble io okazis.

- Povas esti.

- Ni devus ekscii, kio.

- Kial?

Fraŭlino Elsworth ne respondis kaj elrapidis. Post kelkaj minutoj ŝi revenis. Ŝi aspektis tre ekscitita.

- Sir Yolland! Ni ne havas kininon! La soldatoj estas malkontentaj. Mi esperas, ke vi estas klarvida pri tio, kion signifas en Saharo, se tiom da homoj estas kune, sen kinino.

La grafo kirle movis la glason kun teo kaj eltrinkis ĝin.

- Jes… sinjoro Wilkie aranĝos la aferon.

- Li ne povas aranĝi la aferon en la dezerto! Pripensu, Sir, kia katastrofo ĝi estas…

- Tio certas, ke ĝi estas malagrabla. – Kaj li ĝemis. La knabino ekscitite rigardis lin.

- Mi ne komprenas vian konduton, Sir!

- Ankaŭ mi volis fari la saman rimarkon – respondis la grafo malrapide.

- Vi pravas. Tio ne koncernas min. – Kaj ŝi eksidis. Sed tuj poste ŝi denove salte leviĝis. – Ni devas fari ion, se vi volas daŭrigi la vojon.

- Eble vi pravas. Mi ne komprenas nur tion, kial vi lacigas vin? Kiam do… hm…

- Tio ne koncernas min! Bonvolu eldiri tion. Nur ofendu min! – ŝi kriis preskaŭ plorante kaj iradis tien-reen.

La grafo rigardis ŝin mirante.

Enpaŝis sinjoro Wilkie kun kapitano Durien, malantaŭ ili marŝalo Podvinecz kaj stabkuracisto Oblath. Ili tuj komencis paroli samtempe.

- Mi diris tion!… Ĝi estintus lia tasko… Vi diris nenion!… Ĉar, Sir, oni donis liston en mian manon… Sur ĝi ne estis skribite medikamentoj!… Lasu min paroli!… Tute ne temas pri tio!…

Sed ĉirkaŭ la tendo bruis la tuta kompanio.

- Silentu! – kriis fraŭlino Elsworth akre, kaj tiam fariĝis silento. – Nun temas ne pri tio, kiu estas la kulpulo, sed kion ni devas fari!

- Ĝi estas bona konstato – diris la grafo senintence.

Fleur de Bac paŝis en la tendon kun la senranga soldato Kratochvill.

- Tiel do ne eblas ludi militon – diris Kratochvill. – Ni decidis returniĝi, kaj vi estos la kulpa, se ni mansaniĝos, ni ekprocesos kontraŭ vi por ricevi kompensopagon – kaj li montris sur Oliver Yolland-on.

Oliver Yollan rigardis unue al la enpaŝintoj, poste al siaj oficiroj.

- La disciplino estas sufiĉe loza…

- Kia kondutmaniero ĝi estas?! – kriis fraŭlino Elsworth. – La senranguloj ne rajtas enpaŝi la tendon de la oficiroj tiel. Hontu kaj forportu vin! Ni decidos pri tio, kio okazu. Al kiu ne plaĉas ĉio ĉi, tiu ankoraŭ povas returniĝi.

La du soldatoj foriris grumblante. La oficiroj, Sir Yollan, kaj sinjoro Wilkie, la rezerva ĉeflibrotenisto, mire rigardis la knabinon.

- Mi gratulas! – diris fraŭlino Elsworth al Podvinecz kaj Durien. – Vi tute bone komandas. Nun bonvolu ordoni, ke iu veturu per aŭto por aĉeti kininon.

- Se estas permesate demandi – turnis sin la marŝalo al Sir Yolland -, kiel rajtas ordoni fraŭlino Elsworth ĉi tie?

- Estas egale – interrompis la knabino rapide -, ĉu gravas al vi, de kie venas la helpa mano?

- Nu, sed en militistaj demandoj rajtas decidi tiuj , mi devas eldiri tion, kiuj pasigis la plej grandan parton de sia vivo en kazernoj.

- Ba! – mansvingis fraŭlino Elsworth. – Laŭ mia opinio ĉiu povas havi bonan ideon, ĉu li loĝas en kazerno, ĉu en palaco… ĉu en korfo.

La marŝalo ĵus volis malfermi sian buŝon por diri tre aplombajn vortojn, sed lia buŝo restis mute malfermita, aŭdinte la vorton „kofro”.

Poste li denove fermis ĝin.

Baldaŭ iom malpli aplombe, sed senkompare pli ĝentile li ekparolis jene:

- Fine ja… ni vere devas akiri kininon de ie, kaj mi apenaŭ… Kiel do vi pensas tion, fraŭlino Elsworth?… Hm… Ni povas sendi iun en Ain-Sefra-on…

Sinjoro Wilkie rigardis la scenejon, kiel rabobesto, kiu konjektas kaptilon, sed li ne scias, kie ĝi estas? Lia rigardo saltis de iu ala la alia. Kofro! La hotelservisto diris, ke la marsalo estas en la „kofro”… Li do tamen ne „tie supre”… Nu, sed kiel kompreni tion?

- Vere estus plej bone elekti kelkajn fidindajn homojn – pensadis Sir Yolland, kiu kompreneble nenion rimarkis el la tuta afero.

- Mi ne kredas trovi tiun – opiniis Renoir -, ni ja konas neniun el ili, kaj kun multe da kontanta mono… hm…

- Mi do iros – diris la knabino. – Vi absolute povas fidi min.

Neniu sciis, kiu ŝi estas. Nek la grafo. Sed ŝi diris tion kun tia tono, kiu jam plurfoje riskis sian vivon por tiu ekspedicio.

- Mi pensas, estus pli bone, se mi akompanus vin – rimarkis la grafo mallaŭte.

Ili konsentis pri tio kaj elpaŝis antaŭ la tendon.

La bruantaj soldatoj rigadis al ili moroze kaj kun atendo, inter aliaj la stabkuracisto Jeremio Oblath, kiu ĝojis, ke dumtempe li povis fari mallongan prelegon pri la gravaj specoj de la mortaj kontaĝoj, aperintaj pro la manko de kinino.

- Soldatoj! – ekparolis Durien aplombe. – La oficiroj decidis unuanime, ke nlia komandanto kaj lia fianĉino iros aĉeti medikamenton.

La komandanto kaj „lia fianĉino” kunrigardis timeme, fraŭlino Elsworth fariĝis fajroruĝa, kaj la grafo deprenis sian monoklon.

- Mi petas vin… - li diris poste raŭke – fraŭlino Elsworth ne estas mia fianĉino. Ni nur akompanas ŝin al la beduenoj, kiuj tenas ŝiajn familianojn en kaptiteco…

Sed ĝi ne tro interesis la homojn.

- Sir – diris la bier-veselkaptano -, la soldatoj deziras tion, ke vi reiru kun ili por aĉeti kininon. Ni pensas, ke post la spertitaj aferoj vi perdis vian emon, kaj vi lasos nin ĉi tie en nia malesperiga situacio.

- Nu, sed mi petas vin! – konsteniĝadis Sir Yolland. – Ĉu vi ne pensas, ke mi… fuĝos?

- Sir – intervenis la marŝalo -, ne estas tiel granda stultaĵo, kion niaj bravaj soldatoj petas. Vi eble vojeraros, kaj ni staros ĉi tie, tuta fremdula legio, sen apartenanta kapitalisto.

- Ĝi estas ofenda supozo!

- Tio povas okazi al la plej gravaj militistoj – ekskuzis sin la marŝalo. – Napoleono estis bonega militestro, tamen okazis, ke li perdis parton de sia armeo ĉe Waterlo, en la nebulo, kiam estis la plej granda problemo.

- Sed ĉi tie ne estas nebulo.

- Sed estas la plej granda problemo.

Ili staradis senkonsile. Tiam eksonis hupo de aŭto, atentigante sinjoron Strudl, se li jam parkas en la mezo de la vojo, almenaŭ la koĉero ne sidu sur la ŝtupo, kaj se li jam sidas sur la ŝtupo, ne estas oportune plilongigi sin per cigaro Virginia.

La aŭtisto proksimiĝis per sia ruĝa veturilo, komforte sku-ruliĝante, kvazaŭ li sidus en gondolo.

3

Li devis bremsi subite, ĉar fraŭlino Elsworth saltis antaŭ la aŭton kun disetenditaj brakoj. La aŭtisto eklevis sian ĉapelon.

- Sinjoro! – alprolis lin la knabino – la soldatoj transiris riveron, kaj la kininprovizo malsekiĝis. Ĉu vi ne reveturus per via aŭto por kunporti kininon el Ain-Sefra en la intereso de viaj homkunuloj?

La aŭtisto mediteme rigardis la virinon.

- Mia nomo estas Joliot Guliver – li respondis poste.

Ankaŭ fraŭlino Elsworth prezentis sin.

- Anette Lorion…

Oliver Yollan, kiu staris en la proksimo, tiel eklevis sian kapon, kvazaŭ iu estus pikinta lin per trikilo el dorsdirekto.

- Ĉu vi estas parenco de universitata profesoro Peter Lorion? – demandis la nekonato respektoplene.

- Li estas mia onklo! – respondis la knabino fiere.

La soldatoj senpacience grakis kaj stampfetis.

- Do – diris la aŭtisto -, kio okazis ĉe la rivero? Ĉu la kinino falis en ĝin?

La kinino neniiĝis. Ĉu mi povas peti vin disponigi vian aŭton al la militistaro? Mi ja vidas, ke vi havas grandan pakaĵon.

Ganda pakaĵo estis fiksita al la pakaĵrako, kovrita per tendotolo.

- Ĝi ne malhelpus min en tio – respondis la fremdulo -, ke mi provizu vin per kinino el la malproksima Ai-Sefra, sed mi pensas superflua veturi al Ain-Sefra, ĉar veturante sur tiu ĉi vojo per rapideco dudek kilometroj po horo, oni povas komforte atingi la grandegan oazon Bungur. Kaj en ĉiu oazo de Afriko estas granda kvanto da kinino dank' al la instituto Pastör. Sed sinjoro kapitano certe scias tion pli bone ol mi.

Li montris sur Durien-on.

Durien ĝustigis la kolumon de sia kamizolo.

- Mi ankoraŭ ne soldatservis… en tiu ĉi parto de Afriko… Mi estis postenigita en la regiono de Kongo… kaj… Sed vere, nun venas en mian kapon, jen estas proksime Gulzur…

- Bungur…

- Jes, jes… Kompreneble Bungur…

- Ni tre dankas, sinjoro – diris la kanbino.

- Faras nenion. Ĉu mi povas servi ankoraŭ per io?

- Momente ne.

La fremdulo eklevis sian korkoĉapelon, donis gason kaj veturegis plu.

Dum kelkaj sekundoj estis ĝena silento.

- Ĉu vi ne scias, sinjoro kapitano, ke oazo sekvos sur tiu ĉi vojo? – demandis grafo Yolland.

- Kredu min, ke mi soldatservis ĉe Kongo. Kaj mi ne havis eĉ konjekton, se la oficiroj Renoir kaj Polchon, krome suboficiro Bayonne ne mencas ĝin.

- Kion mencii? – protestis Polchon. – Kiu vidas mapon ĉi tie? Mi ne konas Saharon perfekte. Kompreneble la oazo Tunguz troviĝas ĉi tie, ĉiu infano scias tion kaj…

- Bulfur – diris Bayonne -, mi multfoje depotis tie.

- Mi bedaŭras, sed mi soldatservis ĉe saharanoj en la regiono de Niger – rimarkis la ruĝa rondbarbulo kun malestima mieno, ĉar li jam estis tute ebria.

- Fine estas nenia problemo – diris la marŝalo gemute -, neniu konas ĉiun oazon de Saharo. Gravas, ke aŭrore ni havos kininon, kaj nun mi proponas marŝi plu.

Sed la humoro estis prema. Ĉiu sentis, ke io ne estas en ordo ĉi tie. Precipe sinjoro Wilkie sin detenis esprimi sian opinion, kvazaŭ forigante la pluan respondecon de si.

Bayonne komandis ekiron. Li denove kuradis kun Renoir. „Bonvolu iri… Kiomfoje ni devas komandi… Staru en la vicon… Ni ekiros, sinjoroj…” Polchon komandis kun multe pli da sukceso, ĉar li promesis batojn al la neobeantoj.

Post duonhoro ili viciĝis iel. Sir Yolland moroze rigardis la scenon. Li ne tiel imagis ĝin… Hm… Ŝajnas, ke la organizo de armeo tamen ne estas tiel facila afero.

Jam ĉi tie, komence de ilia marŝado ili ricevis gustumaĵon el la vera dezerta varmego. Kvaronhore malpleniĝis la ladboteloj, oni tumultis konstante ĉirkaŭ la akvolivera kirasaŭto, blasfemante kaj denove plenigante la ladbotelojn. Ankaŭ tio malfaciligis ilian marŝadon. La Diablo de la Aero estis malantaŭe ĉe la postgvardio, kaj post kelkaj kilometroj li flustris al la subkaporalo.

- Atentu min, panjo, tiel ni devus kunporti malgrandan maron. Ili eltrinkas ĉiun akvon.

Okazis denova interkonsiliĝo kun la oficiroj. Fine la subkaporalo anoncis:

- Ĉiu ricevos du labotelojn da akvo por la restonta parto de la marŝado. Vi ĉiuj trinkis minimume ses botelojn da akvo. – Kiu ne dividos ĝin bone, tiu soifos. Estas neeble tumulti konstante ĉirkaŭ la kirasaŭto.

Fariĝis granda bruo.

- Tiam ne konduku nin en la dezerton! Kion vi pensas? En tia varmego ni devas trinki…

Iu soldato, ĝuste Toutain, la duonvizaĝulo proksimiĝis kun sia ladbotelo.

- Kaj mi trinkos tiom, kiom mi volas – li diris kaj metis sian ladbotelon antaŭ la Diablon de la Aero. Ĉar tiu ne estis sufiĉe fervora, li kaptis lian gorĝon. – Plenigu ĝin, vi, volovan-vizaĝa, ĉar mi diserigos vin! – li kriegis, kaj liaj grandegaj muskoloj pufiĝis.

Subkaporalo Izabela kun rapideco de timzorga patrino kaptis la gorĝon de Toutain, kaj vangofrapis lin je lia duonvizaĝo tiel, ke la ladbotelo de la senrangulo forflugis, kaj li glitis dek metrojn surventre.

Dume Yolland kaj la knabino silentis en la fiakro. La grafo rimarkis nur post longa tempo.

- Ĉu vi havas tian nomon, kiun ni povus uzi senĝene kaj longatempe?

- Estas superflue. Ni neniel restos kune longatempe. Ĝis aŭroro ankoraŭ uzu tiun mian nomon, kiu plaĉas al vi.

La subiranta suno ardis per kvindek celsiusgrada varmego. Ŝi ne estas malforta virino, se ŝi eltenas tion, pensis la grafo.

- Cetere – daŭrigis la knabino -, mia vera nomo estas Elsworth, sed mi ne povis diri ĝin al tiu fremda aŭtisto, kiam li renkontis min en societo de cent soldatoj. Vi povas kompreni tion, Sir. Tial mi devis diri pseŭdonomon.

Ĝi estis la unua logika kaj akceptebla klarigo, kion li aŭdis de la knabino ĝis nun.

- Cetere, Sir, nomu min Anna. Tiu nomo estas certa.

- Jes. Vi persistis apud tio. Bedaŭrinde ĉe ni angloj, oni kutimas nomi la virinojn laŭ la baptonomo en motovita okazo.

- Ĉu tio ne estas sufiĉe da motivo, ke la tuta mondo kredu min via fianĉino?

- Ĉu la tuta mondo?!

- Mi petas vin… nur ne protestu. Mi neniel edziniĝus al vi, ĝi do havas nur principan gravecon. Kaj cetere niaj vojoj disiĝos aŭrore. Mi atendos mian pakaĵon en Bungur, kaj vi iros plu, sed mi diras al vi, se tiel gravas por vi, ke mia vera nomo estas fraŭlino Elsworth. Mi elpensi la nomon Anette Lorion tie, ĉar mi sentis min kompromita.

Vesperiĝis. Sinjoro Strudl demetis sian grizan cilindran ĉapon kaj viŝis sian frunton per granda, kvadratita tuko.

- Him! Sakrament noamol! Is dez aba a hicc… Hot… Haaa ha, Diendl. Du as… Da Teifl sol di holn!

La maljuna ĉevalaĉo ŝvitegis, sed tiuj kadukaj, skeletaj ĉevaloj, taŭgas por fari el ili plandumojn, ofte ili multe pli eltenas ol la plej fortaj jun-ĉevaloj. Ilia rusta organismo kontraŭstaras la morton. Iafoje kelkaj malpuraj, blindaj, dezertaj hundoj transvivas la bataleman, araban tribon, kiam ĝi lamante, tusante kun elstrantaj ripoj vagas trae-retrae en la dezerto…

- Mi nur tion ne komprenas, kial ne vi gvidas la roton?

- Kiel?

- Mi maltrankvilas pri vi. Ne estas disciplino kaj ordo ĉi tie. Ĉiu ja faras tion al vi, kion ili volas…

- Bedaŭrinde… li kapjesis al la knabino vigle. – Ankaŭ mi mem rimarkis tion. Sed kion mi povas fari? Se iu diras tion, ke oni rabis ŝian patron, kaj ŝi staras en ununura negliĝo, nomata emprime ĉe la komenco de Saharo…

- Temas ne pri mi. Sed pri la armeo. Ĉu vi ne rimarkas, ke la oficiroj estas senpovaj? Tiel vi povas havi nur problemon en Saharo. Ankaŭ por disciplinitaj soldatoj estas malfacile marŝi en la dezerto.

- Mi dankas, ke vi tiel entuziasme interesiĝas. Kvankam mi ne scias per kio elmeritis tion.

- Vi savis mian vivon! – kriis la knabino ravite, kaj la grafo tiriĝis en la angulon de la fiakro timiĝinte.

- Ba… - li balbutĉis.

- La suno estus morte bruliginta min en la dezerto, kaj mi estus sola ĉi tie, kie ĉiumomente povus manĝi min la leonoj kaj tigroj.

- En Afriko ne estas tigroj.

- Tamen ili povas manĝi min!

- Jes… tiuj povas manĝi vin.

- Jen vidu. Vi ĉiam volas nur diskuti… vi refutas iun vian vorton per la alia – ŝi eksplodis plendante.

- Ĉu mi? – miregis la grafo.

- Atentu min, Sir Yolland – daŭrigis la knabino rapide. – Se vi ne povas teni fortamane la gvidadon, tiam estos problemo. Ŝajnas, ke viaj oficiroj ne konas tiun ĉi regionon, kaj ili estas malfortamanaj.

- Se ni do ne havas rimedon por disciplini…

- Ba. Vi bone konas Napoleonon! Oni penetris kun fero kaj pano ĝis Ĉinio!

La grafo ne respondis tion, nur malbonhumore purigis sian monoklon…

NAŬA ĈAPITRO

1

La suno subiris. La marŝalo ekkriis post kvar kaj duonhora laciga marŝado:

- Rein ne va plus!

Ili deprenis la tendotolojn de sur la sur la ĉaroj, sed ili renversis lignokeston, el kiu falis revolveroj, gasmaskoj kaj rakedoj.

- Mi petas vin – raportis Renoir al Yolland -, ni devus forĵeti la rakedojn, ĉar ili estas pezaj, kaj antaŭvideble ni ne bezonos tiujn.

- Hm… nek originale tiuj estis bezontaj sinjoro Wilkie – li turnis sin al la organizanto, starante en lia proksimo -, kiel mi opiniu pri tiuj sportiloj?

- Mi devis pensi… pri kelkaj plaĉaspektaj objektoj… se eble ni ŝakros kun la indiĝenoj…

- Kial vi volas ŝakri kun la indiĝenoj?

- Sperta vojaĝanto en Afriko konsilis tion.

- Nu, bone – diris la grafo - , mi estas scivola, kion donos la njam-njam-oj por la rakedoj. Ni do ekbivaku… Mi pensas, ke kvar hora dormado sufiĉos…

- Apenaŭ – rimarkis senranga soldato Kratochvill, staranta en ilia proksimo, kiu verkas romanon. Tutan tagon vagaĉi, kaj dormi nur kvar horojn?

La grafo staris antaŭ lin kaj ĝustigis sian monoklon.

- Ĉu… vi… vere pensas tion, ke vi povas kontraŭdiri al mi? Vi estas flavbekulo! Se io ne plaĉas, vi povas returniĝi, aŭ eble eĉ kontraŭstari!

- Sed mi…

- Obeu… aŭ forporotu vin. Sciu, kiu ne kondutas disciplinite, tiu povas foriri! Mi dungis soldatojn, kaj ne pajacojn!

Kaj li lasis ilin tie. Interese, sed neniu ekparolis. Ili nek grumblis. Nur Fleur de Bac diris al Kratochvill:

- Vi, kolego, ĉiam buŝaĉas. Iam mi metos mian manplaton sur ĝin.

Kratochvill diris nenion, ĉar la bier-veselkapitano antaŭ duonhoro levis la malantaŭan parton de la plenŝarĝita ĉaro kaj tenis ĝin dek minutojn tiel, dum oni reĝustigis la nabon. Kion respondi al tiulo? Al kultur-soldato?! Kiu verkas romanon!

- Brave! – diris la knabino ĝoje al Yolland – vera sinjoro devas konduti tiel. Nur parolu kun ili kriegante, Sir…

2

Sed vespere okazis serioza problemo. Post la sunsubiro la supra galcimalvarma aerotavolo subite ŝanĝis lokon kun la rapide kuntiriĝinta varma aero. La loza, flavas polvo de la dezerto reradiis dum minutoj la ensorbitan varmon, kaj la termometro unue montris plus dek kvar celsiusgradojn, baldaŭ dum momentoj la temperaturo sinkis ĝis naŭ gradoj kaj je la deka horo vespere ĝi montris nulon.

Estis frostiga malvarmo. La grafo kuiris teon en sia tendo, kiu staris apud tiu de la knabino.

Aŭdiĝis granda bruo. Durien enpaŝis pale. Tumultante sekvis lin la marŝalo, Bayonne, Renoir kaj kaporalo Cavelott, krome King Roswang.

Aŭdiĝis granda bruo. Durien elpaŝis pala. Tumultante sekvis lin la marŝalo, Bayonne, Renon kaj kaporalo Cavelotti, krome King Roswang.

- Sir – balbutaĉis Durien -, ĝi estas fatala…

Groba kriado aŭdiĝis ekstere. Ĝi estis serioza, ribela, minaca bruego.

La knabino demandis pale:

- Kio okazis?

- Ĉu eble vi forgesis doni vespermanĝon? – demandis la grafo moke.

- Ĝi estas pli malbona – kriis Bayonne -, ni ne havas plejdojn! Vi devigas la soldatojn uzi aŭtomatan razilon kaj naztukon, sed ni ne havas eĉ unu plejdo.

- Bonvolu venigi sinjoron Wilkie – ekstaris la grafo.

- Jam ankaŭ ni serĉis lin – siblis la marŝalo. – Sinjoro Wilkie malaperis…

Ankoraŭ komence de la skandalo sinjoro Wilkie iris al sinjoro Strudl kaj demandis, ĉu nokte, dum la fiakro staras, por kiom da mono li permesus al li esti dorm-gasto en la veturilo. La koĉero respondis, ke li ne rajtas marĉandi, ĉar laŭ la preskriboj de la polico en Vieno estas severe malpermesite veturigi klienton kun hisita flago, kaj se la fiakro staras kun pasaĝero, ĝi estas tia, kvazaŭ li transportus lin al la Burgo. Kaj li mallevis la flagon.

Sinjoro Wilkie akceptis la oficialan tarifon, li sidis sub la levitan ombrelon, estingis la lampon de la fiakro, kaj poste, kiam sinjoro Strudl ekdormis sur la tero, ĉirkaŭvindinte sin per plejdoj, Wilkie deprenis la kovrilon de sur la ĉevalo Dirndel kaj kovris sin per ĝi. Tial oni ne trovis lin. Kiu estus konjektinta, ke li dormas per averaĝa rapideco, dek kilometroj po horo, pagante kvardek kvin filerojn laŭ la tarifo n-ro du?

- Mi petas vin! – diris la grafo al la oficiroj – vi agis tre malzorgeme. Organizi ekspedicion konsekvencas respondecon.

Estis frostiga malvarmo. La pujno kovris la maldense kreskintajn timianojn.

- La aĉeto de la plejdoj ne mia tasko estis, Sir – diris la marŝalo.

- Min koncernis nur la aĉeto de la milit-ekopaĵoj – deklaris Durien kategorie. – La plejdoj ne apartenas al ĝi. – Ili ĉiuj kulpigis Wilkie-on, utiligante lian foreston.

La grabo elpaŝis el sia tendo. La soldatoj ĉirkaŭstaris lin kun minaca bruo. Tio ne estis ŝerco. Nokte en la dezerto cent homoj sen kovriloj.

- Friponaĵo… Senhomeco… Hontu… - flugadis la minacaj krioj.

- Bonvolu aŭskulti min… Tiel ne eblas…

- Ni ne aŭskultos vin – kriis subkaporalo -, iu soldato jam tusas! – kiu montris al Duke of Roswang, kun tremanta mano de timzorga patrino. – Ĝi estas friponaĵo!

La oficiroj staris pale. Toutain svingis ferstangon en la mano, eĉ leŭtenanto Polchon estis ĉe la flanko de la soldatoj kaj sovaĝe skuis la glavon de la arkiduko el la opereto Sibilo.

La grafo staris tiel malvarmkondute inter siaj oficiroj, kvazaŭ li atendus aŭtobuson. Li deprenis sian monoklon kaj purigadis ĝin. Poste li diris per iom raŭka voĉo:

- Tiel ne eblas interkonsiliĝi!

Polchon saltis antaŭ lin.

- Kial vi volas interkonsiliĝi?! Mi rakontos ĉion! Ili deziras akiri monon, aĉetinte rakedojn, gumajn gantojn kaj sekurajn pinglojn…

Komenciĝis ĝenerala kriado. La gvidantoj staris palae. Sir Yolland elprenis sian revolveron kaj diris al la rondbarbulo:

- Ripetu, kion vi rakontis.

Polchon vere ne estis malkuraĝa homo, sed spite al la mallaŭta, preskaŭ flustra voĉo de la grafo, li ripetis nenion.

- Bonvolu kredi, ke mi asertis nur tion…

- Vi diris ion kontraŭ la oficiroj.

- La oficiroj – murmuretis la ĉefleŭtenanto kun profunda malestimo. – Ili estas tiaj oficiroj, kiel mi.

- Li ne povintus diri pli grandan ofendon.

La situacio fariĝis ĉiam pli minaca.

En Afriko la temperaturo fluktuas inter minus ok kaj plus kvardek kvin celsiusgradoj, samkiel la humoro de la homoj. Kelkiuj jam tumultis ĉirkaŭ la alkoholaĵ-depona ĉaro…

Sed el la proksimo, kie sole flagranta fajro brulis, subite sonoranta voĉo interrompis la bruon de la ribelantoj:

- Alo! Knaboj! Kiu deziras trinki teon!?

3

Akvo bolis en kardrono super la fajro, apud la akvo staris Anna (nun jam nur ŝia baptonomo estis certa), kaj ŝi tenis grandegan ladskatolon en sia mano, plenan de speciale bongusta, verda teo de la grafo. Kontraŭ la malvarmo ŝi surprenis la kamlotan raglanon de Sir Yollan, kio faris ŝin eksterordinare ĉarma.

Dum decidaj okazaĵoj subita kaj gaja epizodo ofte surprizige solvas la bolantajn pasiojn. La kvieta, gaja voĉo, la ridetanta virino en la lumo de la fajro kaj la penso pri la teo efikis trankvilige.

Verŝiĝis la multaj, sekaj, verdaj folietoj en la kaldronon, kaj sekvis ĝin botelo da rumo. Bonega odoro ŝvebis post nelonge en la frostiga, dezerta nokto. La soldatoj unue malemikeme, tumultante ĉirkaŭstaris la kaldronon, kiel ili ariĝis tie frostotremante, sed ĉiu laŭte ridaĉis pri la gemutaj ŝercoj de la knabino, el kiuj la plej bona estis tiu, kiam ŝi ekpuŝis Toutain-on je la brusto, ĉar li ege klopodis antaŭeniri, kaj li falis dorsen tra tendotolo, kuŝanta malantaŭ li. Post iom da tempo ilia korpo kaj animo komencis varmiĝi pro la teo.

- Portu viajn gamelojn ĉi tien! Rapide, knaboj!

Ŝi porciigis la teon unu post la alia, dume ŝi mokadis kun ĉiu.

La teo valoras kovrilon, kiu estas afektema kaj malvarmas, al tiu mi pruntedonos mian plejdon, ĉar malforta virino eltenas iel unu nokton eĉ se estas malvarme.

Remetinte la teon, ŝi ekvidis kelkajn muzikilojn sur la pakaĵ-ĉaro. Tiuj apartenis al la orkestro Keep Smiling Jazz. Tiel okazis, ke la knabino post nelonge sidis apud la fajro, zumkantis negran lulkanton kaj akompanis sin sur banĝo.

La soldatoj aŭskultis ŝin kun brilaj okuloj. Eĉ sinjoro Strudl, kiu sentis sin aristokrato rilate la plimulton de la kompanio, kaj li sidis sur la ŝtupo de la fiakro en sia orgojla soleco; mi rimarkas, ke ankaŭ sinjoro Strudl surmetis sian nazumon por pli bone vidi la okazaĵojn, kaj viŝinte sian betoruĝan frunton, li rekone kapbalancis:

- So a Holdes Frauncima… Dez iz gemütli…

Ili akceptis la kanton kun granda ovacio, kaj poste ankaŭ la regiment-trumpetisto sur la pistono kaj lia kunulo sur akordiono aliĝis al la ĥoro de la ribeluloj! Nur Sir Yolland rigardis la scenon kun moroza vizaĝo el la malproksimo…

DEKA ĈAPITRO

1

Aŭrore la kompanio ekmarŝis tramalvarmiĝinta ĝisoste kun rigidaj membroj. La knabino sidis apud la grafon, la fiakro ekveturis post la soldatojn, kaj ŝi tiriĝinte en la angulon preskaŭ malaperis sub la manteloj. La suno malrapide leviĝis, kaj en la vekiĝantaj radioj miliardoj da prujneroj scintilis ĉirkaŭe.

Sir Yolland arde riproĉis la knabinon. Nek la danĝeron de la ribelo li pensis akceptebla kaŭzo, ke angla damo kondutu tiel. Sidi inter la soldatojn kaj kanti! Kuiri teon kaj puŝi je la brusto la tumultantojn! Mi petas vin! Kiu aŭdis tiaĵon!

- Vi devas konsideri… ke vi maldece… Kvankam tio ne koncernas min, sed ĉar vi veturas en mia societo, mi pensas, ke mi rajtas…

- Li ĉesis paroli, ĉar fraŭlino Anna ekdormis.

Dume ekscitita interkonsiliĝo okazis inter la gvidantoj, marŝantaj avane. Ĉar intertempe retroviĝis ankaŭ sinjoro Wilkie, kiun forte riproĉis la gvidantoj de la kompanio.

- Mi aĉetis ĉion, kio estis bezonata. Mi ne estas soldato – li defendis sin energie.

- Sinjoro kapitano Durien listigis la aĉetotajn ekipaĵojn! – kriis la marŝalo kolere.

- Mi petas vin. Ne konsideru min pekoporta kapro. Serĝento sufiĉas aĉeti kovrilojn.

- Jes, serĝento sufiĉas – kapjesis ankaŭ sinjoro Wilkie, meditante pri io.

- Mi estas sperta pri la milit-taktiko! – kriis akre la marŝalo.

- Kaj mi pri la komandi de la soldatoj!

- Tamen estas bezonata serĝento – deklaris sinjoro Wilkie. – Vi estas bonegaj taktikistoj kaj unurangaj organizantoj, sed ni bezonas homon, kiu estas sperta pri io.

Ili mire rigardis sur la anglon.

- Jes, sinjoroj – li finis la meditadon. – Nun ni ankoraŭ ne ekspliku la aferojn. Eblas, ke ni ne devas sterni niajn kartojn. Tio estas nia intereso, sed se ankoraŭ okazos io, tiam ni triope devas sincere paroli unu kun la alia. Ĉu vi komprenas? Ĝi ne estos ŝerco.

Kaj eĉ respondon neatendinte, li lasis ilin tie.

Dume ekbrilis la suno, kaj komenciĝis la varmego.

La knabino vekiĝis, demetis sian mantelon kaj turnis sin al la grafo.

- Ĵus kvazaŭ vi estus dirinta ion, kaj mi opinias, ke mi ne respondis.

- Jes. Unue vi dormis antaŭ ol respondi… kara, kara… Hm… ni devus interkonsenti pri iu nomo.

- Mi jam diris, ke Elsworth estas mia vera nomo!

- Ĉu vere? Bone. Ni estas en kriza stato, ni devas akcepti ĝin, mi diris nur tion, ke…

- Ke vi ne estas kontenta pri mia konduto. Sed tio ne interesas min. Via konduto estas multe pli stranga!

- Kiel?

- Vi bone aŭdis tion! Mi scias tiel, ke vi, Sir, estas ido de tiuj Yolland-oj, kiuj estis la unuaj konkerantoj de la kolonioj, kaj grafo Robert Yolland forpelis la hispanoj per sia ŝiparo de sur kelkaj mez-amerikaj insuloj, kie li estis ankaŭ reĝo dum mallonga tempo! Tiu sinjoro gvidis sian armeon veturante per galero, kaj ne per fiakro, tiu sinjoro ne akceptis tion, ke onidiraj oficiroj ordonu, kaj li ne aprobis ĉiun idiotaĵon.

La grafo rigardis miregante. De kie ŝi konas la historion de lia familio? Kaj hazarde ŝi trafis lian tiklan punkton. Sir Yolland tre estimis siajn konkerajn praulojn, kiuj gvidis armeojn, kaj fondis dominiojn. Eble li sentis iomete tiel, ke ankaŭ li naskiĝis por fari tion, kaj en lia nuna entrepreno multe da forgesita megalomanio serĉis eliron el lia eso. Proksime al sia kvardeka jaro, la grafo kelkfoje sentis tiel, ke li disipis la animan heredaĵon de la prauloj, kaj pasas la tempo, kaj ne estas inde morti sen tio, ke li estus fondinta eĉ unu dominion.

- Ĝis nun – li respondis orgojle al la knabino – la situacio ne bezonis, ke mi transprenu la komandon. Kovriloj kaj kinino… Tiuj ne interesas min.

- Vi estas ridinda kun tiu opinio – respondis la knabino per tiu nervoza, malestima voĉo, kaj ĉiu sango de la grafo leviĝis en la kapon pro kolero. – La ekipaĵo estas grava en la milit-taktiko.

Ili longe silentis, ĉar la grafo ne volis sincere eldiri, ke la multe da malklaraj indikoj estas iomete komplikaj por li, kiujn li eksciis ĝis nun pri la familio de la knabino.

- Kaj kien vi iros el la oazo Bungur? – li demandis fine de fraŭlino Elsworth.

- Tio vere ne estas via problemo, Sir. Prefere zorgu pri tio, kio okazos al la soldatoj sen mi? Ĉar mi gvidis ilin ĝis nun.

La grafo glutis. Sendube, tiu knabino dufoje intervenis tute bone.

- Eble ankaŭ ni mem atingos nian celon iel – li diris fine kaj purigadis sian monoklon. – Kompreneble mi estos je via dispono en ĉio, se vi deziras ion.

- Dankon. Mia pakaĵo alvenos en Bungru-on, kaj mi vere ne bezonos vian helpon. Mi luos karavanon.

Poste ili silentis. Antaŭ ili en grandega polvonubo senorde tumultante iris homoj, bestoj, ĉaroj, kirasita aŭto kun infera bruo, kiel retiriĝanta, venkita armeo.

En la malproksimo aperis la unuaj arboj de oazo Bungur…

2

Tiu oazo estis malpura, malgranda loko. Kelkaj palmoj, unu-du kaproj, dudek-tridek plie altaĝaj tuaregoj vivis tie, meze de la varmega polvo-maro de Saharo, en sufoka oazo, plenplena de muŝoj, insektoj.

Ĉefleŭtenanto Renior eltiris sian glavon kaj kriis soldatece:

- Alo! Ni haltu! Mi komandis, mi petas vin! Nu kio estos? He, ne surveturu min per tiu ĉaro!

Ili komencis halti. Ĉar ili haltis ne samtempe. Unue ili nur „komencis" la halton, tiun longdaŭran manovron tiel, ke avane kelkaj homoj aŭdis la krion, kaj ili ekhaltis, sed la aliaj ne aŭdis tion, kaj ili stumble puŝiĝis al la antaŭe marŝantoj, implikiĝinte kun ili, fine la kolumno haltis kiel interbatadanta, kverelanta homamaso.

Tiam ili haltis.

La marŝalo rajdis al la fiakro, kaj diris al la grafo, ke li veturigu sin en la oazon gvidante la kompanion, kiel la komandanto de la armeo.

Sinjoro Strudl do kun Diendl veturis antaŭen, la pistonisto komencis blovis vere bonegan marŝon, kaj kiu scius tion en oazo, ke ĝi estas el la kvadrilo de la opero Maskobalo? Kaj komenciĝis la enmarŝo.

Maljunega arabo, kiu havis longan, blankan barbon venis antaŭ ilin kliniĝadante. La tuta loĝantaro de la vilaĝo, kelkaj kaproj, multaj hundoj kaj tri nudaj infanoj sekvis lin el granda distanco.

La maljunega arabo proksimiĝis al la oficiro humile. Sir Yolland nun la unuan fojon sentis, kion signifas la vorto: „potenco". Nek li mem sciis, kial li ruĝiĝas, kaj kio estas tiu agrabla sento, kiam sidante en la fiakro li aŭskultas la nekompreneblan paroladon de la arabo.

Eble la indiĝenoj de Mez-Ameriko akceptis iun lian praulon tiel, kiu gvidis sian armeon.

La popolo de la oazo ne entuziasmiĝis por la uniformuloj. Subite ili venas kolekti imposton, kaj kunportas la homojn labori, aŭ ili elhakas la arbojn kaj konstruas fortikaĵon…

La grafo ĵetis kelkajn frankojn al la plejaĝulo de la vilaĝo, kaj la fiakro ruliĝis plu. Ili enmarŝis en la oazon. Tie estis kelkaj domoj el abodo, unu trivita-trouzita poŝtoficejo, stalforma kabano, tiel nomata „gastejo", kiu en ĉiu dua monato provizas unu-du travojaĝantojn per insektaĉoj por longa tempo. Kiu venas ĉi tien? Komercistoj, kiuj veturas al Maroko, kelkaj militstaj transportoj, ia kolportisto, kiu vagas de tribo al tribo, kaj iafoje leon-ĉasistoj, kiuj kunportas bonstaton kaj donas abundan trinkmonon.

Sed hodiaŭ estas grava tago kun grandega fremdultrafiko. Ĉar malgranda, ruĝa ekskurs-aŭto staras antaŭ la gastejo, farita el abodo. Ili denove atingis la aŭtiston!

La soldatoj senorde starigas tendojn, eksidas, kuiras, ili ne maljungas la trolaciĝintaj ĉevalojn, ili do bivakas laŭ la maniero, neniam vidita.

- Pardonon – diras sinjoro Strudl takte, post kiam li fiksis la flagon, ke la fiakro estas libera. – Mi ankoraŭ ne ricevis la prezon de la veturigo…

La grafo ŝovas sian manon en la poŝon kaj pagas senvorte. La koĉero eklevas sian ĉapelon, kaj ankaŭ li enpaŝas en la drinkejon malantaŭ sian pasaĝero.

Unusola tablo estas ĉi tie kun la apartenanta, longa benko, krome oni povas sidi nur sur mato surtere. La aŭtisto ĵus legas. Nun li ekstaras kaj klinas sin kun ĝentila rideto. Ankaŭ nun li portas la bluan ĉemizpantalonon, sur lia pojno estas ora brakhorloĝo.

- Sir – diras la knabino -, mi prezentas al vi sinjoron Guliver, kiu lastafoje estis via bonega konsilisto. Vi nomiĝas tiel, ĉu ne?

- Juliot Guliver, mi estas je via servo.

- Mi ĝojas – diras la grafo. – Mi dankas vian bonan konsilon. Sed kien mi devas eksidi ĉi tie?

- Jes, vi devas toleri mian societon, ĉar tiuj grand-restoracioj de la oazoj ne kutimas havas tiel multajn gastoj, kiel en metropoloj.

Ili eksidis sur la longa benko. Sinjoro Strudl staris iom malproksime, ĉe la fenestro kaj apogis sian vipon al la muro. Li mendis duon litron da ruĝa vino. Li trinkadis tie silente.

Sinjoro Guliver ne havis trudiĝeman naturon, li absorbiĝis en la legado de sia libro, li ne ĝenis la du gastojn. Post nelonge venis ankaŭ la marŝalo, akompanate de Durien kaj Renoir. Ankaŭ ili konatiĝis kun la junulo kaj la granda benko pleniĝis de iu fino ĝis la alia, kiel en stacidoma atendejo. La gastejestro povis kredenci nur riĝan vinon. Neniu kuraĝis mendi alian trinkaĵon. Iu soldato enportis la manĝaĵon por ili.

Sinjoro Wilkie aperis en la ejo.

- Mi petas vin, vere estas kinino ĉi tie, la poŝtoficejo deponas ĝin en ia subtera kaverno, kaj ni tuj surĉarigos ĝin. Sed kovriloj kaj ĝenerale kelkaj necesajn artikloj ne estas aĉeteblaj.

Ili sidis moroze.

- Tamen – diris la grafo kaj ekfumis cigaron – alvenas travojaĝantoj ĉi tien, kaj oni devus vendi tiel simplajn artiklojn.

- Ili havas nenion.

- Sed ni bezonas kovrilojn! – diris la knabino aplombe.

La oficiroj fikse rigardis antaŭ sin malesperiĝinte.

- Mi pensas – diris leŭtenanto Renoir -, ni tamen devas atendi iun, kiu veturos al Ain-Sefra.

Nun okazis surpriza afero. La knabino turnis sin al sinjoro Guliver:

- Ĉu vi ne havas ian bonan konsilon?

La junulo demetis sian libron.

- La afero estas tute simpla. Komisiu min aĉeti kovrilojn, diru al mi, kiom vi bezonas, kaj post kvin minutoj tiuj estos je via dipono.

- Interese – rimarkis la grafo -, ni estus tre dankemaj al vi, se vi povus akiri cent kvindek kovrilĵjn, se mi ne kredas…

La junulo eliris ridetante. Li havis sanajn, grandajn, blankajn dentojn. La knabino postrigardis lin kuntirinte siajn brovojn.

Li akiros kovrilojn – ŝi diris kun kovinkiĝo.

- De kie vi pensas tion? – demandis la grafo.

- Mi ne scias. Sed li estas tia, ke li akiros tiujn.

La grafo iom post iom akceptis, ke fraŭlino Elsworth (?) iafoje estas enigma, kaprica kaj vulgara.

Sed nun ŝi antaŭdiris bone. Sinjoro Guliver revenis post kvin minutoj.

- Oni jam suĉarigas la kovrilojn – li diris. – Ties kvalito ne estas sufiĉe bona. Tiuj estas taŭgaj por paŝtistoj. Oni havis nur cent kvar kovrilojn en la deponejo, ĉar ili estas malriĉaj je varoj. Oni vendis sian unujaran stokon.

Ili mire rigardis la aŭtiston.

- Ĉu ia… sekreto?… - demandis la grafo kun trudita rideto, ĉar li malamis ĉiuspecan scivoladon – se ĝi ne estas sekreto, tiam vi povas diri, kiel vi akiris tiujn?

- Simple. Mi petis kovrilojn kaj ili donis.

- Kial ili ne donis al ni?

- Ĉar la soldatoj ofte pagas per armea pagbileto, kio estas bona mono, sed oni devas iri al la plej proksima batalion-komandejo kun ĝi. La indiĝenoj ne ŝatas tion, se ili do vidas uniformulojn, ili nee respondas je ĉio. Sed mi elprenis monon, kaj mi estas civilulo, ili feliĉe vendis sian stokon, eĉ, laŭ ili Alaho sendis min, ke mi prosperigis ilin per la altvalora aĉeto.

La oficiroj kliniĝis super la manĝaĵon fervore. Sinjoro Wilkie eliris hontigite, kaj la grafo longe rigardis sian cigaron.

- Ĉu la indiĝenoj ne estas tiaj apud Kongo, sinjoro Durien? – demandis la knabino iom gale. Sed antaŭ ol la kapitano povintus respondi, nudpieda, araba infano envenis.

- Jam de tagoj alvenis letero por fraŭlino Anette Lorien – kaj li enportis ĝin.

- Mi estas tiu! – la knabino transprenis la leteron, kaj kiam ŝi vidis la konsternitan vizaĝon de la grafo, ŝi aldonis nervoze: Mi diris al vi, Sir, ke ĝi estas mia vera nomo! Elsworth estas nur alprenita nomo.

La grafo mallevis siajn okulojn kaj ruĝiĝis profunde.

La knabino komencis legi la leteron. Ekstere la kantado de la soldatoj rompis la silenton de la oazo. Ili aĉetis kelkajn barelojn da araba brando por bagatela sumo, kaj nun ili havis tre bonan humoron.

- Ankoraŭ alia letero alvenis por instruistino.

- Ŝi ne estas inter ni, mi pensas – diris la grafo.

- Ankaŭ mi diris tion, tamen mi devis demandi. Ĝi estas regulo.

Antaŭ ol la knabo estus foririnta, sinjoro Guliver demandis lin.

- Kiel nomiĝas tiu instruistino?

La arabo alfabetumis la skribon:

- Prof. Olivia Holland…

Nun jam ili prenis la koverton de li, sur kiu estis skribite per iom malfacile legebla skribo de sekretario sinjoro Pidgin: *Grafo Oliver Yolland.*

- Tiu letero… estas adresita al mi – diris la grafo.

- Ĉu vi estas instruistino? Prof. Olivia?…

Li ne ricevis respondon, tiel li ĉirkaŭrigardis murmuratnte kaj foriris, pensante, ke eble okazos problemo, ĉar li transdonis la leteron de virino al alia homo. Tenante la leteron en la mano, Sir Yolland sentis tiel, ke tiu netolerebla societa vivo, tiu eterna kunesto… kun tiaj vulgaraj homoj tre suferigas lin.

Poste li malfermis la koverton, kiu karakterizis la paseon de sekretario Pidgin, pasigitan en la urbodomo:

Sir!

Post via foriro la bursaj kuzoj estis favoraj por ni. Sakevan tagon vizitis min sinjoro en la hotelo, kiun Vi jam delonge ne bonvolas koni; nome petrolesploristo Livingstone. Li malafable diris al mi, ke oni planas fian kaptilon kontraŭ vi, kaj li vizitis min nur tial, ke li deklaru, ke li havas nenion komunan al tio, li ne asociiĝas kun rabistoj. Li vokis mian atenton informi Vin, sinjoro grafo: Li batalos per ĉiu rimedo kontesti vian prioritaton, Sir, kaj vanigi vian entreprenon, sed li havas nenian rilaton al la eventualaj escesaj agoj de la banditoj. Krome li proponas pacon, se Vi, Sir, rezignos certajn terenojn, kiuj faras liajn petrol-trovaĵojn nealirebla. Tiam li foriris. (Sen saluto.) Kvankam mi scias, ke Vi ne konas la nomitan vizitanton, Sir, mi oficiale informas vin pri la supre menciitaj. La detektiv-kontor, kiu kaŝobservas lordon Harrington, en raporto infromas nin, ke lordo Harrington kontaktiĝis kun ruso, nomata Sokoloff, kiu estas internacia aventuristo. Harlington malaperis kun Sokoloff senspure el Maroko. Verŝajne li ekveturis al Senegalio, sekvante vin. Phips sciigis al mi, ke nur Johnson povas rajdi sur la ĉevalo Hiacinto en Epsom, ĉar jokeo Kirlow estas malsana. Plej grave: la polico avertis min, ke Biskra, la bandito sekvas vin, Sir, laŭ la konfeso de kaptita rabisto.

Aldone mi sendas la personan priskribon de la nomita rabisto (en formo de resercîgo kaj gazet-artikoloj sub la literoj A kaj B). La ĵurnaloj de Forster skribis, ke Vi partoprenas aventuran entreprenon, kaj la ĵurnalo havos la feliĉon informi la legantojn pri tio. Laŭ nia scio ankaŭ Forster forveturis kun Harlington, kiu estas granda reklam-ĉasisto. Mi finas mian leteron, atendante viajn ordonojn, kaj mi restos Sir,

Via sincera estimanto,
Artur Pidgin
persona sekretario

2 aldonaĵoj: A kaj B, rekomendite.

La grafo vigliĝis:

- Tiu knabo venu ĉi tien. Li devas telegramon…

Ĉiu estis klarvida pri tio, ke eksterordinara informo estis en la letero, ĉar nek ribelo igis la flegman grafon tiel maltrankvila.

Skribinte kelkajn liniojn sur paperon, li donis tion kaj kelkajn monerojn al la knabo.

- Ĝi estas urĝa.

La poŝtisto forkuris.

- Kio estis en la letero? – demandis la knabino, kun sia natura impertinenteco. Vidinte la konsternitan mienon de la grafo, ŝi rapide aldonis. – Nu bone… Nur tenu viajn sekretojn, tiuj tute ne interesas min.

Sir Yollan foriris ĝemante. Kion fari? Tiu virino parolas kun li, kvazaŭ li estus ŝia danc-partnero dum kvina-horaj tekunvenoj.

La soldatoj interbatadis sub la efiko de la brando. Renoir kuradis inter ili malesperiĝinte.

- Sed mi petas vin, sinjoroj senranguloj… Nu sed…

La marŝalo volis fari ordon kun sia dignoplena konduto, eltiritnte sian glavon, sed iu puŝis lin je la brusto, ke li komencis tusadi, kaj Durien kriis stentore:

- Tuj ĉesu, ĉar mi ne scias, kio okazos!

Li tute ne povis scii tion, dum tia interbatado. Stertoro, klakado de vangofrapoj, blasfemado, ekbrilo de bajonetoj.

Jeremio Oblath feliĉe elmetis siajn kirurgajn instrumentojn sur vakstolon. Eble estos iom da operacio post tia interbatado…

Ankaŭ la ĉefkuracisto estis tute ebria.

Sir Yollan elvenis el sia tendo por momento. Poste li denove reiris. Li sidis sur sia seĝo serioze, profundiĝinte en siaj pensoj. Nun la unuan fojon peziĝis sinistraj sentoj sur lian koron. Li ne kalkulis tion, ke ne sufiĉas uniformo kaj bajoneto al la militistaro. Ankaŭ disciplino estas bezonata.

Kio okazos? Li havis sinistran senton. Ĉu eble li malesperiĝas? Ĉu li returniĝos ĉe la komenco de la vojo? Li fikse rigardis la teron, fumis sian cigaron, kaj en la malluma fono de la tendo li vidis tiun fergantan, long-lipharan praulon sian, kiu kutimas rigardi lin de sur la muro de la blua salono: la „Konkera Yolland." La kruda homo elpelis la portugalojn de sur la nordorientaj bordoj de Afriko, kaj li nomumis sin guberniestro de la angla reĝo. Sed li komencis sian karieron ne en la burso…

Leviĝetis la kurteno de la tendo, kaj la knabino enpaŝis. Ŝi staris timeme.

- Diru! Ĉu vi eĉ nun ne vidas, ke la gvidantoj estas senpovaj?!

- Kaj… se mi vidas tion?

- Kial vi ne faras ordon? Tiel vi ne atingos la celon de via vojo!

La grafo levis sian ŝultron

- Ĉu vi disponis pri via pakaĵo? – li demandis poste.

- Kiel?… Nun zorgu ne pri mia pakaĵo, sed iru inter ilin, kaj restarigu la ordon.

La grafo balancis sian kapon silente.

- Ne.

Timiga batalbruo aŭdiĝis de ekstere. Pafo knalis. Durien pafis en la aeron, sed oni tute ne atentis lin. Suboficiro Bayonne volis fari ordon, sed iu bat-rompis lian nazon. Nur tiam fariĝis ordo, kiam soldato vangofrapis la Diablon de la Aero, tiam subkaporalo Izabela, kiel tigropatrino ĵetis sin inter ilin, kaj aperis ankaŭ King Roswang, tenante en siaj manoj duonon da ĉaro, kiun li haste derompis.

Post du minutoj ne estis interbatado. Kiu povis, forkuris, kiu ne estis sufiĉe rapida, tiun subkaporalo facile knokaŭtis kun sia mirinda, patrina instinkto, kaj King Roswang flanke de sia edzino renversis tutajn homvicojn per la duono da la ĉaro.

Sir Yollan elpasis el sia tendo. La marŝalo, Durien kaj la aliaj superuloj jam regis la resonojn de la batalo. Kelkaj homoj ankoraŭ laŭte diskutis, tiujn ili silentigis.

- Mi petas vin… - diris la grafo per trankvila, malvarmkoduta, sed bone aŭdebla voĉo. – Okaze de la plej baldaŭa incidento mi ne pagos du tagan soldon al la tuta kompanio.

- Hohooo! – diris Toutain.

- Kiel? – turnis sin la grafo al li eĉ pli malvarmkondute. – Kiu malsamopinias, tiu povas foriri tuj. Mi ordonas ĉi tie. Ekde nun retenu tiun, kiu komencos interbatadon, zorgu pri tio, ke ĝi ne disvastiĝu, ĉar mi ne kutimas aliigi miajn vortojn.

Kaj li reiris en sian tendon. Vane, ŝajnas, oni estimis la grafon pro iu kaŭzo. Neniu diris eĉ unu vorton, kaj Fleur de Bac proponis, ke la plej fortaj soldatoj, gvidate de la subkaporalo, fondu militaran policon, kaj ili vangofrapu tiun, kiu ne plaĉas al ili. Li ne estas freneza perdi du tagan salajron pro alies interbatado, kaj cetere la fanatika anglo pravas laŭ li, kaj oni ne rajtas konduti tiel en la dezerto.

La militara polico fondiĝis. Atentema spektanto povintus diri tion, ke tiuj homoj ludas ĉi tie la transformiĝon en la naturo: kiel la neceso kaj la sperto devigis la praajn, sovaĝajn hordojn, transformiĝi iom post iom al „armeoj".

Leŭtenanto Polchon fariĝis la komandanto de la „polico", ĉar la ruĝbarbulo estis la sola gvidanto, kiu klopodis efiki al la animo de la interbatiĝantoj ne nur per belaj vortoj, sed li intervenis ankaŭ per kelkaj tre fortaj vangofrapoj.

Jeremio Oblat sidis apud siaj instrumentoj kaj atendis. Sed venis neniu. Kratochvill iris tien kaj premis naztukon sur sian sangantan kapon. La sango tramalsekis la tukon.

- He! Senrangulo! Venu ĉi tien, mi ekzamenos vin!

- Ĉu? Ba, lasu min per tiu idiotaĵo.

- Sed homo! Eble vi bezonas operacion! Ĉu vi ne volas, ke mi helpu al vi?

- Kompreneble jes. Vi povus doni al mi skatolon da maĉtabako

3

Kiam Sir Yolland repaŝis en sian tendon, febre brilanta okulparo rigardis sur lin el la mallumo.

- Jes! Tia vi devas esti! Sir!. Vi estas granda homo.

- Mi… - li respondis kaj mansvingis, tamen ĝi agrablis al li.

Iu frapetis.

Tiu povis esti nur sinjoro Wulkie, ĉar ekskluzive li povis frapeti sur la tendo de la grafo antaŭ ol enpaŝi. Li povintus ricevi unuarangan patenton, kun tiu rimarki: „Inventaĵo, kiu dum dezertaj tendumadoj ebligas la aplikon de kutimoj ĉe ĝentilaj kontaktoj por bone edukitaj homoj." Ĉar la dika, malalta organizanto faris lignopecon, al kiu li fiksis plumboglobeton per dratol, kaj skuinte ĝin, la plumbo, frapiĝanta al la ligno donis perfektan iluzion de frapeto antaŭ la tendo.

- Sir – diris sinjoro Wilkie enpaŝinte -, mi dungis iun, kaj mi petas vian postan konsenton.

- Kiun kaj en kia ofico.

- Sinjoron Guliver, kiel dezertan fak-konsiliston.

- Vi devas nuligi tion! – diris la knabino rapide. – Li estas danĝera homo!

- Pardonon – respondis la organizanto ĝentile. – sed mi dingis lin ne kiel misiiston, kaj tiel la milda, senkulpa karaktero ne estas kriterio.

- Se vi permesas al mi alparoli – interrompis la grafo, kiu ĝis nun agaĉis per sia samovaro -, mi opinias, ke estus bone, se sinjoro Wilkie eksplikus sian decidon pli detale.

- Sir – komencis la dikulo -, post kelkaj eventoj mi devis konstati, ke rilate nian ekspedicion okazis multaj malzorgoj. Koncerne tiujn malzorgojn, sinjoro Guliver pruvis tiajn perfektajn spertojn, ke mi sentis tiel, kial ne ekspluati tiujn ankaŭ en la futuro.

- Kiel?! – kriis kun histeria rapideco Anette (Elsworth? Lorion?…) – ĉu eble li aranĝis danc-vesperfeston por vanigi la ribelon? Ĉu li haltigis la unuan aŭton, kiam ni devis akiri kininon? Ĉu la armeo sekvas lin kun unuanima entuziasmo, aŭ min?

- Mi petas vin fraŭlino… Mi do ne volas difekti viajn meritojn, kaj mi rekonas, ke vi estas nemalhavebla por nia armeo… sed tiu sinjoro estas praktika…

- Ankaŭ la marŝalon vi pensis praktika kaj ankaŭ la aliajn gvidantojn, vi pensis praktika la kvincen gumajn gantojn, la kvindek rakedojn, la sepdek dekduojn da sekuraj pingloj kaj la mil alĝustigeblajn kravatfiksilojn el fiŝosto.

Sinjoro Wilkie paliĝis kaj kriis profunde ofendita en lia honoro:

- Mi ĵuras, ke mi ne sciis pri la kravatfiksiloj! Mi konfesas la gumajn gantojn, mi toleris la rakedojn, mi havis informojn pri la sekuraj pingloj, sed sciu, fraŭlino Elsworth…

Dume la grafo enpensiĝinte trinkis sian teon:

- Sendu tiun homon ĉi tien – li diris mallaŭte -, mi parolos kun li.

- Ĉu vi ne volas dungi lin – demandis la knabino rapide, kaj kun minace brilantaj okuloj -, sciu, se vi faros tion, mi ne plu kunveturos kun vi!

- Jes… Originale estis tiel… ke nur ĝis ĉi tie… pro via pakaĵo… kaj…

- Sed vi lasis mian pakaĵon tie en mia valizo ĉe la vrako de mia aŭto. Tio estis sufiĉe malbela ago! Vi povintus meti ĝin en la fiakron. Nun vi lasus min sola en tiu ĉi sinistra rabistejo, vestitan per ununura komb-negliĝo.

- Mi petas vin… Mi pensas tion, se mia armeo forlasos la oazon… ĝi estos tre sekura, kaj bona loko…

- Ĉu por virino en ununura komb-negliĝo? Egalas. Faru tion, kion ĝentlemano devas fari en tia situacio.

Vere ne eblas lasi ŝin ĉi tie… tiel, nenion havantan…

- Kaj… Kien vi sendigis vian pakaĵon?

- Mia patro skribas en tiu letero, ke li portigis mian valizon el la garaĝo kaj sendis ĝin al Ideles. Li aranĝis, ke la aviadilo de la dezerta ekspresvartransporto ĵetu ĝin per paraŝuto!

- Ĉu dume via kara patro liberiĝis el la kaptiteco de la beduenoj kaj li revenis hejmen? Sed kien do vi vojaĝas?

Ŝiaj palpebroj ektremetis, sed ŝi tuj respondis:

- Kiel?… Ĉu mi ne diris al vi, ke mia patrino edziniĝis la duan fojon?

- Kaj kiun vian patron tenas en kaptiteco la dezertaj hordoj?

- Mian veran patron. La nomo de mia vicpatro estas Elsworth, mia vera patro nomiĝas Lorien… Lorien adoptis min antaŭ dek kvin jaroj.

- Ĉu via vera patro adoptis vin?

- Ne! Mi diris, ke Lorien estas mian vicpatro! Dio mia, kiel vi ne komprenas tion! Kaj Elsworth adoptis min, kaj nun li estas en kaptiteco, kaj mia patro skribis, ke mi liberigu lin, la pakaĵo estas sendita…

La grafo viŝis sian frunton pala, ĉar lia kapo komencis zumi. Ekstere bruis la pordofrapilo, kaj enpaŝis la blankdentara, gaja aŭtisto kun sinjoro Wilkie. La knabino rigardis lin kun fulmaj okuloj.

- Bonvolu sidiĝi – diris la grafo, sed la knabino rapide eksidis sur la solan, liberan seĝon.

- Dankon – respondis Guliver. – Mi pensas, ke ankaŭ tiel ni bone komprenos unu la alian.

- Se vi permesas unu demandon: kio estas via profesio, sinjoro?

- Mi estas pentrartisto. Mi pentras pejzaĝojn en la dezerto.

- Mi aŭdis tiel, ke vi bonvolus esti je nia helpo.

- Volonte. Min interesas la aventuro, kaj mi ne estas riĉa. Mi volonte perlaborus altan monsumon.

- Malriĉa homo? Interese… - diris Anette, kaj ŝi nervoze stamfetis per siaj piedoj. – Malgraŭ tio, vi havas belan aŭton.

- Mi ne estas malriĉa. Nun precipe ne. Mi havis ekspozicion en Parizo, el ties enspezo mi aĉetis la aŭton, kaj restis ankoraŭ tiom da mono, ke mi povu pentradi en la dezerto.

Li rigardis trankvile en la okulojn de la knabino.

- Kiel mi vidas – rimarkis la grafo -, vi estas sperta pri la milititaj aferoj.

- Mi soldatservis ĉe la spahioj, mi estas oficiro de la rezerva armeo.

- Ĉi vi vere nomiĝas Guliver? – rimarkis nun la knabino. – Ĉar mi vidas sur via dokumentojo monogramon J. D.

- Ĝi estas la donaco de pentrartisto Julies Daumier.

- Ĉu vere?… - ŝi demandis moke, trenat-voĉe. – Interese. Mi pensis tion, ke vi uzas pseŭdonomon, kaj mi atentigas vin, Sir, kiu uzas falsan nomon, tiun oni devas trakti singarde. Ne prenu kiel ofendon, sed kio estas en mia kapo, tio estas sur mia lango.

La aŭtisto ridetis.

- Jes. Mi alte estimas la sincerecon… Fraŭlino Lorien…

- Eble ni provu – meditis la grafo. – Mi konas kazojn, kiam malglraŭ la uzo de falsa nomo, iu donis tre efikan helpon. La falsa nomo estas tre bona rekomendo ĉe mi.

- Mi ne veturos plu kun la kompanio! – kriis la knabino, kaj ŝi salte leviĝis. – Ho! Nur mia pakaĵo estus ĉi tie! Tiam mi ne devus resti kun vi eĉ por momento!

- Ĉu ne al vi okazis akcidento sur la ŝoseo, veturante per malgranda, ruĝa aŭto? – demandis Guliver.

- Jes. Kaj miaj kavaliraj savantoj lasis mian valizon sur la okazejo.

- Ĝi estas malofta bonŝanco – diris la aŭtisto kun ĝentila entuzismo -, preterveturante ĝin, mi pensis, ke sekvante la spurojn de la akcidentita pasaĝero… mi kunportos vian valizon! Ĉiu via havaĵo estas ĉe mi, fiksita al mia pakaĵrako.

4

Ĝi estis knokaŭto.

La knabino nur nun konsciiĝis, ke ŝi renkontis danĝeran kontraŭulon. Li mensogas akurate, kiel maŝino, li batas kaj trafas precize, se iu staras vidalvide al li.

Dankon! – ŝi respondis mallonge kaj turnis sin al la grafo. – Sir. Mi ne kunveturos kun vi. Sed mi avertas vin, ke la ĉefa komplico de la bandestro Biskra, nome Sokolof, kiu estas rompŝtelisto ĉe grandsinjoroj, sekvas vin. Ĝi estas skribita en tiu letero, kiun mi ricevis hodiaŭ, kaj Dio helpu min, ke nun mi ne mensogis. – Ŝi elprenis la leteron kaj legis:

Sokolof estas unu metron kaj okdek centimetrojn alta, li havas okulfrape blankajn, sanajn dentarojn, nigrajn harojn, iomete densajn, longajn, arkajn brovojn, li direktis ruĝan aŭton, kiam oni lastfoje persekutis lin, kaj li prefere asertas, ke li estas oficiro ĉe la spahioj en la rezervarmeo. Ĉiam je via servo.

Bum!

La konkaŭtito rebatis, surplankigante per unu frapo sian ŝajne venkintan kontraŭulon. Sed li jam ne povis venki.

Poste ŝi foriris pozeme kun altenlevita kapo.

La grafo rigardis sur la aŭtiston. Li estis proksimume unu metron kaj okdek centimetrojn alta, li havis nigrajn, iomete densajn, sed longajn brovojn, okulfrape sanajn dentojn, kaj ĵus li asertis prefere, ke li estas oficiro ĉe la spahioj…

- Sinjoro Guliver – diris Sir Yolland mallaŭte -, mi pensas tiel, ke momente mi ne povas akcepti vian afablan sin proponon. Mi firme decidis, ke mi mem gvidos la armeon.

La aŭtisto kapbalancetis ridetante, kaj ankaŭ li foriris. Estis vespero. Kelkaj arboj de la oazo apenaŭ refreŝigis la sufokan aeron, al kio ankoraŭ aldoniĝis la odoro de la kaproj kaj aliaj dombestoj.

Guliver iris rekte al la poŝtoficejo. Li trovis tie la patron de la nudpieda mesaĝisto, la poŝtestron. Li dormis sur duonmetra gazet-makulaturo. Li vekis lin.

- Ĉu vi volas ricevi dudek frankojn?

La maljunulo mansvingis.

- Ĉu temas pri la telegramo de profesoro Olivia Holland? Ĵus kunpotris virino ties kopion. Ŝi donis al mi tridek frankojn. Aparte dek frankojn, ke mi diru al vi, se vi venos: nenio gravas estas en la telegramo kaj ŝi salutas vin.

La junulo ĵetis kolere sian cigardon sur la teron…

Cetere la telegramo tekstis jene:

Se Kirlow estas malsana, ni ne anoncu Hiacinton al la konkurso, aranĝota en Epsom, Johnson estas malbona ĵokeo

Grafo Y olland.

DEKUNUA ĈAPITRO

Matene jam la „militara polico" ordonis pri la ekiro. Tiel ili pli rapide kaj pli bonorde estis pretaj por ekmarŝi. Sir Yolland difinis la vojon sur la mapo. La ŝoseo ankoraŭ kondukas plu en la dezerto, kaj ĝi finiĝos antaŭ la plej proksima oazo. Sed marĝene estis skribite, ke oni signis la vojon tra dumil kilometroj per palisoj, tiel do longdaŭre sufiĉas pasi preter la palisoj.

Sinjoro Strudl jungis sian ĉevalon, kaj kiam la grafo elpaŝis el sia tendo, li jam staris tie en la varmo kvardek celsiusgrada, portante sian grizan, cilindran ĉapelon, kiun li tuj eklevis:

- Ĉu mi povas veturigi vian sinjoran moŝton ien?

Li ĉiam demandis tion, kaj post kiam Sir Yolland kapjesis kaj sidis en la fiaklon, li mallevis la flagon.

La aŭtisto sidanta sur la sojlo de la gastejo matenmanĝis kaj salutis la konkeranton.

Kie estas la knabino?… Hm… Kial li serĉas ŝin. Ŝi certe restas ĉi tie. Efektive li devus ĝoji, ke li liberiĝos de ŝi.

- Ĉu ŝia sinjorina moŝto ne venos? – returniĝis sinjoro Strudl sur la veturigista benketo.

- Ne – respondis la grafo. – Ŝi venis nur ĝis ĉi tie.

- Wirklich domaĝe – li diris kun degna afableco, ĉar li ne kondutis orgojle al Sir Yolland. – Ŝi estis kara karaktero… Hot! Hooo… Diendl! Du verfluchte Narr!…

Ŝi estas ventokapa, frenezeta kreaĵo, ŝi volas kuri al Saharo… Tio certas, ke ŝi mensogas multe kaj veturas kun li ne sen ĉiu honestas intenco. Tamen ŝi estis apud li kore-anime en la malbono. Sed verŝajne, utiligante la unuan okazon ŝi estus ŝtelinta la ruĝan aktujon kun la rezulto de la esploroj, kun la mapo kaj kun la identigaj indikoj. Eblas, ke tiu blank-dentara, unu metra kaj okcent centimetrojn alta aŭtisto, kiu prefere asertas, ke li estas kapitano ĉe la spahioj, ankaŭ li ŝatus akiri la ruĝan aktujon. Nu egalas. Li estos singarda.

- Ekveturu, sinjoro Strudl.

- Bonvolu ne diri tion. Via sinjora moŝto nomu min nur Herr Josef Strudl. Aŭ kiel oni nomis min en Hietzing, ĉar mi naskiĝis tie: „Der Strudl Pepi.." Multaj belaj knabinoj nomis min tiel, kiam ili ankoraŭ ekatentis min. Hot, du zau!… Pardonon, mi diris tion al la ĉevalo. Gema! Diendl!

Houben, la pistonisto, ekmuzikis la operon Aida, kaj ili ekmarŝis.

Sinjoro Wilkie dungis aparte ok arabajn bubojn por peli la mulojn, gvidate de Goghur. Goghur estis sperta pri la uzo de armiloj kaj portis kurgan glavon, per kiu verŝajne li kutimas bati la virinojn iafoje.

Nur nun komenciĝis la laciga marŝado. Ili jam ne havis ŝoseon sub ilia plando, kaj ankaŭ la varmego pliiĝis

Kiel la marŝado fariĝis ĉiam pli laciga, la ordo iom post iom ĉesis. Fine multaj homoj metis sian fusilon sur la ĉaron, ĵetis sian kamizolon surŝultren kaj iris en disaj grupoj.

Ili ankoraŭ ne faris eĉ la duonon de la difinita itinero, kiam la soldatoj jam postulis ripozon. Ili grumblis laŭte. Fine la marŝalo ordonis bivakadon.

La grafo cigaris kaj diris nenion. Iomete mankis la knabino al li. Estis neniu kun kiu li povus paroli. Li alkutimiĝis al tiu frenezeta, senrespekta, suspektinda kreitaĵon… Eh!… Ĉu eble ŝi ne mankas?

- Ne. Estas pli bone tiel.

Tage, kiam oni tendumis, li restis en la fiakro. Ĝi havis du avantaĝojn. Parte la levita ombrelo donis ombron, parte li ne devis kontaktiĝi kun la oficiroj. Li iomete abomenis sian armeon. Ili sidis ĉemizvestite, kriante, en disa malordo. Ne! Tiuj ne estas soldatoj. Ĝi estas fiamaso, vestita per uniformo. Tiu ĉi armeo neniam povintus forpeli la portugalojn de ie. Se nur ne el la drinkejo.

La dua aristokrato, sinjoro Strudl, sidis sur la ŝtupo de la fiakro kaj manĝis. Iafoje li dormis, apoginte sin al la kotŝirmilo, sed li neniam kontaktiĝis kun la soldatoj. Post la tagmanĝo Sir Yolland donis al li cigaron, kaj la koĉero respondis: „Tanksen." Li tranĉis ĝian ekstremaĵon kun grand ĝuo kaj ekfumis kaj elspiris la fumon tra siaj naztruoj kun fermitaj okuloj. Ili ne paroladis, sed bone komprenis unu la alian, unuaranga sinjoro kaj unuaranga servisto.

Aŭdiĝis kornado. La malgranda, ruĝa aŭto preterveturis ilin, gardeme, ke ĝi ne puŝiĝu al la palisoj. Post nelonge la aŭto kaj sinjoro Guliver malaperis malantaŭ la sablodunoj, kiu onidire estas identa kun la publike danĝera bandito Sokoloff.

- Kiel vi opinias… pri la soldatoj… kara Strudl – demandis la grafo la koĉeron, sidantan sur la ŝtupo de la fiakro.

Li sputis malgrandan tabakpeceton de sur sia lipo, viŝis sian frunton kaj diris nur tion:

- Dez ganze Gsindl gehört nach Stanhof…

En Steinhof, apud Vieno, estis la ŝtata frenezulejo…

2

Sekvan tagon ili atingis vojforkon.

La palisoj disiĝis unu de la aliaj en du direktojn. Unu vico tien, la alia alien. Sed la angulo de la disiĝo ne estis tiel granda, ke ili povintus decidi, kiu estas la sudorienta direkto, ĉar la vojo malproksimiĝis laŭ akuta angulo.

La marŝalo, kapitano Durien, ĉefleŭtenantoj Renoir kaj Polchon, krome sinjoro Wilkie sidis ĉirkaŭ la mapo en la tendo de la grafo .

Sir Yolland aŭskultis ilian interkonsiliĝon, sed li ne diris eĉ unu vorton. Li sidis sur sia milita seĝo kaj skuretis maldikan bastonon inter siaj botoj, fiksrigardante en la plovon, dume li kelkfoje enspiris la fumon de sia cigaro, ĝustigis sian monoklon, sed ŝajne li tute ne atentis pri ili.

- Nu, sinjoro! – diris Durien entuziasme. – Ni difinu la vojdirekton.

- Nur bonvolu – intstigis la marŝalo lin -, mi ne ŝatus, se vi sentus tiel, ke mi intervenis en vian agosferon.

- Ho! – respondis Durien ĝentile. – La rajto de la fina decido estas la via, kiun ni ĉiuj estimas. Vi ordonas.

- Tre bone – kapjesis la marŝalo kaj komandvoĉe diris al Renoir -, sinjoro ĉefleŭtenanto! Difinu la vojdirekton!

- Nu do – diris Renoir kaj lekis siajn lipojn. – Laŭ mia opinio nia vojo al Sudano estas sudorienta… Ĉu vi ne pensas tiel?- li turnis sin al Polchon.

- Mi submetas min en ĉio al la ordono de miaj superuloj – respondis tro humile la leŭtenanto, havanta ruĝan rondbarbon, kiu zorgis pri tio, ke la odoro de la maĉtabako, brando kaj la cepo ne estu tolerebla eĉ por momento.

- Ba, por kio utilas tiu ĝentila kondutmaniero?! – diris nun la marŝalo afable. – Ni estas oficiroj, ĉe kiuj la diferenco en la rango apenaŭ gravas ekster la deĵoro. Nu ek, knaboj, nur senĝene, bonvolu difini la vojdirekton, kvazaŭ mi ne estus ĉi tie.

- Nu do… - diris Durien preninte profundan spiron. – Nun ni estas proksimume ĉi tie – kaj li fingre montris sur iun punkton de la mapo. – Ĉu ne?

- Jes kompreneble – trankviligis li Renoir -, se vi diras, ĝi cetre estas tiel.

- Nu do laŭ vi – li turnis sin al Renior – ĉu ni devas iri tien aŭ ĉi tien?

- Mi diris nenion! – protestis la leŭtenanto. – Mi ankoraŭ nur atentas, mi atendas la ordonon, mi ne estas tiel vantaĉa, ke mi nun difinu la vojdirekton.

Ili rigardis la mapon dum kelkaj sekundoj tiel, kiel senkonsilaj medicinistoj speciale gravan malsanulon.

- Laŭ mi – opiniis Polchon – estus plej bone, se ni eĉ plu akceptus la saĝajn ordonojn de la marŝalo.

- Estas ridinde – deklaris marŝalo Podvinecz -, ke la ĉefkomandanto devas okupiĝis pri bagatelaĵoj. Ĉu eble vi povas difini vojdirekto sen mi?!

- Laŭ mi… Do… mi opinias, ni Suprenĵetu moneron – diris Polchon -, se ĝi estos fronto, tiam ni iru tien, se ĝi estos dorso, ĉi tien.

- Tio ne estas malbona – rimarkis Renoir malkuraĝe kaj rigardis al Durien.

- Mi ne volas ĝeni la militan konsiliĝon – interrompis nun Sir Yolland -, sed eble estus pli facile difini la sudorientan direkton per kompaso. Ĉu ne?

- Vi pravas – kapjesis la marŝalo ridetante, kvazaŭ li vane estus atendinta tiun bonan respondon ĝis nun, kiun li jam delonge sciis, li nur estis scivola, ĉu ankaŭ aliulo divenas tion. – Jen vidu, oni devas nur pensadi, kiel Sir Yolland faris tion. Elprenu, sinjoro kapitano, vian kompason, kaj difinu la ĝustan vojon!

La kapitano etendis sian manon al la ruĝa kamizolo kun ora epoleto kaj, kaj li heziteme, malrapide eltiris biskotan rulaĵon el sia poŝo. Li rigardis ĝin server, iom timeme, poste li denove remetis la kukon en sian kamizolon.

- Ĉu kompaso? – li diris poste. – Mi pensas, ke mi lasis ĝin ien. Sinjoro ĉefleŭtenanto bonvolu pruntedoni al mi la vian…

- Mi petas pardonon, sed mi ne havas kompason – diris Renoir rapide. – Ĝi ne troviĝis en mia ekipaĵo.

- Nu, tio estas bela! – diris la marŝalo kosternite. – Oficiroj sen kompaso. Ankaŭ tian miraklon oni travivas.

La grafo rigardis al Wilkie, sed li mallevis siajn okulojn kaj mordetis sian lipon.

- Mi jam vidas – diris Polchon malestime al Durien kaj Renoir -, ke nur unusola fidinda homo estas inter ni, la animo de la armeo: injoro marŝalo. Kun hontiĝo ni devas pruntepreni vian kompason.

Sekvis ĝena silento.

La marŝalo plenblovis sin kaj palpadis siajn ordenojn. Fine li ekparolis mallonge:

- La tasko de marŝalo ne estas tio, ke li gardu kompason. Mi ne povas pensi pri ĉio.

- Kvankam – meditis la grafo duonvoĉe – ni vane metas la kravat-fiksigilon sur la mapon…Ĝi ne taŭgas difini la direkton.

Ĉar sekvis tre granda silento, li ekstaris, remetis sian monoklon kaj trankvile cigarante lasis la stabon en la tendo. Estis kvieta nokto. La plimulto de la soldatoj dormis, tie-ĉi tie aŭdiĝis parolado, kaj sinjoro Strudl legis ion ĉe la lumo de la lampo de la fiakro, sidante sur la ŝtupo de la veturilo.

En la foro burnusa homo proksimiĝis, rajdante sur kamelo. Li sidis sur sia kamelo kun klinita kapo, volvinte sin per la mistera, blanka tuko de la indiĝenoj. Li trotis ĝuste preter la fiakro, kiam la grafo atingis tien.

- Vidu – diris la grafo al la koĉero -, mi miras tiujn homojn. Ili ne bezonas kompason kaj mapon. Ili trafikas en la dezerto tiel, kiel ni sur la stratoj de grandurboj.

- Kaj ili ne devas pagi monpunon, malregule avancinte – respondis sinjoro Strudl…

- Pri kio li pensas, kiam li trotas en la dezerto sola – meditis la grafo.

La bedueno returniĝis sur sia kamelo kaj respondis jene:

- Pri tio, ke ekzistas ankaŭ netolereblaj kunvojaĝantoj.

Sinjoro Strudl ekstaris kaj fiksadis sian vipon apud la ledan ujon pro surprizo. Ankaŭ la grafo surpriziĝis.

La bedueno sur la kamelo estis fraŭlino Morgenstern, Elsworth, Lorien Anna, Anette…

3

La aŭtisto kaj la mult-noma virino, ĉiam tiuj du homoj!

Estas evidente, ke ili ĉirkaŭflankumas la kompanion. Ŝajne neniu el ili volas veturi kun li, kaj tial de tempo al tempo ili aperas sub ia preteksto.

La virino kriis ion, la kamelo surgenuiĝis, kaj ŝi elseliĝis.

- Mi ne volis tendumi ĉi tie por eviti vian proksimecon, sed se vi jam alparolis min, mi povas ripozi ankaŭ ĉi-loke.

- Se vi deziras trinki tason da teo… - proponis la grafo.

- Dankon. Nenion de vi, Sir. Vi elmontris sufiĉe, kiom ŝarĝe mi estas al vi.

- Vi vere eraras. Mi nur ŝatintus meti klara kelkajn obskurajn cirkonstancojn

- Mi scias, nun vi denove akuzos min per tio, ke mi ne diras la veron. Ĝi estas via fiksa ideo, Sir, se vi ne koleras pro tio. Mi estas tiel malkaŝa kaj sincera, ke simila komparo eĉ ne venas en mian kapon. Mi ne povas mensogi, kredu tion.

- Ĝi certas – aprobis la grafo -, ĝuste tial ne estas bone, ke vi faras tion ĉiupaŝe, mi vere badaŭrus, se vi prenus tion, kiel ofendon…

- Nu bone… ne gravas, ke vi senkulpigu vin – mansvingis Anna.

La grafo volis certigi ŝin, ke li tute ne pensas pri tiaĵo, sed la knabino tuj komencis fajfadi.

Misedukita!

- Kiel progresa via vojaĝo? – ŝi demandis poste leĝere.

- Dankon. Malrapide, sed certe.

- Certe, ke malrapide – korektis lin la knabino.

- La militistaro neniam kuregas. Gravas, ke ĝi marŝu egalritme kaj kontinue.

- Nu. Ĉu vi estas klarvida pri tio, ke via situacio estas malesperiga, senperspektiva, vivdanĝera kaj sencela.

Sir Yolland malgaje purigis sian monoklon dum kelkaj sekundoj.

- Sed ĉu cetere ĝi estas kontentiga? – li demandis fine.

- Ne ŝercu, Sir. Mi venis post vin tial, ĉar vi estas en danĝero.

- Hm… Kaj kiomgrade minacas min danĝero?

- Momente vi staras preskaŭ meze de la plej terura dezerto en la mondo, kun multe da suspektindaj homoj. Kaj neniu el ili havas eĉ konjekton, kio estas la dezerto, marŝado, kien ili volas iri.

- Mi petas vin… ili ĉiuj estas koloniaj oficiroj.

- Sed, Sir! – kriis la virino kaj kunfrapis siajn manojn. – Ĉu vi ankoraŭ ne vidas, ke la sola homo en tiu societo, kiu kalkuliĝas soldato, estas vi?!

- Nu sed la marŝalo, la kapitano…

- Ĉu vi ankoraŭ ne pensis pri tio, ke eble trompistoj trudiĝis en vian proksimon?

La grafo palpebrumis embarasita.

- Tiaĵo kelkfoje venis en mian kapon – li diris poste, kaj li tute ne rimarkis, ke li senintence sorbadas la teon, verŝitan fare de la virino. – Kial vi ne avertis min ĝustatempe? Kiam ankoraŭ estintus pli simple returniĝi?

- Kiel? – ŝi demandis rapide, per la voĉo de la mensogontoj, kiam tute ne la demandon ili volas aŭdi denovne, sed ili intermetas vorton por gajni tempon kaj elpensi subite ion malveran.

- Kial vi ne atentigis min pli frue?

- Kiel pli frue?… Ja?!… Kial mi estus avertinta vin? Vi nekompreneble kondutis tiel, kvazaŭ vi ne kredus ĉiun mian vorton blinde. Sed nun mi atentigas vin: reiru en Ain-Sefra-on kaj dungu gvidanton, ĉar…

- Dankon, fraŭlino Elsworth, Lorien. Eblas, ke vi pravas, kaj ni pereos. Sed grafo Oliver Yolland ne returniĝas kun sia roto eĉ tiam, se ĝi rekrutiĝis el trompistoj.

- Ĉu vi ne estas tiom elektema, ke trompisto ne estu en via proksimo?

- Lastatempe mi komencas kredi tion, ke iafoje estas malfacile malhavi la societon de trompisto.

Sinjoro Wilkie alvenis.

- Sir, viaj oficiroj ne povis decidi la marŝdirekton.

- Ĝi estas tute egale, kara Wilkie, nur unu afero gravas, ke ili marŝu antaŭen!

Anna rigardis al la grafo kun stranga surprizo, longe, esplore, kvazaŭ ŝi estus atendinta ne tion, kvazaŭ ŝi estus imaginta lin alia homo ĝis nun.

Kiam la roto marŝi plu, la soldatoj vidis mirante, ke apud la grafo sidas bedueno en la fiakro, kiu ruĵas siajn lipojn!

4

Ĉar ili nek aŭrore atingis la oazon, evidentiĝis, ke ili devintus iri alidirekten. Sed ankaŭ ĉi tie estas multaj palisoj pikitaj en la teron, tiuj do signas la vojdirekton ien. Se iom malproksime, sed oazo devas sekvi.

Sed sekvis nenio.

Kaj estis tagmezo. En Saharo, kie oni mezuras la temperturon ne tiel, ke „en ombro", ĉar ĝi ne ekzistas tie.

- Atentu min – diris subkaporalo Izabela al la okulvitra remburistoKratochvill (kiu verkas romanon). – La tuta afero ne plaĉas al mi.

- La gvidantoj sekretas ion.

- Ili ne komprenas la direktadon.

- Ili vane sekretas, ĉiu scias tion. En mia romano rolas homo, kiu estas ŝoforo kaj anoncas sin por fariĝi piloto. Li konstatas nur el alteco, kiel granda diferenco estas inter atakanta ĉasaviadilo kaj eta taksio.

Izabela per subita korpomovo suprenigis sur sia ŝultro la rimenon de la fusilo kaj rigardis sian marŝantan filon kun decidkaraktera, serioza, zorgoplena vizaĝo.

- Mi diras al vi, Kratochvill, ĝi estas dezerto, kaj oni ne ŝercu pri mi en tia vermego. Ni devas scii, kien ni iras!

- Pro tio ne estos malpli varme.

- Tio certas – opiniis Toutain -, ke la tuta afero estas suspekta, malklara kaj estas io malhonesta en ĝi. Vi povas kredi min! Se iu scias, kio estas malhonesta, mi estas tiu.

- Vi povas diri, kion vi volas! – kriis Izabela. – Ni ĉiuj estas idiotaj, se ni lasas konduki nin je la nazo en Saharo! Mi volas scii, kien ni iras! Fine ja mi estas patrin'… - Ŝi timiĝis, sed poste ŝi daŭrigis rapide: - mi estas patriota karaktero, kiu marŝas ne pro entuziasmo, sed pro mono. Mi havas la rajton scii, kien oni gvidas nin!

- Ba, knaboj – diris Jordan, kiu estis aldviolonisto, sed li bone ludis ankaŭ sur akordiono. – Ni ja iras preter palisoj, ĝi signifas tion, ke vojo estas ĉi tie, ni do atingos ien.

- Sed kiam! – kriis la subkaporalo. – Ĉar ni devas ankaŭ trinki en tiu ĉi malbenita varmego, kaj ni ne povas fonti akvon el paliso.

La ordo tute ĉesis. Sinjoro Wilkie kuŝas svene en la ĉaro de la Ruĝa Kruco, sur la supro de homa hekatombo. Stabkuracisto Oblath metas trempitan tukon super sian koron, li ŝatus embrokacii siajn tempiojn per diluita amoniako, sed li ne povis atingi la ŝrankon de la medikamentoj, ĉar barikado de tornistroj kaj pafiloj baras lian vojon. Ĉiu disĵetadas siajn mantelon, kamizolon kaj konstante trinkas akvon.

La marŝalo elseliĝas laca. Renior kaj Durien staras apud li senkonsile. Polchon, kiel ia ruĝbarba buldogo, moroze maĉas sian pipon inter siaj maldensaj, brunaj dentoj.

Goghur, la indiĝena gvidanto iras al la grafo, kiu ĵus pagas la veturkoston de la fiakro, kaj li helpas descendi al fraŭlino Anna.

- Sinjoro – li diras -, mi devas paroli kun vi.

- Parolu, kara indiĝeno – respondas la grafo, kiu neniam ŝanĝis siajn manieron kaj stilon, kiam li staris vidalvide ĉu al la sekretario de la burso, ĉu al araba indiĝeno.

- Sinjoro. Ni estas minacataj de morto. Ekirinte el Bilmo, sur kiu ajn karavanvojo ni devintus trovi oazon ne pli ol dudek kvar horoj.

- Sed kien kondukas la palisoj? – demandis la grafo.

- La palisoj, sinjoro – respondis la arabo -, jam tre ofte signis vojon al la morto. Ekzistas, sinjoro, malicaj homoj, kiuj eltiras la palisojn, montrantajn la ĝustan vojon, kaj ili denove enbatas tiujn en la teron por vojerarigi. Dum tagoj ili iras antaŭ la karavano en distanco de kelkaj mejloj, ĝis ties akvo, manĝaĵo, energio elĉerpiĝas, kaj fine ili prirabas la viktimojn.

Ĉio ĉi sonis tre verŝajne. La grafo trankvile elektadis cigaron el sia cigarujo.

- Sendu al mi tiun ostecan, altan, brunvizaĝan suboficiron – li dirs al Goghur. Poste li turnis sin al Anna. – Ĉu vi deziras trinki tason da teo?

Anna Anette denove rigardis sur lin, kvazaŭ ŝi ne tiel imagus la grafon tia.

- Ĉu nun vi pensas pri teo?! Vi ja… aŭdis, ke ni estas en morta danĝero! Kion vi volas fari?

- Nu… ni do elpensos ion.

Malproksime en la mallumo stranga ekbrilo de reflektoro fendis la nokton, kaj ĝi denove estingiĝis apud iu monteto ĉe la turniĝejo.

Aŭto veturas antaŭ ili…

Alvenis la osteca, brunvizaĝa suboficiro: subkaporalo Izabela.

- Nu… mi petas vin. Mi jam plurfoje atentis vin. Vi estas saĝa, decidkaraktera homo. Kiel vi nomiĝas?

- Cavelotti – diris sian falsan nomon sinjorino Roswang, la patrino de la Diablo de la Aero.

- Ĉu vere? Ĉu vi do estas italo? Nu, subkaporalo, mi pensas tiel, ke ni vojeraris iomete.

- Mi sciis!

- Ĉu vere? Vi estas sagaca. Nu do vojerari estas homa afero. Tamen estus bone ŝpari per la akvo. En tio mi kalkulas vian komprenemon.

- Bonvolu kredi, ke mi ne prodigas la akvon – ŝi respondis spiteme.

- Mi scias. Mi venigis vin ĉi tien, ĉar mi nun… nu… mi observas la homojn. Vi… sinjoro subkaporalo, ŝajnas firmkaraktera, saga kaj fidela soldato. Ĉu vi komprenas min? Ĝis nun la ordo ne gravis, sed nun ni devas atenti. Ni estas en malagrabla situacio. Mi fidas vin. Vi povas foriri.

SirYolland ne sciis, ke li parolas kun virino. Sed li ne povintus agi pli ruze, se li scias la sekreton de sinjorino Roswang, kaj li volas tion, ke subkaporalo Izabela ekde nun iru por li en fajron.

Grupo da soldatoj diskutis. Ili kolere riproĉis la gvidantojn kaj puŝadis la malesperiĝintan serĝenton Bayonne.

- Parolu kompreneble – kriis Toutain -, diru al la gvidantoj, ke ni volas verŝi puran akvon en la glason!

- Ne eblas venigi tiel homojn en Saharon! – pugne gestadis Wolfram, la lokomotivestro, kaj la aliaj minace murmuris konsente. – La gvidantoj estas trompistoj.

- Kiu asertas, ke li estas oficiro, tiu estu sperta en la dezerto – tondris la voĉo de King Roswang, kiu cetere estis silentema.

- Vi nur silentu! – eksonis kategoria voĉo, kaj King Roswang tuj silentiĝis. Subkaporalo Izabela estis tiu, kiu ĵus alvenis tien.

- Mi diris, ke sufiĉe! – ŝi kriis energie kaj laŭkutime forte frapis sur sian bruston. – Se okazis ia problemo, tio estas plie pro la soldatoj.

Vi estas tiaj, kiel bandaĉo. Vi misuzas la bonecon de sinjoro grafo.

Ili mutiĝis pro la subita ŝamĝiĝo.

- Ni volas scii, kien ili gvidas nin! – interrompis Fleur de Bac. Je lia malbonŝanco!

- Ĉu vi volas scii?- stridis la subkaporalo. – Konstatu tion laŭ la movo de la steloj, vi ja estas legiano. Krome tiu via amiko, kies duonon da vizaĝo oni debatis, bedaŭrinde. Se vi estas legianoj, diru, kie ni estas! Ek! Nu, bonvolu! Legianoj! Kiu staros gvide de la roto?!

Iomete ili eksilentis. Duke of Roswang, la Diablo de la Aero rimarkis:

- Tamen ĝi estas friponaĵo…

- Silentu, nazmukulo, ĉar vi ricevos vangofarapon – respondis la subkaporalo kun surpriziga vortoturno de oratoro, poste ŝi ĉirkaŭrigardis bataleme. – Mi ne defendas la onidirajn oficirojn – daŭrigis la subkaporalo -, mi diras nur tion: trua sako torvas flikon. Ni estas kvitaj. Al kiu ĝi ne plaĉas, tiu montru, ke li estis legiano! Kaporalo Bilottey, se li ne estas, gvidu nin, aŭ Kratochvill rigardu supren sur la ĉielon, kaj difinu la vojdirekto, kiel bona soldato, servinta en la dezerto. Ĉar la direkto estas skribita sur la steloj.

- Bonvolu kredi, ne mi skribis tion – senkulpigis sin la remburisto.

- Nu… tamen… - murmuris King Roswang – ni devas fari ion…

- Oni atendos ĝuste vin tie, kie vi devas fari nenion alian, ol dormi kaj plenŝtopi la stomakon – diris la subkaporalo per tiu malestimega voĉo, plena de kaŝitaj riproĉoj, kiel li kutimas humiligi sian edzon ĝispolve. – Aŭskultu min! Mi asertas, ke la sinjoro grafo estas bona

homo, kaj li volas fari bonon al ni. Ni porciigu la akvon ŝpareme, ni klopodu marŝi rapide kaj en ordo. Kiu kredas tion, ke ni devas buŝaĉi kaj interbatadi, jen mi estas, tiu anonciĝu!

Ŝi finis, frapis forte sur sian bruston kaj ĉirkaŭrigardis atendeme.

Sed neniu elpaŝis.

DEKDUA ĈAPITRO

1

Dume en la tendo de la marŝalo okazis malgajaj kaj sinceraj eventoj. Sinjoro Wilkie fartis pli bone kaj aperis en la societo. Unue ili trinkis la kafon mute kaj rigardis la mapon, stenitan sur la plankon, kiel ian mistikan sfinkson, kiu scias la grandan sekreton, kaj li povus diri ĝin per sia unu trajto. Sed li ne faris tion.

- Ĉar ni ekmarŝis de tie ĉi – diris Durien, montrante sur la mapon per sia fingro -, ni devas iri malsupren.

- Kien? – demandis Polchon.

- Tien – montris la kapitano.

Polchon simple turnis la mapon ĉirkaŭ ĝia centro tiel, ke Kaplando kaj Tuniso ŝanĝis lokon.

- Ĉu nun?

Durien konsterniĝis. La „malsupre" inversiĝis, kaj estis „supre".

- Sinjoroj – diris Mr. Wilkie -, la komedio finiĝis. Ni sternu niajn kartojn.

Ili longe sidis silente.

La marŝalo ekparolis la unua, kun profunde klinita kapo, kun milde tremanta barbo, anime rompiĝinte.

- Mi naskiĝis en jaro 1879, kiel tute malgranda bebo. En la pitoreska Skutario ekvidis min la lumo de tiu ĉi mondo, kiu de tiam neniom ŝanĝiĝis. Mia patro post la liberiĝo decidis komenci novan vivon, kaj ni elmigris en Usonon. Usono estas la patrujo de la mono, kaj ĝian standardon ornamas steloj. Tio estintus la malpli granda problemo. Sed mia patrino laboris kiel lavistino, vendis brodaĵojn, kaj tial ni estis malriĉaj, eĉ ni vivis mizere en keloloĝejo. Tiel mi iĝis violonfaristo. Kiam mia patro liberiĝis, li decidis komenci novan vivon, kaj ni elmigris en Gvatemalon. Tiun landon mi jam longe konis helpe de poŝtmarkoj. Gvatemalo estas malgranda ŝtato, sed ĝi situas en ĉiuj direktoj de la ventorozo, kaj ties klimato estas tre konsiderinda. Mia patrino denove lavis kaj vendis brodaĵojn, dume mi vilolonludis en stacidoma restoracio sur mia propramene farita violono. Tiel mi atingis mian deksesan jaron jam en mia frua junaĝo. Kiam mia patro liberiĝis, li decidis komenci novan vivon, kaj ni elmigris en Honduroson. La loĝantoj de Honduras havas diversajn aĝojn, ili okupiĝas pri terkulturado kaj bestbredado. Tiel mi venis al la militistaro. Tiutempe la defenda forto de Hunduras bezonis urĝan reorganizon, ĉar la ŝtato ankoraŭ ne havis armeon. Mi estis komisiita per estigo de grava soldatarspeco, kiun oni tute ne konis en Honduras.

- Kia soldatarspeco ĝi estis? – demandis sinjoro Wilkie.

- Militista orkestro – li flustris kun mallevita kapo. – Ĉar mi estas ĉeftamburisto… Profunda ĝemo sekvis la dramecan paŭzon. – Tiel ĝi okazis, sinjoroj. Kiam mia patro liberiĝis, li ne daŭrigis sian malnovan vivon. Sed li komencis nek novan. Ni entombigis lian kadavron por eterna ripozo. Tiel eksplodis la revolucio subite, kiu de iu tago al la alia neniom ŝanĝis mian sorton. Oni subpremis la revolucion, kaj mi aperis en la palaco de la prezidento, en la nomo de la malsata orkestro de sapeistoj. Sed la mandato de la prezidento ĝuste tiam finiĝis, kaj laŭ la ludregularo de la lando neniu povas esti prezidento dufoje en sinsekvaj regperiodo. Ili serĉis iun, kiu laŭ la formaleco povus plenumi tiun oficon por mallonga tempo, ke la malnova prezidento denove povu transpreni sian postenon. Tiel okazis, ke mi transprenis la potencon kaj proklamis la diktaturon, mi fariĝis marŝalo, kaj mi enkondukis la devigan publikan instruadon.

- Kiom longe estis prezidento via ekscelenco?

- Kvin tutajn minutojn, sinjoro…

Estis granda silento.

- Poste – daŭrigis la marŝalo anime rompite – oni komencis amasigi obstaklojn kontraŭ mia agado. La malamikoj de la prezidento persekutis min, kaj kiam la nova revolucio venkis, oni volis mortigi min. Nokte elsaltinte el mia lito, mi forlasis la landon kun ununura fortepian-partituro, sed la popolo eĉ nun rememoras mian mallongan regadon, benante min. Bädeker mencias mian loĝdomon inter la historiaj vidindaĵoj de Honduras, kaj turistoj vizitas ĝin. Kion mi diru ankoraŭ? Krome artisto planis mian rajdostatuon antaŭ du jaroj. Bedaŭrinde lia tiu malsano ekregis lin, kaj li komencis furiozi. Juĝu, sinjoroj: ĝi estas mia aŭtentika vivhistorio por mezlernejoj… La ceteraj jam estas la sorto de la ekzilita prezidento: Mi fariĝis staciestro en Egipto. Kopiisto de partituroj en Oran, fine ludgvidanto en kazino de Maroko.

- Krupiero! – miregis sinjoro Wilkie.

- Vi trafis tion – kapjesis la marŝalo. – Sed estas tute egale, kiam oni estas ekzilita! Mi loĝis en la hotelo Mammunia, sed kiam la kazino ĉesis, oni ekzilis min ankaŭ de tie, kaj mi ne havis hejmon. La hotelservisto permesis, ke mi enloĝiĝu provizore en iun komfortan kofron de la pakaĵdeponejo sur la etaĝo.

La dika organizanto ofte kapjesis, kaj marŝalo Podviecz daŭrigis.

- Tie mi dormis la amaran dormon de mia ekzilo. Kiam iu gasto forvojaĝis por mallonga tempo, sed li rezervis sian ĉambron, mi povis dormi en la malplena apartamento, sur mallarĝa kanapo. Eĉ mi povis razi min, kiam la kresko de mia densa barbo bezonis tion. Tiel mi venis en la luaĵon de kapitano Durien, kie vi, altestimata sinjoro, vizitis min. La ceterajn rakontos sinjoro kapitano…

- Unuavice mi devas konfesi tion, ke mi ne estas kapitano – komencis Durien -, kaj eble ankaŭ tio interesas vin, ke mi nomiĝas nek Durien.

- Kio do vi estis, antaŭ ol vi soldatiĝis?

Durien silentis longe, kaj ekparolis kun profunde mallevita kapo:

- Frizisto de virinoj…

En Saharo…

- La vera nomo de sinjoro Durien estas Felikso Brommel – interrompis la marŝalo -, kaj jam dum lia junaĝo lia patro razis anglan nobelan familion. Tiel venis la infano Brommel en Marokon. Sed oni reprenis lian licencon, ĉar li uzis propre-inventitan harkolorigilon.

- La couleur varies… - murmuretis Felikso…

- La farbo bezonis ankoraŭ iom da perfektigo – daŭrigis la marŝalo -, sed la malpacienca inventisto uzis ĝin pli frue, kaj la problemo okazis pro tio. Blondulino kolorigis sian hararon bruna, kaj ĝi fariĝis verda. Mi vidis la virinon… Estis terure. Mi protektis helpe Brommel-on, kiam li fariĝis ĉarlatano: li razis kaj ondumis en licenco, sekrete, noktomeze por tre malalta prezo. Mi venigis lin en la kazinon kiel parget-kartludiston. Ricevinte dudek frankojn da salajro, ĉiuvespere, elegante vestite li devis forludi nekredeble altajn monsumon por allogi la fraŭdistojn kartludi. Li devis fordisipi centilojn da frankoj kun enkurdritaj poŝoj. Kiam vi, altestimata sinjoro, trovis min en la ĉambro de kapitano Durien, kiun bedaŭrinde mi neniam vidis, kvankam mi volonte uzis lian apartamenton, ĉar li fumas bonegajn cigaredojn… Tiuj estas funelformaj, fortaj cigaredoj, nome Zrna, kaj mi pensas, ke li portigas tiujn el Serbio… Vi, sinjoro, estimis min per bonega propono, sed vi havis kondiĉon inklinigi la kapitanon por nia afero. Kiun mi ne konis. Kion fari? Mi ne povis preterlasi tiun okazon. Tiel mi persvadis Felikson, kiu entreprenis ludi la rolon de la kapitano.

Denove fariĝis silento.

Sinjoro Wilkie demande rigardis al Polchon, kiu mandorse glatigis sian ruĝan rondbarbon antaŭen el sub sia mentono kaj ekfumis pipon.

- Mi ne lernis tiom, kiom la ĵus parolinto, tial mi preterlasos la multe da idiotaĵo. Mi estis maristo kaj fino! Balenĉasisto. Punkto. Ĉe Jörvettborg mi batis rodkapitanon tiel per ĉefmasto, ke li de tiam tremas kaj singultas. Nenio pli! Oni forstrekis mian nomon el la libro de la maristoj. Kion mi povis fari? Mi dungiĝis al tiu ĉi armeo kiel pajaco. Kaj nun tiu ĵetu la unuan ŝtonon sur min, kiu ne timas, ke mi vangofrapos lin!

La prema fumo de la kruda tabako sufokeŝvebis en la malgranda tendo. Ili ĉiuj rigardis al Renoir. La silentema, delikata, malalta oficiro ŝiradis embarasite sian grandan ordenon, pri kiu poste evidentiĝis, ke ĝi rajtigas la spektantojn denove viziti la cirkon Picadilly.

- Vi, sinjoro ĉefleŭtenanto – turnis sin Mr. Wilkie al li -, kio vi estas kiel civilulo?

- Fianĉino – ŝi respondis kaj profunde ruĝiĝis.

La ordenoj de la marŝalo ektintis, kaj la pipo falis el la buŝo de Polchon. Renoir estas virino.

- Tial mi diris, ke mi estas oficiro por loĝi en tendo sola…

- Kial do vi faris tion? – konsterniĝadis sinjoro Wilkie.

- Mi povas diri nenion pli… - respondis Renooir kaj ekploris. Ŝi ekspluatis la okazon. Ho, kiomfoje ŝi ŝatintus plori ĝis nun, sed estis neeble. Kiel malbone estas al la viroj. Ili neniam povas plori. Oni ne akceptus tion precipe de infanteriana oficiro.

- Mi interkverelis kun mia fianĉo. Li komencis danĝeran entreprenon. Li pravis, sed fine ja mi estas virino, kaj mi pensas lian vivon pli valora ol lian devon. Mi opiniis, se mi minacos lin per tio, ke mi ĉesigos la kontakton kun li, tiam li cedos. Li resendis mian fiaĉinan ringon… Dio mia, kel malfeliĉa mi estas… Tial mi venis ĉi tien… Mi akiris legitimilon… ankaŭ mi volas suferi, kiel li, ankaŭ mi mortu ĉi tie en la dezerto.

- Post la aŭditaj – ekparolis sinjoro Wilkie – kion fari?

- Mi pensas – opiniis Felikso Durien -, estus plej bone, se la fraŭlino repaciĝus kun sia fianĉo.

- Laŭ mi la familia konflikto de ĉefleŭtenanto Renoir ne estas nia plej urĝa problemo. Ni staras meze de Saharo, de la verto ĝis la plando en peĉo.

- Ne interkonsiliĝo estas bezonata nun – diris Polchon -, sed helpo.

Responde aŭdiĝis hupo de aŭto el la malproksimo.

2

La koĉero ĵetis la kovrilon sur Dirndel-on kaj murmuris ion en sia viena dialekto pri Herrgott…, poste li ligis al la kapo de la ĉevalo la avelsaketon kaj eklumigis la du lampojn. Li faris tion kun tia malrapidritma trankvilo, ke Saharo kelkfoje, por momentoj, ŝajnis fiakrostacio ĉirkaŭ li.

- Estas problemo, sinjoro Strudl – alpaŝis lin Sir Yollan.

- Mi vidas tion, bitsen… sed i'halts maul… Buŝo senparolo, kapo sen hemikranio…

- Prave. Vi estas saĝa homo. Eĉ ĝis nun mi rimarkis tion. Tial nun mi demandas vin, kiel saĝan homon, kio estas via opinio?

- Mi do diros tion, se herr graf estimas min pert io. Ĝi ne estas la unua okazo. Al barono Radel, kiam li venis en Burgon por aŭdienco, mi ĉiam donis al li ŝancumon pri la ĉevalkonkurso. Kiam li gajnis, li diris: „jen estas kvindek forintoj…" Ĝi estis alta monsumo! Kaj li frapetis mian ŝultron : „Genz heit holt dran, herr Strudl"… - Kaj li ĝemis. – Wo sein die sene olde zeiten… Kio estas mia opinio… tio estas simpla. Tiu, kiu ĉevalrajdas avane, havanta barbon, li memorigas min pri mia infanaĝo, kiam la soldatoj marŝis sur la strato Wipplinger en Wagram por pafi prajme, kaj malantaŭe venis la orkestro. Ili ludis la marŝon Flieger, kaj avane iris regiment-tamburisto, kun belega, imperiestra barbo, li levadis sian orbutonan bastonon. Ankaŭ li estis plie regiment-tamburisto, ol ekssoldato. – Sinjoro Strudl tute ne sciis, kiel proksime estas al la vero.

- Nu… kaj kion vi farus, kara… kara… sinjoro veturigisto… en mia situacio?

- Mi ne fumus en la dezerto cigarojn, kiuj kostas unu-kronojn po peco, ĉar elĉerpiĝinte, tiuj ne estas aĉeteblaj ĉi tie, kaj estas malfacile ĉesigi la fumadon subite.

- Multe da vero estas en tio, kion vi diras. Sed mi komprenis tiel, kion vi farus vojerarinte?

- Nu tion, kion en Vieno, se mi ne konas iun straton. Mi demandus aŭtiston, kiu bone orientas sin. Tiu ŝoforo, kiu veturas ĉi tie, eble scias la direkton.

- Eblas. Sed li estas fripono, kiun oni subaĉetis, ke… li agu kontraŭ mi.

- Promesu al li, Herr graf, pli altan monon, kaj li laboros al vi. Kiam mi vidas taŭgan, junan staliston sur la stando, ĉe la sitelo, tiam mi promesas al li dudek krejcerojn pli multe, kaj li venos al mi labori. La fiakristoj nomas ĝin „ruze logi" iun. Hot, Dirndel… No woat… so a narrischez Schimmel, faflucht noamohl!

Li rapide ŝraŭbis la bremson, kaj sekvis la fiakron piedpaŝante, ĉar Dirndel, Dio scias, kial, komencis promeni dum manĝado.

La grafo mire rigardis sur la koĉeron. Hm… Saĝa knabo estas la olda Strudl. Ĝi estas vere genia penso. Kaj simpla.

- Kie povas esti tiu aŭtisto?

- Li staras tie – li montris per sia vipo -, ne malproksime. Oni vidas lin nur malfacile, ĉar ne lumas la malantaŭaj lampoj de lia aŭto. Pro tio li havos problemon, se konstablo ekvidos tion. Diendl, du Zau! Heee!… Hooot!…

- Ĉu li staras tie?

- Jes… Li ĉiam bivakas nokte tiam, kiam ni. Frumatene li veturas plu. Eble vi pravas, ke li preparas ion ruzan.

- Ĉu vi komplezus venigi lin ĉi tien?

- Warum den nett? Mi pensas, ke li ĉiutage atendas nur tion. Der kerl vird herkumma!… Ĝis tiam bonvolu resti apud la fiakro. Oni monpunas min, se mi lasas ĝin negardita.

La ruĝa, dika homo ekiris fiere paŝante en la dezerto. Li kunportis sian vipon. „Oni facile ŝtelas ĝin" – li kutimas diri tion.

Pasis nek kvin minutoj, kaj du reflektoroj eklumiĝis en la malproksimo, poste tiuj ekiris al la tendaro. La aŭto ruliĝis singarde por ne surveturi la dise kuŝantajn homojn.

- Kion li volas? – demandis Anna, kiu subite aperis apud li.

- Mi parolos kun tiu sinjoro. Ni povas fari nenion alian. Se li estas rabisto, ni devas gajni lin por niaj celoj. Ni vojeraris Anette.

- Ĉu… paroli… kun rabisto?

- Ni bezonas gvidanton.

- Sinjoro Guliver proksimiĝis portanta ĉemizpantalonon, svingante sian ĉapon kun okulvitroj en la mano. Ĉe la lumo de ekardanta cigardo subite videbliĝis liaj firmkaraktera, ridetanta buŝo kaj sanaj dentoj en la mezo de lia vizaĝo.

- Bonan vesperon, sinjoro grafo. Mi salutas vin, fraŭlino Lorien.

Ili staris kelkajn sekundojn. Sinjoro Strudl sidinte sur la ŝtupon de la fiakro, elprenis sian dratkadran nazumon kaj legis ĵurnalon ĉe la lumo de la veturilo.

- Sinjoro – komencis Sir Yollan -, mi bezonus gvidanton. Mi opinias, ke ni vojeraris.

- Se vi marŝas laŭ la vojmontrantaj palisoj, certe. Mi veturis per mia aŭto kelkajn kilometrojn antaŭen. Kaj tie jam tute ne estas palisoj.

- Mi ne povas preterparoli – diris la grafo. – Mi diras sincere, kion mi volas: se kiu ajn subaĉetis vin por tio, ke vi agu kontraŭ mi, nomu tiun monsumon, kiun vi ricevos aŭ esperos el la profito, kaj mi promesos pli multe, por ke vi aliĝu al mi.

La junulo pensadis.

- Kion oni promesis al vi por tiu ruĝa aktujo, kiun la grafo kunportas konstante, kaj momente ĝi kuŝas apud li sur la planko – diris la knabino agreseme.

- Ĉu ni vere kunvenis tial, ke vi interesiĝu pri miaj privataj aferoj? Temas pri tio, ke vi serĉas gvidanton por via komuna karavano.

- Vi bone scias, ke ĝi ne estas komuna! Vi ja portis mian pakaĵon post min. Ne volu inciti la vantecon de la grafo kontraŭ mi! Estas ridinde – diris Anna aldone kaj montris sian dorson al li. La junulo ridetis.

- Mi devas scii unu aferon – deklaris Sir Yolland.- Vi vere sekvas min, kaj ĉu… vi estas identa… kun tiu…

- Ĉu vi estas identa kun la rusa gangstero Sokoloff, kiu estas la dekstra mano de Biskra, respondu! – kriis la knabino.

- Mi respondas. Mi estas identa kun la rusa gangstero Sokoloff, kiu estas la dekstra mano de Biskra, kaj mi ricevos dudek mil pundojn por tiu aktujo, kiu kuŝas apud vi.

- Ba, ne ridindigu vin ! – kriis la knabino. – Ĉu ĝuste Biskra pagos dudek mil pundojn? Temi pri tiom da mono tute ne eblas. Prefere ni returniĝos. Ĉiu pensas, ke la bonfido kaj malavareco de la grafo estas senlima… hoho!… Vi tre eraras pri tio. Ni ne permesos tion – ŝi finis sian parolon kolere. Dume ŝiaj rozkoloraj naztruoj tremetis. La grafo rigardis sur ŝin konsternite.

- Vi demandis, mi respondis. Oni promesis al mi dudek mil pundojn, se mi akiros tiun aktujon. Ĉar mi estas profesia ĉarlatano, kaj amikeco ne ligas min al Biskra aŭ al lordo Harlington, mi do akceptos pli bonan, mi emfazas, pli bonan proponon.

- Kaj kio garantios min – demandis la grafo -, ke vi vere estos mia homo? Ne koleru, ke mi eldiras sincere, nek vi mem neis…

- Ho, nur bonvolu – respondis la junulo kun ĝentila rido. – Mi ne estas sentema. Kio estas la grantio? Nu, sidigu fidindan homon malantaŭ min en la aŭton kun ŝargita revolvero. Se mi antaŭos vin pli ol ducent metrojn, tiu homo mortpafu min. Se vi ne trovus akvon, se oni atakus vin, mi estus la unua, kiun oni mortpafus. Mi estos hostaĝo. Sed la plej bona garantio estos por vi, Sir, se vi faros pli bonan proponon, ol Biskra, aŭ Harlington.

- En ordo. Ĉu vi kontentiĝos per skribaĵo, kiu tekstos tiel, se mi atingos la landon Urungi en Sudano kun mia armeo, tiam vi rajtas postuli dudek kvin mil pundojn de mi?

- Ĝi estos tute sufiĉa. Tiel mi perdos dudek kvin pundojn se vi mortos, do estas eksludite, ke kia ajn malbono trafu vin, Sir. Ĉar nenio alia interesas min en tiu ĉi vivo, ol la mono.

- Mi estas sklavo de la formalaĵoj – respondis la grafo -, tial, se vi permesas, mi informos miajn oficirojn pri tiu ŝanĝo.

- Sed koncerne mian personon, eble ne diru la veron al ili, Sir – petis lin la aŭtisto.

- Kiel? – li staris embarasita. – Ĉu vi volas tion, ke mi mensogu?

- Militestro rajtas havi sekretojn.

- Hm… Jes. Estas iom malfacila tasko, aserti malveron. Eble ni konsentu en tio, ke mi mencios vin nur kiel gvidanton, kaj vi mistifikos la ceterajn al tio.

- En ordo…

La grafo iris al la marŝalo.

Kiam li restis sola kun la knabino, ili longe rigardis en la okulojn de unun la alia.

- Mi opinias, fraŭlino Lorien, vi faras malbone, kiam vi agas kontraŭ mi. Ni povu kunagordi niajn interesojn.

- Mi ne havas la saman intereson kun homo, kiu estas Sokoloff – ŝi respondis malvarmkondute, sed trankvile kaj ekfumis cigaredon.

- Vi faras malbone, se vi batalas kontraŭ mi. Mi forigos vin el mia vojo tiam, kiam mi volas. Ke mi ne faris tion ĝis nun, ĝi estas nur la signo de mia persona simpatio. Sed se vi krucos mian vojon, mi mortigos vin malvarmsange.

La knabino malestime forigis la cindron de sur sia cigaredo.

- Ĉu vi pensas, ke mi timas vin?

- Mi ne kredas tion, ĉar tiutempe mi legis riport-serion kun granda intereso, kiu temis pri naŭ politikaj murdoj de fraŭlino Adrien Grovescu.

La virino paliĝis kaj timiĝinte rigardis al la aŭtisto.

- Ĉu vi ne volas… perfidi min?… - ŝi flustris raŭke.

- Ne. Sed mi sciigas al vi, ke vi estas en miaj manoj, kaj se vi ankoraŭfoje provos kontraŭagi, tiam mi senmaskigos vin – li finis tion afable, ĝentile, poste li klinis sin ridetante kaj elpaŝis el la tendo.

Saharo, kiel ia subite glaciiĝinta maro, kuŝis senmove en la blanka ardo de la luno, kaj ie ekhenis ĉevalo…

DEKTRIA ĈAPITRO

1

Interese, kiel pli glate iris ĉio, kvakam sinjoro Guliver ne partoprenis la direktadon. Li veturis per sia aŭto antaŭ la kompanio, fajfante, cigaredante, kelkfoje li elprenis ion el sia poŝo kaj manĝis. Eble ĝi estis ĉokolado aŭ kekso. Li tute ne volis ordonadi.

Iafoje li diris ion trankvile al Durien aŭ al la marŝalo, ekzemple, ke la ŝargo de iu ĉaro peziĝas iome sur la dekstran radon, oni ĝustigu tiojn, aŭ li atentigis ilin, ke la kirasita aŭto ne veturu avane, ĉar tiel oni devas enspiri multe da polvo, sed cetere li zorgis pri nenio.

Do, dio scias, kiel ĝi okazis. Estas fakto, ke post la apero de sinjoro Guliver ĉio fariĝis pli bona. Eĉ la sento de la homoj pri la sekureco pliiĝis. Fine ili havis gvidanto, kiun ili povis sekvi trankvile. Ili sentis instinkte, ke li ne eraros.

Ne! La homo en pantalonĉemizo vere ne estis severa kaj ne ordonadis. La unuan tagon li diris nur tion al la ĉirkaŭstarantoj:

- Mi petas vin, ĉiu homo ricevos nur unu kaj duon litron da akvo potage. Bonvolu porciigi tion, ĉar ni ne havas pli mulon.

- Ĉu se iu estas soifa? – demandis Kratochvill indigne, tenante sian romanon strikte sub sia akselo.

- Tiu soifos. Se vi ne observos miajn ordonojn, kompreneble mi povas transdoni la direktadon al lia ekscelenco marŝalo Podvinecz aŭ al kapitano Durien.

Ne estis pli da kontraŭdiroj. La aŭtisto sidis al la direktilrado, apud la komisiitan gardiston, kiu estis dicidiĝinta ĝis la ekstremoj kaj tenis malgrandan, belgan, seskuglan revolveron en sia mano.

Anna estis la moroza supergardisto.

Oni ne povis vidi la revolveron de la knabino el ekstere. Ŝia manplato kovris ĝin. Sed eĉ por momento ŝi ne deprenis sian fingron de sur la ĉano. Ŝi sidis tiel apud sinjoro Guliver, kiel ili nomis plu la aŭtiston. Ŝi estis la gardisto. Sir Yolland neniel volis konsenti pri tio, sed Anna konvinkis lin.

- Vidu, ne kruda forto estas bezonata al tio, sed inteligenteco. Kiun vi volas sidigi tien? Ĉu Pochon-on, kiu estas ĉiam ebria, aŭ la maljunan marŝalon?

Grafo de Denham diris nenion, kaj la knabino veturis avane en la aŭto. Baldaŭ Sir Yolland sentis tiel, ke li ankoraŭ ne estas kontenta pri tiu situacio. Ne la malkonfido ĝenis lin, sed io tute alia afero… Kio?

Li ne konis la vorton, ĵaluzo…

2

- Kion vi farus ekzemple – rimarkis la viro ridetante -, se mi akcelus kaj forrapidegus de antaŭ la kompanio?

- Mi mortpafus vin senhezite – respondis la knabino.

- Ĉu vere? Mi povas supozi tion pri vi.

Ili jam marŝis profunde en Saharo. La mortiga varmego kaj la polvo terure suferigis la malgrandan roton. Ili marŝis dum tagoj sen renkonti iun. Kaj se kelkfoje unu-du indiĝenoj piedirantaj aŭ rajdantaj sur kamelo vidis ilin, tiuj haltis kun malfermita buŝo. Dume jam disvastiĝis la famo de la Nevidebla Legio, la araboj rakontis la legendon en la malpli grandaj fortikaĵoj, tiuj kunportis la strangan legendon de urbo al urbo pri enigma roto, marŝanta en tute nigra uniformo, kun arĝenta trumpetisto.

Ili jam iris la trian tagon per konstanta rapideco, kiam subite aŭdiĝis pafoj en la malproksimo. La malgranda aŭto veturis antaŭ la roto en la kutima distanco ducent metra.

- Mi devas rigardi, kio okazis – diris la homo, portanta pantalonĉemozon. – Permesu, ke mi veturu pli rapide.

- Se vi pligrandigos la distancon nur per dek metroj, mi trapafos vin! – respondis la knabino, kaj la pistolo senteble premiĝis al la flanko de la pantalonĉemizulo.

- Bone… - li diris kaj veturis plu trankvile. Ĉe sablomonteto li turnis la direktilradon iom flanken, la du dekstraj radoj suriris ties deklivon, la aŭto oblikviĝis… Anna instinte kaptis la karoserion per sia mano. En la sekva momento la viro forprenis ŝian revolveron, kaj dum la aŭto deglitis de sur la montetdeklivo, li lerte ĵetis ŝin el la aŭto, lasinte ŝin sur la supron de mola sabloduno, poste li prenis rapide la direktilradon, donis gason, kaj la aŭto forveturegis dum momentoj.

Ĉio ĉi okazis mirinde rapide, dum kelkaj sekundoj. Kiam Anna side leviĝis sur la sablomonteto, la aŭto jam estis nenie. Ŝi povintus ŝriko pro kolero kaj honto. Ŝi devis atendi la proksimiĝantan roton tie.

- Kio okazis? – demandis la grafo paŝinte el inter la soldatoj.

- Via gvidanto… - ploris la knabino kolere -, mi ja diris, ke vi ne parolu kun li! Li fuĝis, kaj…

- Sed jen li venas – kriis Fleur de Bac. Kaj rigardinte en la direkton de la etendita mano de la bier-veselkapitano, ili ekvidis la reveturantan, malgrandan aŭton. Ĝi haltis antaŭ la kompanio, kaj sinjoro Guliver-Sokoloff elsaltis.

- Nu – komencis la grafo -, kion vi faris…

- Aŭdinte pafojn, mi veturis tien por rigardi, kio okazis. Mi opinias, Sir, nek vi pensus bona ideo, kunporti virinon en tia situacio. Ĉu ne?

Li estas stranga figuro! Ĝis nun li ĉiufoje klarigis per unu frazo tion, kion li volis.

- Sinjoroj! Du kilometrojn de tie ĉi oni logis en kaptilon tĉmenton da legianoj. Ili ĉiuj estos maskritaj, nericevinte rapidan helpon. Mi iros helpi al ili. Kiu volas, tiu venu kun mi!

- Mi petas vin… – balbutaĉis la marŝalo –, nia kontrakto temas ne pri tio…

- Mi petas vin… - balbutacis la marŝalo -, nia kontrakto temas ne pri tio…

- Ĝi ne estas afero de kontrakto – rimarkis la grafo trankvile. – Kiu estas viro, tiu kompreneble sekvos tiun ĉi sinjoron, nelasante masakri francajn soldatojn en nia proksimo. Mi ekzemple iros kun vi – li finis kaj pagis laŭ la taksametro.

- Per la sep sakrametoj! – kriis Fleur de Bac. – Neniu diru, ke malkuraĝaj homoj kunvenis ĉi tie!

- Idiotaĵo! – kriis Polchon. – Ni ĉiuj iros! – Ilia plimulto jese murmuris. Ili vere ne estis malkuraĝaj homoj.

- Nu ek – kriis la grafo, kaj nun la unuan fojon li eltiris sian glavon dum la daŭro de ilia marŝado: Ruĵenoar!

Ĉiu staris en atentopozo.

- Fetvoĵoe!

La trumpetisto ludis la marŝon Toreadoro, kaj ili ekiris sekvinte la grafon. Durien, la marŝalo kaj sinjoro Wilkie pensis, ke ili havas la devon resti por defendi la virinon. Baldaŭ revenis leŭtenanto Renoir plorante. Apenaŭ ŝi sekvis la trupon, sinjoro Guliver paŝis antaŭ ŝin el malantaŭ monteto, barante ŝian vojon.

- Leŭtenanto Renoir! Tuj reiru al la veturilo. Ĉu vi komprenas?

La leŭtenanto ruĝiĝis.

- Sed… vi ja ne… ordonas…

- Jes. Mi ordonas tion. Kaj se ĝi ne sufiĉas, mi malkaŝos vin antaŭ la grafo… Sir Yolland ne bezonas oficiron, kiu estas virino…

La leŭtenanto turniĝis kolere kaj lasis la fremdulon tie. Li longe postrigardis ŝin ridetante, poste li rapidis gvidi la taĉmenton kune kun la grafo. Li ŝatintus malkonsili, ke la grafo gvidu la homojn, sed tio ne sukcesi. Li iris tiel, kun rekta dorso, trankvile kaj rezolute, ke kiu ajn lia praulo povintus lin envii. Sinjoro Guliver aspektis tre strange, ĉar li zonis glavon super sian ĉemizpantalonon.

Ni jam konas la legendan historion. La soldatojn, premitajn en la hamadanon, en la lasta momento savis mirinda apero de kompanio, portanta nigran vestaĵon. Sonis la marŝo Toreadoro, la soldatoj, gvidte de monokla kapitano de fajroestingistoj venkis la hordon, kaj ili rapide retiriĝis de antaŭ la soldatoj, proksimiĝantaj el la direkto de la valo.

Kaj tiuj vidis la miraklon, pri kio jam de semajnoj oni flustradis en Afriko. La Nevidebla Legio marŝis antaŭ ili, kun la fantomeska fiakro…

3

Ili triope sidis en la tendo. La grafo, Sokoloff kaj Anna. Sokoloff disvolvis la mapon kaj signis per ruĝa linio la faritan vojon. La grafo atentis lin langvore. Kelkfoje li etendis sian manon al la ŝultro, kie araba glavo, feliĉe per ĝia plato, frapis sur lin. Granda ekimozo restis surloke de la bato, kaj Sir Yolland fartis tre malbone. Sed li cigaris. Li opiniis nekonvena al lia digno montri kion ajn el sia doloro.

- Ni jam faris grandan vojon. Nun ni estas ĉi tie. Ni travagis al oriento, kaj se ni marŝos tiel rapide, post dek tagoj ni atingos landon Urungi.

- Kial ni ne tuŝis tiujn oazojn? – demandis la knabino nervoze.

- Ĉar mi ne ŝatas viziti pli grandajn oazojn, kaj tio estas proponinde nek al la roto. Legio en nigra vestaĵo, mi pensas, eĉ tiel povis veki sufiĉe grandan sensacion.

- Jes… Sed nia provizo bezonas refreŝigon – opiniis la grafo kaj ĝemis.

- Ĉu via ŝultro doloras? – demandis la knabino.

- Ne… Tio estas bagatelo.

- Ni povas zorgi pri la rekompletigo de la provizo – daŭrigis sinjoro Guliver – ĉe Idelis. Nek tie mi proponas enmarŝi en la oazon. Sinjoro Wilkie kaj mi veturos antaŭen per ĉaro, kaj aĉetinte ĉion, ni iros plu.

Li eliris el la tendo, kaj laŭkutime li ĉirkaŭiris en la tendaro. Ĝi jam ne estis malregula. La suboficiroj lernis de sinjoro Guliver, laŭ kia formacio ili devas bivaki. Iom post iom ili elformiĝis soldatoj, kvazaŭ grupo da homoj havus kapablon instinkte fariĝi soldatoj en okazo de konstanta danĝero.

Nur tiu malmolnuka Polchon kondutis kun nekomprenebla malkonfido. Li deklaris, ke li estas ĉefleŭtenanto, kaj parvenua aŭtisto ne ordonadu al li. Oni tuj donu rumon al li, ĉar li rompos la kapon de iu.

La ĉemizpantalonulo trankviele metis sian manon sur lian ŝultron.

- Alo… Monsieur… Ne bruegu, ĉar vi amare pentos tion!

- Nu! Ĉu eble de vi, he?! Ĉu vi pensas, ke mi timas?

- Mi pensas nenion, sed vi estas oficiro en tiu roto, kaj vi devas montri bonan ekzemplon, cetere vi ne meritas vian rangon.

- Ĉu vi volas scii, kio vi estas?

- Ne. Kaj mi avertas vin, se vi ofendas min, tiam mi trapafos vin – ankaŭ tion li diris trankvile. Li havis nek pistolon, kaj la rondbarbulo tamen ekkonsternis.

La marŝalo alpaŝis ilin.

- Iru, Polchon, kaj… - li diris trankvile.

- Nek vi ordonadu, maljuna frenezulo, ĉar…

Polchon tute freneziĝis. La alkoholaĵo haladzis el li, kaj lia sango bolis por frapi. Sed li apenaŭ eldiris la vorton „maljuna frenezulo”, kiam la ĉemizpantalonulo jam kaptis lin:

- He! – li kriis. – Kiel vi parolas kun via superulo?!

- Kio… Ĉu vi kuraĝas… - kaj li saltis al li, sed la aŭtisto tordis lian brakon, kaj la maristo turniĝis ĉirkaŭ sia akso, poste Guliver pidebatis lin tiel, ke li forflugis.

Kiam li ekstaris ŝanceliĝante, tubo de revolvero direktiĝis al li. Senmovaj okuloj brilis en la nokta dezerto, kiel ili timiĝinte ĉirkaŭstaris la du homojn. La marŝalo etendis sian manon al sia barbo. La ardaĵo de la estingiĝantaj fajroj de la vespermanĝo prilumis ruĝe la grupon.

- Kaporalo!

- Tiu homo ofendis kaj tuŝis vian superulon, la sinjoron marŝalon. Forprenu lian glavon kaj ŝnurligu lin. La sinjoro kapitano raportu la aferon al la grafo. Ni estas en la dezerto, temas pri ĉies vivo, kaj se ni ne povas estis soldatoj, tiam ni moraĉos ĉi tie. Kaporalo! Ĉu vi ne aŭdis, kion mi diris?! Ŝnurligu lin!

Ankaŭ Polchon konsterniĝis sub la sugestio de la sceno.

- Kio?… - li diris kaj antaŭenpaŝis. Liaj du grandegaj pugnoj kiel po unu granitpecoj pendis ĉe la fino de liaj brakoj… - Ĉu ŝnurligi… min?!

- Mi atentigas vin, Polchon – daŭrigis la ĉemizpantalonulo akravoĉe -, se vi faros eĉ unu movon, mi tuj trapafos vin. Kaporalo, Toutain, Wolfram, ŝnurligu tiun homon!

La malluma, nokta dezerto donis timigan fonon al la bildo. Wolfram kaptis la ruĝulon, Toutain kaj King Roswang ekprenis liajn brakojn, kaj ekkonsciiĝinte, li jam kuŝis ŝnurligite.

Durien raportis la aferon al la grafo.

Sir Yolland aŭskultis lin kun rigida vizaĝo.

- Ni starigos tiun homon antaŭ la militan tribunalon! – Fariĝis granda siletno. Ĉu tiu anglo freneziĝis? – Sinjoro Guliver pravis. Ĝi estas Saharo. La ŝerco finiĝis. Ni faras militan ludon kun la morto. Bonvolu bone rimarki tion!

Kaj aŭrore la soldatoj viciĝis al „ekzekuto. Blanka strio dividis la ĉielon de la tero ĉe la malproksima rando de la nigra Saharo. Estis malvarmo. La grafo mallaŭte legis, ke ĉefleŭtenanto Polchon estas kondamnita al degradigo pro rompo de la diciplino.

La ŝnurligita maristo venis mortepala inter la gardistoj, kiuj havis bajoneton en la mano. Li ĉirkaŭrigardis spiteme kun fulmaj okuloj, sed li diris nenion! Alia estus la situacio, se la blank-denta civilulo starus antaŭ li. Sed la grafo, Dio scias… Iel ne estis eble paroli kun li insolente.

- Ni degradis vin. Se ankoraŭfoje okazos io, tiam ni eliminos vin el la armeo ĉe la plej proksima oazo. Ĝi koncernas ĉiun. Nur soldatoj povas havi lokon inter ni. – Dirinte tion, li deŝiris la insignojn de la rango, la rozeton de sur lia ĉapo, li detranĉis liajn butonojn kaj rompis lian glavon surgenue.

Ili satris mute.

Kratochvill, la remburisto, timeme flustris al Duke of Roswang:

- Ĉu ne okazos… pendumo?

La suno leviĝis kun rozkolora, flava lumo. Ekmarŝo! La pantalonĉemizulo preteriris la vicon.

- Aranĝiĝu! La kolumno estu rekta!

La homoj aranĝiĝis, kaj la marŝkolono staris laŭregule.

- Fetvoĵoe!

Ili ekiris. Malantaŭe, ĉe la fino de la kolumno la degradita Polchon marŝis moroze…

4

Vespere Jeremio Oblath denove rigardis la ŝultron de la grafo kaj diris per emociiĝinta voĉo, plena de kaŝita espero: eblas, ke operacio estos bezonata.. Sir Yollan havis febron.

Iomete li malgrasiĝis dumvoje, kaj lacaj, lanvoraj trajtoj sidis sur lia vizaĝo, kiel li kuŝis sur sia kovrilo. Anna rigardis lin kun maltrankvilo. Ŝi sidis apud la kovrilo de la grafo. La prauloj de Sir Yolland ne havis kaŭzon por honti. La grafo ne montris doloron, li forte tenis sin. La varmego, la multe da problemoj, zorgoj, malfacilaĵoj, vundiĝo ne venkis la dorlotitan homon eĉ por momento, liaj maniero, voĉo, mieno estis same trankvila kaj dignoplena.

La ruĝa aktujo estis ĉemane apud Sir Yolland. La knabino rigardis la aktujon, poste la grafon.

- Ĉu vi fartas malbone?

- Ne. Mi nur elĉerpiĝis… iomete. – Li longe rigardis la knabinon per siaj lacaj okuloj.

Doloris lin, ke li estas malforta.. Li fermis siajn okulojn. Sibite ŝi sentis tiel, kvazaŭ mula, tepida tuŝo trakurus lian manon. Kio ĝi estas?

Ĉu tiu knabino karesis lin?!

Li suprenrigardis, sed Anna sidis sur sia loko trankvile. Ĉu li demandu ŝin? Eh, ŝi certe neos tion. Dio mia… Kial mensogas ĉiam tiu kara, bela knabino? Li jam antaŭe abomenis la momenton, kiam li devas konsciiĝi, ke la Multnoma Anna estas ĉarlatanino. Ĉar iam ĝi sendube evidentiĝos. Ŝi ŝtelos lian aktujon.

- Fraŭlino… Fraŭlino… Anna. Ne prenu kiel ofendon, se mi nomas vin laŭ la baptonomo, sed rilate vian familian nomon mi havas nur malklarajn supozojn.

- Nomu min kiel vi volas – ŝi diris milde.

- Se vi estas ĉi tie tial, ke vi forportu tiun aktujon…

- Ĉu tiam?

- Bonvolu preni, jen estas la aktujo. Ĝi… estu la via. Honeste. – Kaj li transdonis ĝin.

La knabino longe fiksrigardis antaŭ sin. Ŝia vizaĝo fariĝis strange ruĝa.

- Dankon, Sir – ŝi respondis mallaŭte kaj ŝi devis graki. – La aktujo apartenas al vi. Mi ne estas ĉarlatanino.

Ŝi metis sian manon sur la manon de la grafo. Sir Yolland (la eterna sinjoro de Denham) fermis siajn okulojn kaj hontis, ke la ektuŝo de la knabino tiel agrablas al li…

DEKKVARA ĈAPITRO

1

Polchon parolis kun neniu. Liaj okulo fulmis sovaĝe, kiam oni alparolis lin. Kelfoje li murmuris al si mem, sed cetere li plenumis sian taskon bone kiel senranga soldato, nur iom pli forte li premis la pipon per siaj dentoj, kaj li iradis en la tendaro tiel, kiel kanibalo.

En la malproksimo aperis oazo. Ĝi povis esti nur Ideles. Ili ĉiuj sciis, ke tie okazos longa ripozo. La ĉemizpantalonulo bazigis ĉiujn instigon kaj bonon al tiu tendumado. Tiel li provis reanimi la roton, ĉiam pli malesperiĝintan. Li iris de homo al homo, parolis kun ĉiu, aŭskultis ilin kaj ordonis aŭ konsolis.

- Kial vi pendigas vian kapon, sinjoro Kratochvill? – li demandis la remburiston, el sub kies akselo videbliĝis griza dosiero. Li gardis sian romanon en ĝi.

- Mia trunko iomete… mi pensas… - li spiregas kun trosekiĝintaj lipoj, ĉar de kiam ili devas porciigi la akvon, ili tre ofte soifas. – Doloras miaj trunko kaj skapolo. Antaŭ ol fariĝi verkisto, mi devis multe labori sur ŝtupetaro, tiam mi sentis ĝin en mia sakro.

- Ĉu vi ne ĉiam estis remburisto?

- Mi estis ankaŭ murfarbistro… Laŭ la profesio mi estas multflanka, antaŭ ol mi fariĝis verkisto. Bedaŭrinde mi povas skribi nek ĉi tie. Kvankam mi venis en Saharon tial, ĉar la infanoj bruadis tie, kie mi loĝis. Ĉi tie ne estas bruado, sed mi ne povas skribi, nur marŝi kaj marŝi…

- Timu nenion, kiam ni atingos la celon, vi povos fini vian romanon komforte.

- Mi jam finis ĝin… mi devas fari nur kelkajn korektojn. Mi sentas tiel ĉe kelkaj partoj, ke la karaktero de la ĉefrolulo ne estas klara. „Ŝoforo ne estu amanta” – ĝi estas ties titolo. Bonega, ĉu ne?

- Ĝi sonas bone.

- „Ŝoforo ne estu amanta”, en du volumoj. Originala historio. Malriĉa knabino… amas la ŝoforon… Interesa, ĉu ne? Kaj post neatendita okazo la knabo edzinigas ŝin.

- Interese, sed estos iu, kiu konjektos tion.

- Ne nur tio estas stranga. La romano havas daŭrigon. Ne estas do feliĉa fino, ĉar ankaŭ la leganto vidas, kio okazos post la geedziĝo. Kaj… tio estas malgaja.

- Hm… Estas io en ĝi.

- La heroo… drinkas kaj ne volas labori. Prefere li verkas romanon; ĉiuspecajn idiotaĵojn, kaj la edzino ŝatus, se li laborus. Dume la familio ruiniĝas, kaj naskiĝas infano… Sed la ŝoforo restas tiu, kiu li estis…

- Bonege. Bonvolu transdoni tion, por ke mi legu ĝin. Tamen estas bezonata objektiva kritikisto.

Li tuj transdonis la romanon.

- Feliĉe…

- Dankon. Ĉu vi estas edziĝinta? – demandis la ĉemizpantalonulo en la mano kun la griza dosiero.

- Mi divorcis. Mia edzino malŝate rigardis, ke mi verkas romanon. Ŝi ĉiam volis tion, ke mi perlaboru monon per abomenida remburista laboro. Ŝi ne komprenis, ke ŝia edzo estas verkisto…

2

Vespere la grafo fartis pli bone, li estis nur tre langvora. Li dormis, kiam la aŭtisto paŝis en lia tendon. Sinjoro Guliver ne vekis lin. Sidiĝinte apud lin, li komencis legi la romanon de Kratochvill, ke li povu diri kelkajn vortojn al la verkisto pri ĝi. La grafo dormis pli ol duonhoron, kaj li vekiĝis tiam, kiam Anna paŝis en la tendon.

- Mi opinias – diris la knabino -, Sir Yolland bezonas kelkajn tagojn da ripozo ĉi tie en la oazo.

- Mi ne konsilas tion – respondis sinjoro Guliver. – Se ni volas atingi nian celon antaŭ la pluva sezono, ni povas malfrui maksimume du tagojn.

- Vi pravas… - diris la grafo mallaŭte. – Mi iros plu.

- Nu el tio estos nenio! – diris la virino kolere kaj foriris. Sokoloff klinis sin. Ankaŭ li eliris.

Kratochvill atendis lin ekstere ekscitite.

- Nu? – li demandis.

- Ĝi estas tute bona. Precipe tiu parto, kiam la policisto notas la ŝoforon pro kontraŭregula avanco.

- Ĉu vere? Tiu parto sukcesis bone. Mi dankas vin pro la rekono!

Kaj li remetis la dosieron en la aktujon trankviliĝinte. Antaŭ la ekmarŝo la ĉemizpantalonulo kontrolis la ĉarojn, la aŭtojn kaj ordonis doni ekstan rumporcion al la homoj. Li iris al Polchon kaj haltis apud li.

- Vi estas forta kiel bruto – li diris rekone -, mi vidis, kiel vi levis la ĉaron, sinkiĝintan en la sablon.

Polchon kraĉis de apud sia pipo.

- Dum la packontrakto Brest-Litovski mi hazarde vangofrapis telegrafiston, kiun kaptis koreo.

Li proponis cigaredon al la degradita ĉefleŭtenanto. La ruĝulo longe rigardis la cigaredujon kuntirinte siajn okulojn, poste li elprenis iun kaj metis ĝin apud sian orelon. Multaj homoj rigardis la scenon de malproksime. La ruĝulo, de kiam estis „degradita”, iradis ĵetante tiajn ekrigardojn, ke oni timis pri la vivo de la pantalonĉemizulo.

Sinjoro Guliver frapetis la ŝultron de subkaporlaro Izabela, kiu havis brunan vizaĝon kaj krudan voĉon.

- Mi vidis, ke vi portis du fusilojn sur viaj ŝultroj. Ĝi estas terura fortostreĉo en la dezerto. Mi ne scias, kiel vi faris tion?

La subkaporalo ruĝiĝis. Ŝi volis diri tion: „Vane. Patrino tamen estas patrino.” Sed ŝi diris nenion. Ŝi nur ĵetis flankan rigardon al Duke of Roswang, kiu kuŝis sur la tero dorse kaj ronkis.

Post alia seshora marŝado ili starigis „grandan tendaron”. Malproksime videbliĝis la oazo Ideles. La armeo estis ĉifona, laca, polvokovrita, elĉerpiĝinta. Ili vidis sur la mapo de la aŭtisto, kiel grandan vojon ili faris. Oazo Ideles estis ĉe la limo de Sudano. Ili marŝis duoncirkle al la orienta parto de la dezerto, de tie produnde al sudo.

Ankaŭ sinjoro Strudl iom lace pendigis sian kapon. Li veturis dum la tuta vojo en helgriza pantalon kaj en cilindra ĉapelo. Li fumis cigaredon Virginia. Ĉar kiam li eksidis kaj viŝis sian frunton, li tuj elprenis cigaredon Virginia kun longaj pajleroj kaj ekbruliginte ĝin, li profunde enspiris ties fumon. Sidante sur la ŝtupo de la fiakro, li legis tiun ĵurnalon, kiu, ŝajnas, estis neelĉepebla pri novaĵoj. Kelkfoje li murmuretis en si mem, sur liaj ruĝaj vangoj li glatigis siajn blankajn, densajn vangobarbojn, kaj li salutis la grafon jene:

- Ist da aba warm… hergotnoamohl… phu!…

Polchon vizitis la marŝalon.

- Atentu min. Mi ŝatus diri kelkajn vortojn al vi.

La marŝalo ege timiĝis.

- Mi petas vin… mi…

- Silentu! Jen rigardu. – Li montris ion sur sia manplato ĉe la lumo de iu lampo de la veturilo. – Ĉu vi rekonas ĝin?

La marŝalo rigardis tien, poste li palaiĝis kaj timeme balbutaĉis:

- Sed ĝi ja estas…

- Silentu, vi, maljuna pajaco! Eĉ unu vorton ne! Mi diras nur tion, ke ĝi apartenis al la aŭtisto!

- Sankta Dio!

3

La grafo aspektis tre laca. Lia ŝultro inflamiĝis. Liaj vangoj estis enkaviĝintaj, kaj du febro-rozoj floris sur tiuj. Malhelaj ringoj videbliĝis ĉirkaŭ liaj okuloj.

La aŭtisto kaj ĉiuj oficiroj estis en la tendo.

- Sir – diris la marŝalo -, ne estas bone, se vi riskas vian vivon, mi ne scias, kial vi ne ripozas en Ideles.

- Mi scias – diris la aŭtisto. – Antaŭ la pluva sezono ni devas esti sur la tereno de Urungi, cetere ni ne povos penetri la ĝangalon, se nur la duono de la kompanio ne volas morti tie.

- Vi pravas – diris la grafo -, ankaŭ mi samopinias.

Antaŭ la tendo aŭdiĝis tintado de armiloj, poste enpaŝis ok sovaĝaspektaj homoj: King Roswang, subkaporalo Izabela, Fleur Bac, Kratochvill, Bayonne, Huben kaj Wolfram. Inter ili estis ankaŭ Toutain (kiu perdis sian duonon da vizaĝo).

Anna gvidis ilin!

- Kio ĝi estas?! – demandis la grafo mirante.

- Ribelo! – respondis Anna.

4

La ĉemizpantalonulo reakiris sian sinregon la unua.

- Ĉu vi estas la gvidanto de la ribeluloj?

- Jes. Miaj homoj estas decidiĝintaj, kaj ili ne konas indulgon, se iu kontraŭstaros.

- Kratochvill kapjesis aplombe.

- Tiel, kiel vi aŭdas tion.

- Jes – deklaris Houben, kiu tenis sian trumpeton, kvazaŭ li volus pafi per ĝi.

La ĉemizpantalonulo eklevis la tendotolon antaŭ la enirejo, kaj li mire vidis, ke la armeo ĉirkaŭas ilin en la mano kun fusilo.

- La ribeluloj deziras tion… - komencis Anna, sed la grafo interrompis ŝin.

- Mi ne traktas kun ribeluloj!

- Sed eble kun virino jes! Mi ribelis la homojn. Mi klarigis al ili, ke tiu aŭtisto eĉ tiam ricevis la monon, se vi mortos, ĉar li kontraktiĝis por gvidi la soldatoj sur la teritorion de Urungi, eble se vi tute ne venos kun ni. Sed la soldatoj ne havas tian kontrakton. Ili kalkulas je premio, kiun ili ne ricevos, nur tiam, se vi vivos. Ili do ribelis, kaj nun ili staras ĉi tie tute rezolute, postulante, ke vi ripozu minimume unu semajnon en Ideles. Via armeo deziras, Sir, ke vi gardu vian sanon. Se bezonate, ni devigas vin.

La trajtoj estis pli mildaj sur la vizaĝo de la grafo. Jen vidu la impertinentan sorĉistineton! Ŝi ribeligis ĉiun, ke li ne iri plu malsane.

- En ordo – diris la grafo -, mi ne kutimas cedi al la perforto. Sed vi multe pravas, kion vi diris. Kaj la soldatoj ne havis malbonan intencon, kiam ili negis la obeadon.

- Nu – diris la aŭtisto -, ankaŭ mi konsentas, kion mademoiselle Robespierre diris, tio estas bona.

- Ne kuraĝu min moki! – kriis Anna. – Dependas nur de mia unu vorto, kaj oni mortpafos vin aŭrore.

- En ordo. Kvankam mi avertis vin kruci mian vojon, Miss Mildstone…

La grafo miris. Kio? Ĉu pli nova nomo?! Aŭ li havas ferbron, kaj la tuto estas nur koŝmaro?…

- Jes – kriis la knabino nervoze -, ĝi estas mia nomo! Miss Anna Mildstne. Nu kaj? Jen, rakontu ĉion!

- Atendu! – kriis la aŭtisto. – Mi ne volas malkaŝi vin…

- Mi petas vin… Antaŭ ol daŭrigi… - diris Sir Yolland kun subita mansvingo. – Mi decidis resti unu semajnon kun kelkaj miaj homoj en oazo Ideles. La soldatoj tendumu ĉi tie. Eble ni ne vekos sensacion tiel. Mi petas vin, lasu min sola. Foriru… ĉiu. – Kaj li rigardis al la knabino. – Ĉiu!

Sinjoro Guliver kaj la knabino fikse rigardis en la okulojn de unu la alia.

- Senindulge traktis min – ŝi diris preskaŭ siblante. – Sed nun jam faru kion ajn, la grafo ripozos!

La ĉemizpantalonulo ne respondis. Li iris al iu ŝarĝaŭto por rigardi, ĉu ĝi ne glutas. Sed li apenaŭ atingis tien, io flugis pereter lia kolo.

Zrr… Ĉrrr!…

La ĵetita tranĉilo trarompis la glacon de la aŭto. Li tuj turniĝis en la mano kun revolvero.

Multaj homoj rapidis tien.

- Kio estas? Kio okazis? Ĉu rompiĝis io?

La ĉemizpantalonulo tenis pistolon en sia mano, kaj lia vizaĝo sangis.

- Silentu! – li kriis. Fariĝis silento. – Mi opinias, ke iu ĵetis tranĉilon al mi. Ni tuj vidos tion. Subkaporalo! Blovtrumpetigu viciĝon!

La pistono eksoni treege false, ĉar la mano de Houben tremetis, kaj li trumpetis la valson Fausto pro nervozeco: „Anstataŭ mi floreto…” Sed la trumpeto estas trumpeto: la homoj tamen viciĝis.

Dume ili trovis la tranĉilon. Ĝi falis sur la sidejon de la aŭto.

La ĉemizpantalonulo tenis la lampon en iu mano, kaj tiel li levis montrante la krimobjekton.

- Kies tranĉilo ĝi estas… aŭ kiu konas ĝin?

Polchon elpaŝis el la vico.

- Ĝi estas mia poŝtranĉilo… - kaj li kaptis ĝin el la mano de la leŭtenanto.

Komenciĝis ĝenerala kaoso. „Fripono… murdisto!…” – kriis kelkaj homoj. Wolfram, la lokomotivestro, kaptis lian kolon, Kratochvill eltiris sian bajoneton, kaj Fleur de Bac batis lin je la kapo el dorsdirekto. Ŝajnis, ke ili disŝiros lin je pecoj dum momentoj. Sed per tia voĉo, kian ili ankoraŭ ne aŭdis de la oficiroj, la aŭtisto ekstridis:

- Ruĵenoar!!!

Ili subite staris en atentopozon.

Dum la momenta paŭzo li liberigis Polchon-on el la danĝera situacio.

- Ĉi tie ne estas linĉado! Ĉu vi komprenas?! Se tiu homo ĵetis la tranĉilon, tiam ni mortpafos lin, kiel hundon, ĉar embuskmurdisto meritas tion! Sed en la armeo estas esploro! Kaj ne linĉado! Notu tion bone!

Polchon kraĉadis iom da sango, ĉar iu ekbatis lin je la buŝo, kaj liaj dentoj vundis lian lipon.

La grafo elvenis, aŭdinte la laŭtan kriadon, kaj li demande rigardis al la koĉero, kiu jam estis preta por ekveturi. Ankaŭ sinjoro Strudl estis ekscitita. Li eklevis sian ŝultron kaj turnadis sian kapon.

- I was net waz is sho wida los… dez Bagaĵ is auf amol ganz histeris gvon…

Sir Yollan sidis en la fiakron ĝemante. De tie li vidis bone, kio okazis.

La ĉemizpantalonulo staris antaŭ Polchon-on:

- Ĉu vi ĵetis la tranĉilon?

- Ne.

- Ĉu vi asertas, ke alia homo ĵetis vian tranĉilon al mi?

- Jes…

- Kie vi estis, kiam la atenco okazis?

- Sur la ĉaro. Sola. Sed se vi volas scii certe, ke mi estas senkulpa, mi pruvos tion per unu vorto.

- Diru tiun vorton!

- Nur inte kvar okuloj. Aŭ mi skribos ĝin.

Li elprenis rapide pecon da papero, skribis ion sur ĝin kaj transdonis tion al la aŭtisto. Ĵetinte ekrigardon sur ĝin, li tuj disŝiris tion je pecoj.

- En ordo. – Li turnis sin al la soldatoj. – Homoj, Polchon estas senkuzlpa. Iu atencis per lia tranĉilo. Sed ne li faris tion. Neniu kuraĝu bati lin. – Kaj li etendis sian manon al Polchon…

5

Sed la ekscitaj eventoj ankoraŭ ne finiĝis. Ĉe la piedoj de iu monteto oni trovis subite Duke of Roswang-on. Li estis sveninta. Sango fluis el lia buŝangulo, kaj laŭ Jeremio Oblath lia makzelo krevetiĝis, kiun li volis tuj operacii. Tiam King Roswang diris al li, ke li elbatos liajn okulojn, se la ektuŝos lian filon. La Diablo de la Aero eble ricevis tiel fortan hokbaton, ke iu lia dento elfalis.

La grafo sidis en la fiakro apatie, li sentis, ke la ondoj frapiĝas super lia malforteco, la okazaĵoj kirliĝas ĉirkaŭ li, kiuj ni ne komprenas, homoj ordonas, kiuj prenis la direktadon al si. La knabino ribeligis la soldatojn, la aŭtisto ordonas, kaj dume okazas misteraj aferoj… io venas… venas… kaj li estas malforta, febra… malespera.

- Sir… pro Dio… vi ja havas febron… - La knabino staris apud li. – Mi petas vin iri en la oazon. Vi devas ripozi.

- Kio okazas… ĉi tie?…

- Nek mi scias. Tiu aŭtisto… estas la diablo… Li venkis la tutan kompanion per siaj nervoj.

Aŭdiĝis granda kriado… Kio ĝi estas?

En la mezo de la tendaro aperis subkaporalo Izabela polvokovrita, sen ĉapelo, spireganta, kaj ŝi kunportis senkonscian homon sub sia akcelo, kiu ankoraŭ iomete similis al Goghur. Li ĵetis lin sur la teron.

- La fripono! – Ŝi turnis sin al la aliaj. – Kio estas al mia filo?! Li mortigis mian filon!

- Trankviliĝu, karulo, la knabo fartas bone – diris King Roswang, kaj li turnis sin al la aliaj. – Subkaporalo Cavelotti estas mia juna frato, kaj lia filo estas tiu, kiun oni batfaligis…

- Tiu homo – turnis sin Izabela al la ĉemizpantalonulo kaj montris al Goghur – ĵetis tranĉilon. Mia filo saltis al li, kaj tiu mortigis lin.

- Li vivas – trankviligis Roswang sian edzinon.

- Silentu, King! Oni povus ekstermi vian tutan familion, se tio dependus de vi! La fripono ekvidis, ke mi iras al li, kaj li fuĝis. Mi atingis kaj reportis lin.

- Hm… - rimarkis Toutain. – La mallonga vojo tre suferigis Goghur-on.

- Ĉu li ankoraŭ vivas? – demandis la aŭtisto, kaj li genuiĝis apud Goghur-on.

- Mi vere ne palpis lian pulson, kiam mi batis lin – diris la suboficiro kun la kolero de timzorga patrino. Sinjoro Guliver ekkriis.

Blankaj makuloj estis surloke de la batoj! La farbo defrotiĝis tie!

- Tiu homo ne estas arabo! – li diris poste.

- Traserĉu liajn poŝojn – ekparolis Anna malantaŭ li. Ankaŭ la grafo staris tie, iomete ŝanceliĝante, apud la knabino.

Ili rigardis la tradraŝitan arabon kun teruro. Kie la ĉemizpantalonulo frotis lian haŭton per terebinta ĉifono, tie videbliĝis blanka makulo. Poste ili traserĉis lian saketon, pendantan sur lia burnuso.

Jen letero en koverto, adresita al Goghur. Antaŭ ol la aŭtisto povintus konjekti, kio estas skribita en la letero, ankaŭ la grafo kaj la knabino legis ĝin:

Sokoloff!

Atentu! Ankaŭ la mano de Goddins estas en la afero. La virino estas tre danĝera. Veršajne ŝi volas akiri la aktujon por L. Aliĝu al ili kiel gvidanto. Antaŭ ol ili atingus la oazon Ideles, ni atakos ilin. Informu min ĉe Golea, se okazus ŝanĝo. Mi estos tie kun H. Biskra.

- Sokoloff… - balbutaĉis la grafo mirante.

La knabino rapide ŝovis sian manon en la saketon, kaj nun ĉiu ŝia dubo foriĝis. Ŝi eltiris foton de kapitano de spahioj. Goghur estis la kapitano. Li havis blankajn dentojn, kabronigran hararon, sed lia vizaĝo ne similis al tiu de la ĉemizpantalonulo.

La batita homo komencis moviĝi. Ĉefkuracisto Jeremio metis amoniakon sub lian nazon.

- Eblas, ke li estas rabisto – diris la kuracisto-, sed se ĝi estas tiel, kiel mi vidas, kaj rompiĝis liaj du ripoj, tiam mi devas operacii lin.

Polchon kriegis kolere:

- Tiulo mortaĉu!

- La operacio ne eksludas tion – murmuretis Oblath.

- Ŝnurligu lin – diris la aŭtisto -, matene ni pridemandos lin. Starigu gardiston apud lin, Durien, kaj kontrolu lin en ĉiu horo.

La grafo iris al sia veturilo. Anna kaj sinjoro Guliver sekvis lin.

- Vi certe koncedas – diris la grafo al la ĉemizpantalonulo mallaŭte -, ke vi ŝuldas al mi klarigi la aferon. Se tiu homo ne estas Sokoloff, kio ŝajnas esti senduba, tiam vi ne povas esti identa kun li…

- Mi ne estas Sokoloff.

La grafo ĝemis.

- Mi ĉiam havas problemon pri la nomoj. Kial vi diris, ke vi estas Sokoloff, la rabisto?

- Mi volis veki fidon. Ĝi estas tiel. Se mi estus dirinta, ke mi ne estas Sokoloff, vi ne fidus min. La blankaj dentoj, la nigra hararo, la ruĝa aŭto hazarde koincidis. Mi povis atingi vian fidon nur tiel, se mi konfesas, ke mi estas Sokoloff, la rabisto, kaj vi povas subaĉeti min. Ĉar ĝi okazis, vi konfidis la kompanion al mi, ĉar subaĉetita rabisto valoras pli multe, ol nekonata homo, kiu asertas, ke li estas honesta.

- Ĉu… vi… ne estas rabisto?

- Kial? Ĉu nur la rabisto Sokoloff estas en la mondo? Mi ne ŝatus perdi la fidon de sinjoro grafo: kredu min, mi ne estas tia rabisto, kiel Sokoloff.

- Kaj… - diris la grafo sidante en la fiakron, ĉar li vertiĝis. – Kiu… estas tiu, kiun la letero mencias… Anna Goddins?

- Mi estas tiu – flustris la virino.

Fariĝis granda silento.

Anna Goddins, Morgenstern, Elsworth, Lorien, Mildstone, sidis sur kamelon, kriis ion, kaj la besto ekstaris, poste ŝi forgalopis en la noktan dezerton.

- Ni iru! Ni iru! – spiregis la grafo.

- Hot… Diendl!… So a bledez Ding!…

La fiakro fortrotis, kaj la ĉemizpantalonulo longe rigardis post la tremantajn, ŝanceliĝantajn lampojn, kiel la veturilo sku-ruliĝis al la oazo, en la malproksima Saharo…

DEKKVINA ĈAPITRO

1

En la oazo estis nur unu firma konstruaĵo, el krudaj argilbrikoj: la gastejo. Kiam la fiakro ruliĝis antaŭ ĝin, la proprietulo ĵus turnadis rostatan ŝafon surper fajro, sed li gapmiris tiel, ke li rekonsciiĝis denove nur eksentinte la brulodoron de la viando.

Dume la grafo descendis el la veturilo, instinkte li rigardis la taksametron kaj pagis. Duobla klako: sinjoro Strudl fiksis la flagon, pezmove li paŝis sur la aksingon, de tie sur la teron kaj sekvis la grafon. Kompreneble li kunportis la vipon.

La palmoj de la oazo ne donis friskan ombron, la varmo nur stagnis inter la arboj, kaj la elvaporiĝo de la plantoj faris la sufokan varmegon eĉ pli grasa. Fonteto kuregis plaŭdante en la mallarĝa, roka fluejo, arabaj virinoj kun vualita vizaĝo bat-lavis vestaĵojn, kaj ili ĉiuj parolis samtempe, per rapide turniĝanta lango. Kelkaj infanoj torturis senkulpan, longan serpenton per stangetoj. Kiam la besto volis fuĝi, ili ŝovis la bastoneton sub ties ventron kaj altenĵetis ĝin. Faltvizaĝa, flavkrania, blinda indiĝeno kaŭris sub iu palmo, zumkantis per monotona, elgorĝa sono kaj faris kuŝmaton el foliofibroj per nekredebla rapideco. Grandega simio sidis super li, sur iu dika, elstaranta branĉo de iu palmo, ĝi manĝis ian blankan frukton, sed ne glutinte tion, ĝi maĉis kaj tuj faligis tion el sia buŝo, kio falis sur la flavan kranion de la blindulo. Sed li ne okupiĝis pri tiaj bagateloj, li nur zumkantis kaj plektis la fibrojn.

La grafo rigardis la senvarian bildon. Du duaroj estis starigitaj inter la palmoj. Antaŭ iu estis granda, ligna pistilo. Eĉ hodiaŭ oni muelas la grajnojn en ĝi, kial antaŭ jarmiloj. Kapro ĉirkaŭflaradas la pistilon. Apud la tendo troviĝas kelkaj traboj kaj freŝa cementplato. Ĉi tie jam oni konstruas ion. Ĉe la cementkirlejo kuŝas sola kamelo ligite. Ĝi estas harperdinta, maljuna besto, kelkfoje ĝi elŝovas sian langon, pigre, profunde palpebrumas, tirante la malgajajn, konfuzajn palpebrojn sur siajn okulojn, kaj suspirante, ĝi forblovas iom da polvo de antaŭ si. Sur la muro de la argilbrika konstruaĵo pendas rusta tabulo el lado:

HAWEA BNEU ESTAS LA PLEJ BONA!
MONDFAMA MARKO!

La grafo ĝemas, li enpaŝas en la restoracion kun zumantaj tempioj kaj eksentas la odoron de la ŝafo, rostata sur pikstango super la fajro. Pro tio preskaŭ plospasmo kaptas lin. Li apenaŭ sentas la doloron de sia ŝultrovundo. Plie li havas Afriko-malsanon. Febro, naŭzo, angoro, liaj okuloj lancinis, kvazaŭ iu estus pikinta pinglon en tiujn.

La gastejestro rapidas antaŭ lin, li kliniĝadas, anticipe li pidedbatas la rostostangon flanken, por ke la ŝafo forflugu de super la fajro. En la malntaŭ parto de la domo troviĝas ĉambro. Ĝi estas mucida niĉo kun malgranda fenestro, kelkaj matoj kuŝas sur la planko, en la angulo staras benko, tiel nomata tabul-lito, sur kiuj la malliberuloj pasigas la noktojn de la prizon-puno, sur ĝi estas malpura kovrilo kaj kuseno, remburita per segpolvo. La restoraciestro montras ĝin tiel, kvazaŭ li malkaŝus sekretan plezurejon antaŭ la gasto. Li ridetas kaj interfrotas siajn manojn.

La grafo kuŝiĝas. Li jam estas duone senkonscia. Li petas la koĉeron kuirigi teon. Li metas la ruĝan aktujon sub sian kapon, kvankam sinjoro Strudl estas la sola homo en lia ĉirkaŭaĵo de longa tempo, al kiu li konfidus sian ĉiun havaĵon senhezite. Sed kiu scias, ĉu li vere nomiĝas Strudl, ĉu eble li estis gangstero en Meksikio, kiu nun havas la nomon Tanksen, kaj evidentiĝos iun tagon, ke li serĉas siajn gepatrojn, kiun oni forrabis el la ambasadejo de Maroko…

Ho, Dio mia… ŝia ĉiu vorto ja estis mensogo, kio do doloras nun tiom? Ej… Konkera Yolland! Tiu knabino ja estis la malamiko… Ŝi estis tio!… Li devintus alfronti ŝin kun tuta kompanio. Malliberigi ŝin katenitan en fortikaĵkarceron, kie ŝi ne povas pudri sin, cigaredi kaj mensogi… Fortrenu ŝin… Ho… Kiel obstina ŝi estas… Egalas… la armeo staras antaŭ la oazo, lia kompanio… liaj fidelaj homoj, kiuj sekvis lin tra akvo kaj fajro… li iros plu kun ili kaj… kaj… nenio…

- Nu trinku ĝin, Herr graf, ĝi bone travarmigos vin interne… Sie ham doch tremfebro…

La koĉero trinkigis teon kaj donis kininon al li. Dume li apogis la vipon al la lito.

Trinkinte la teon, li ankoraŭ frostotremis. Sinjoro Strudl sternis la grizan redingoton sur lin. Nun la unuan fojon li demetis sian jakon en societo, dum li estis en Saharo. La grafo eĉ nun frostotremis kun bluaj lipoj.

- Na woatns i bring den ĉevalkovrilo, den Aas wets so auzhaltn so a'…

Jam delonge estis tiel agrabla io por Sir Yolland (eterna sinjoro de Denham), kiel la ĉevalkovrilo, kiun la koĉero sternis sur lin.

- Eble vi malvarmumis pro vento, Herr graf – li rimarkis dume, ĉar li pensis la malarion superstiĉo. Li ankoraŭ neniam en la vivo prenis kininon, kaj kiam li vidis iun frostoremi pro febro, tiam laŭ li la koncernulo anticipe staris en vento, ĉar en Afriko estas pli granda vento, pli da homoj malsaniĝas je „febro”.

- Mi venigos iun, kiu flegos sinjoron grafon. Negran, araban virinon. Mi devas zorgi ankaŭ pri la ĉevalo, dez Rindfi is a favönt…

Li foriris. Baldaŭ envenis virino portanta burnuson. Li metis tukon, tempitan en malvarmeta akvo, sur la frunton de la grafo, ŝi silente ordigis la ĉambron, poste ŝi sidiĝis ĉe la fenestro. La grafo vidis ĉion ĉi nur en duondormo. Ŝi aspektis, kiel ia maskohava fantomo… burnuso kaj du okuloj…

Dirndel, la ĉevalo tamen estas malpli sola, ol li… La koĉero zorgas pri li ne nur pro kompato al la sinjoro… Li ĉerte ŝatas lin… Kiu li estas?… Kratochvill, la remburisto (kiu verkas romanon), enpaŝas kaj salutas soldatece:

- Mi havas la feliĉon… sinjoro grafo… Mi estas ĉi tie kun via havaĵo.

- Kio… - li ne povis paroli pro la frostotremo.

- Sinjoro grafo! La armeo formarŝis…

Sir Yolland side leviĝis, tremanta tutkorpe…

- La armeo…

- Tiu aŭtisto nokte kontraktiĝis kun la soldatoj, ke li dividos inter ili egale la dudek kvin mil pundojn, ricevitan de vi, se ili sekvos lin. Ĝi estas granda monsumo, kaj ili ĉiuj sekvis lin, nur mi restis ĉi tie por zorgi pri vi, kaj sinjoro Guliver ŝatus, se mi finus mian romanon, kies titolo estas: „Ŝoforo ne estu amanta…” La ĉefheroo falas, ĉar li alfrontas socian justecon, tial li fariĝas ebria.

La grafo surdorsiĝis en la lito. Li havis neniu, krom la koĉero, kiu devis zorgi ankaŭ pri sia ĉevalo, kaj Kratochvill, la remburisto, kiu verkis romanon. Sir Yolland, la eterna sinjoro de Denham kuŝas ĉi tie en la oazo, kaj ne estas homo apud li, kiu… ni eldiru, eĉ se estas ridinde… kiu amus lin. La soldatoj interkonsentis, ke ili ricevos la monon ankaŭ tiam, se la gravo ne iros kun ili, kaj se li mortos. Kiam li malsaniĝis, li falis, elĉerpiĝis, kaj ili nur marŝas… La mono estas granda potenco, tio veras… Oni povas fari ĉion… sed… eĥ… tiel malbela fino, en malproksima oazo, meze de la dezerto, en malpura loko, forlasite, mizere, havante nek armeon, nek amikon, nenion, nur varmon kaj kapdoloron…

- Se vi deziras ion sinjoro grafo…

- Iru! – kriis Sir Yolland raŭke, febre spiregante. – Tiuj foriru…

Kaj li refalis. Kratochvill eliris kaj ekkuŝis dormi en iu malproksima ejo.

Granda, zumanta muŝo flugadis muzikante. La araba virino sidis kun kapo, klinita inter siajn manplatojn, certe ŝi dormis. Kaj la grafo sentis sin fortege batita, mizera. Tio doloris lin… treege… Eble li tolerus kion ajn, se tiu knabino… Kvankam ŝi estis la malamiko… Sed kiam konkeranto enamiĝas al la malamiko, tiam…

- Anna… - li flustris mallaŭte al si mem - … Anna…

- Jen mi estas, Sir – respondis la araba knabino silente, demetinte la burnuson de sur sia kapo.

2

- Mi timis, ke vi forsendos min, kaj mi volis resti en via proksimo, Sir. Tial mi kovris mian vizaĝon, kiel mohametanino. Sed se vi diras mian nomon, eble vi tamen bezonas, ke mi estu ĉi tie.

Dume ŝi genuiĝis apud lian kuŝejon kaj prenis la manon de la grafo. La homo de enkaviĝinta vizaĝo ekridetis, ekpremis la molan, virinan maneton, kaj ĉesis lia tremo. Li fermis siajn okulojn ĝemante. Poste li ankoraŭ sentis, ke la knabino karesas lian manon, kaj li ŝatintus diri al ŝi ian tre varman, ian banalan, tute nekutiman fare de li, sed li ekdormis…

Li vekiĝis en mallumo. Lumo de malproksimaj steloj videbliĝis tra la fenestro.

- Mi ne ŝaltos la lampon, ĉar la moskitoreto estas trua – flustris la knabino apud li. – Kiel vi fartas?

- Bone… tute bone… mi pensas, ke mi jam ne havas febron.

- Tamen prenu kininon.

Li obeis, kial infano. Poste li prenis la manon de la knabino.

- Mi dankas… ke vi restis kun mi.

- Ĝi estas komprenebla. Ĉu vi pensis, ke mi lasos vin sola en tia situacio? Rekuŝiĝu, vi ankoraŭ ne saniĝis.

- Mi estas forta. Post tri tagon, mi pensas, ĝi tute malaperos.

- Jes. Mi scias, ke vi estas forta. Sed vi misuzis tion. Porti ĉiam fermitan uniformon, en la terura varmego, kaj iri plu kun vundita ŝultro, forsekreti, ke vi havas febron. Vi vere estas malbona, obstina bubo, se vi volas scii mian opinion.

Mirinde tiu popola voĉtono nun denove agrablis al li. Li rekuŝiĝis kaj ekdormis.

Li vekiĝis aŭrore. La knabino ankoraŭ sidis apud lia lito kaj prenis lian manon.

- Atentu min… Anna… Mi diktus ion al vi… Mi opinias, ke mi resaniĝos post nelonge, se tamen… mi pensas…

- Stultaĵo…

- Ne, tio tre pezis min. Temas pri aliaj homoj, pri mia iama amiko, kun kiu mi ne havas bonan kontakton, kaj mi ne povas kunporti ĝin… en la tombon… Bonvolu do skribi, mi petas vin. – La knabino elprenis paperon kaj plumon. La grafo diktis. – Mi, Sir Oliver Yollan, la eterna sinjoro de Denham, heredigas al Johannes Livingstone miajn areaĵojn, situantajn ĉirkaŭ la petrol-fontoj de Kilagez, kies ekspluatojn oni malhelpis ĝis nun. Diru al Johannes Livingstone: mi koleris lin ĝis mia lasta minuto, ĉar mi ne konsideris li ĝentelmano. Li kaj lia fianĉino devintus anonci sin en Denham, kaj viziti la familion Yolland, el kiuj Sir Archibald kaj lia edzino, krome Sir Charles, Reĝa Servicisto tiutempa ankoraŭ vivis. Mi neniam povis pardoni al li tiun grandan ofendon. Sed mi ne koleris lin pro tio, ĉar li edziĝis al la filino de Dilling. Livingstone ja estas dek jarojn pli aĝa ol mi, tiel li povas estis konvena vivkunulo de virino, kiu estas samaĝa kiel mi. En mia testamento mi memoris pri Livingsone, kiun mi ne povis malami spite al lia nepardonebla peko. Mi aparte testamentas pri la koncerna areaĵo, por ke miaj heredantoj ne kaŭzu malfacilaĵojn…

La knabino notis ĉion. Poste la grafo subskribis ĝin kaj malpeziĝinte ĝemis.

- Dankon. Ĝi pezis min, kiam mi pensis, ke mi mortos. Ĉar mi volis ĉikani Johannes-on, sed mi ne deziris bankroti lin… Kvankam milfoje mi povintus fari tion. Stranga knabo estas tiu Johannes… Anna… Li estas vera, angla sinjoro, kaj se vi parolus kun li, vi ne kredus… Mi tamen ŝatas lin… Sed doloris min…

- Ĉu tiu sinjoro edziĝis al via amatino?

- Eh, ĝi ne gravas. Tiuokaze li ne faris eraron. Sed kiam li petis la manon de la knabino… li forgesis prezenti ŝin en Denham. Tio ne estas pardonebla. Ĝi estas terura. Egalas…

- Dio mia – diris la knabino -, kiel naiva vi estas! Kiel granda infano! Nu! Tial vi koleris vian plej bonan amikon! Mi povas imagi, kiel vi koleras min, mi ja vere piede trotis la etiketon.

La grafo karesis ŝin.

- Vi estas alia. Pli bona ol kiu ajn kaj, kaj…mi ne scias…

La knabino kliniĝis super lin tute proksimen.

- Eldiru. Eldiru, Sir, kion vi volis kaj…

Sed ŝi jam flustris ĝin tiel proksime, ke iliaj lipoj kuntuŝiĝis…

3

Matene li vekiĝis freŝe. Li estis post la unua febroatako, kaj ankaŭ lia vundo saniĝis dum la ripozo. Nur ekstarinte li sentis, ke li ankoraŭ estas malforta, la sango zumante malleviĝis el lia kapo, kaj liaj genuoj ektremis por sekundo.

Anna ne estis en la ĉambro. Certe ŝi dormas. Li sentis ĝojon. Li nomis tiun feliĉon tiel en si mem, kiu efektive estis identa kun la granda malsano, nomata amo.

Li jam tute ne ĉagreniĝis pri sia armeo? Dum la multe da problemoj, suferoj, turmentiĝoj, trompiĝoj tamen restis unu fidela homo. Kiu tramaldormis la unuajn febroatakojn kaj…

Kaj ŝi amas lin…

Almenaŭ ŝi estas suspektebla pri tio. Iu frapetis kaj sinjoro Strudl anonciĝis por ricevi la redingoton. Li ankoraŭ estis en ĉemizo.

- Bonan matenon, Herr graf – li diris kaj tuj surmetis sian jakon. – Ĉu pasis la febro?…

- Dankon, sinjoro Strudl. Mi fartas tute bone.

- Sciu, mi volis proponi tiun… Brandwein. Mia bofratino eĉ nun estas dankema al mi… Ankaŭ ŝi malsaniĝi je lumbago pro la vento, veturante per tramo…

- Ĝi estas neniaĵo, mi jam fartas bone. Ĉu vi ne vidis… la fraŭlinon?

- Ho! Das Madel is so lengst foat! Ŝi forveturis sur kamelo, ankoraŭ aŭrore.

- Ĉu vi estas certa pri tio? – demandis la grafo konsternite.

- Nu, sed kia demando ĝi estas?… ŝi vekis min, ke mi helpu al ŝi ripari la kamelon, ĉar ŝiriĝis la Steigbügli…

Sir Yolland ĉirkaŭrigardis senkonsile. Li ne lasis fariĝi penso tiun doloron, kiu strangolis lian laringon kaj premis lian torakon.

Anna…

Io skrapas lian gorĝon, io ekbatas lin interne ĉirkaŭ lia koro, ke li devas eksidi sur la liton, poste li turnas sin al la kapkuseno kaj levas ĝin kun tremanta mano.

La ruĝa aktujo malaperis…

DEKSESA ĈAPITRO

1

La grafo sidis sur benko antaŭ la gastejo kaj rigardis la polvon. La arabaj virinoj bat-lavis la vestojn, la blinda maljunulo zumkantis senartigite dum plektado, la granda simio kaŭris sur la arbo kaj la kamelo kuŝis apud la cement-plato remaĉante.

Sinjoro Strudl ligis la furaĝ-saketon antaŭ la buŝon de la ĉevalo, poste li surverŝis kelkajn sitelojn da akvo sur la radojn.

Kiu scias, de kie, hieraŭ ili ne vidis tiujn homojn; kvar-kvin kamelistoj alvenis. Ili alligis akvofelsakojn al la selo, pumsonis la lato sur la ripoj de kelkaj obstinaj bestoj, kaj la gastejmastro metis rostitan viandon sur la tablon, ĉe kiu sinjoro Kratochvill pakis sian havaĵon, malgaje, ke li ne povas verki sian romanon.

- Sinjoro – anonciĝis la dungita, nova gvidanto ĉe la grafo. – Post duonhoro ni estos pretaj.

- Tre bone. Ĉu eblas sendi telegramon el oazo Ideles?

- Certe, sinjoro, ĉar ĝi estas grava loko, sed mi ne scias tion precize, ĉar ĝi situas malproksime de tie ĉi.

- Kiel?! Ĉu tiu oazo… estas Ideles?

- Ĉu ĝi? Sinjoro! Ideles situas proksime al Sudano, sur la alia flanko de Saharo. Jen ĝi estas oazo Bimba, norde de Gambio.

Li jam tute ne sentis surprizon. Ankaŭ la lasta, loza trabostativo de la pensado falis en lia sensanga, febrobruligita, laca cerbo. Doloris lin, kion li aŭdis. Doloris en lia kranio la retaksado de la aferoj, kio subite trafulmis lin, li denove eksidis kaj kovris siajn okulojn.

Kiel ili venis ĉi tien, kaj la ĉemizpantalonulo kien gvidos la cent sensuspektajn homojn?

- Ĉu eblas telegrafi de tie ĉi? – li demandis per raŭka, fajfanta voĉo.

- Ne, sinjoro. Sed morgaŭ ni povos atingi Validoa-on, tie estas poŝto.

- Tiam ni tuj… ekveturu.

Eĉ tiel malsane, elĉerpiĝinte, anime rompite li volis fari ion por la cent homoj, kiujn gvidis ĉemizpantalona diablo ien en la dezerto, neniu scias, kien.

La malgranda karavano iris rapide. Dirndel fine nun eksciis, ke la ekstremaĵo de la vipo povas ne nur tikli, sed ankaŭ bati.

Noktomeze ili atingis Validoa-on, kaj la grafo sendis centvortan telegramon al la adreso de la militafera ŝtatsekretario. En la intereso de la homoj… Kiuj nun marŝas ien…

Poste li fale sidiĝis sur benkon.

La knabino doloris la pleje en li… La knabino, kiu ŝtelis la dokumentojn de la petrolekspluato sur la tero Urungi… Tial ŝi veturis kun li.

Ŝi ne akceptis la aktujon en la tendaro. Ŝi ne fidis lin. Ŝi pensis, ke la donaco de la grafo estas kaptilo.

Ŝi atendis bonan okazon. Kiam li kuŝis malsana, forlasita de ĉiu… Post kiam ŝi kisis lin…

Tiam ŝi priŝtelis lin!

La polvo, ŝvebanta en la aerblovo, ektuŝis lian vizaĝon milde. Kvazaŭ nevidebla, malica, sed neesprimeble kara mano de virino karesus lin…

2

Lordo Harlington jam sidis kelkajn semajnojn en la societo de Forster en El Goa. Grandega rabistbando bivakis en la oazo, gvidate de Biskra. Ĉiu indiĝeno konis la kolosan, nigra-lipharan, migdal-okulan Biskra-on, sed neniu kuraĝis malutili al li.

La ĉefredaktoro kaj la lordo pasigis sian tempon tre malbone en la varmega, malbonodora, malgranda palmo-bosko, plena de insektaĉoj. Precipe la multege da muŝoj turmentis ilin.

- Kion ni atendas efektive? – demandis la ĉefredaktoro.

- Sciigon. Mi sendis iun antaŭen sur la teron Urungi por akiri certajn dokumentojn.

La redaktoro kompreneble sciis nenion pri la senidnulgaj detaloj de la petrol-milito. Li konjektis nur konkurencon inter la adversuloj. Lordo Harlington, kiu estis malo de Sir Yolland en ĉio, preferis la gazetaron, la reklamon, flatis lian vantecon, kiam oni fotografis lin kaj skribis pri li, tial li organizis kunveturi aron da ĵurnalistoj.

- Kio okazos, se vi ricevos la bezonatajn dokumentojn?

- Tiam mi subaĉetos tiun ĉantaĝantan ĉefon, mi prezentos la legitimigajn dokumentojn, kaj antaŭ ol Oliver Yolland alvenos tien, mi jam komencos labori. Ĝi estos bonega materialo por la gazetaro, vi vidos. Pardonon…

Ekvidinte Biskra-on ĉe la fenestro, li elrapidis.

- Nu?

- Sir – diris la rabisto perfekte parolante la anglan lingvon. – Mi opinias, ke estas problemo. Kial ajn malrapide venas grafo Yolland kun sia kompanio, ili jam devintus preterpasi ĉi tie.

- Kio nova pri via fama Sokoloff?

- Mi ne komprenas tion. Certe okazis io malbona al li. Mi devas konfesi sincere, la aferoj progresas ne tiel, kiel ni kalkulis.

Harlington viŝis sian ŝvitkovritan vizaĝon nervoze.

- Kio estos nun?

- Sir – respondis Biskra -, morgaŭ ni scios pli multe. Mi sendis kelkajn skoltojn antaŭ ilin.

La lordo restis sola. Li enspiris malfacile la aeron, pezan de la odoro de la plantoj. Vidalvide la luno prilumis la senmovan Saharon per glacimalvarma lumo…

- Sinjoro… Mi kunportis la planon de la petrol-fonto – ekparolis iu apud li.

Tiu estis virino.

- Pri kia plano vi parolas, kaj kiu vi estas?

- Mi estas Eva Mildstone.

- Ĉu… la reporterino?… kiu skribis artikolon pri la afero de Arienne Grovescu… antaŭ nelonge?…

- Jes. – Ŝi daŭrigis rapide, ekscitite: - Sokoloff estas kaptita. Oliver Yolland kaj lia kompanio vojeraris. Li kuŝas malsana en la oazo Bimba. Ankaŭ mi eksciis nur nun, ke ni estis ne en Ideles. De tiam mi estas survoje. Tiu aktujo apartenas al Sir Yolland. Ĉiu dokumento estas en ĝi.

- Kion vi deziras… Por ĝi…

- Eĉ unu groŝon ne. Mi faris tion pro venĝo! Jen prenu!

Ŝi transdonis la aktujon.

Harlington eltiris la dokumentojn ekscitite kaj deprenis la kovropaĝon kun tremantaj manoj. Poste li ekkriis.

Jen tio estis skribita sur ĝi:

ŜOFORO NE EDZIĜU!
VERKITA DE G. B. KRATOCHVILL

- Kio ĝi estas? Ĉu vi povas klarigi tion, fraŭlino Mildstone?

Sed la knabino kondutis tre strange. Ŝi komencis ridi, sed tiel, ke ŝi devis eksidi.

Venis la kelnero.

- Hieraŭ la aerpoŝto portis leteron al lordo Harlington, kun tiu instrukcio, ke ni transdonu ĝin nur tiam, kiam alvenos vizitantino al vi. La instrukcion transprenis la paciga juĝisto de la oazo, kaj nun li donis al mi… la sendaĵon. Jen prenu!

Kaj li transdonis al la lordo la planon de la petrolesploro kun la preciza mapo kaj legitimigaj dokumentoj.

Nur mallonga letero estis aldonita:

Kara lordo Harlington!

Mi koncedas, ke vi havas prioritaton en Afriko. Mi komisiis nian komunan konatulinon transdoni la dokumentojn al Vi, sed ŝi kunportis belliteraturan verkon pro eraro. Mi ne ŝatus, se la koncernulo havus domaĝon pro tio, tial mi urĝe sendas la originalajn dokumentojn.

Estimanto Via: grafo Oliver Yolland
eterna sinjoro de Denham.

Ŝi estas stranga virino. Nun ŝi ploras…

3

Ili maŝine tretis la polvon de la varmega, dezerta sablo-oceano. La malhelruĝaj rebriloj de la vesperiĝanta ĉielo kovris la trolaciĝintan marŝkolonon per ombroj de ŝvebantaj polvofuneloj.

Ili nur trenis sin pene. Kien? Kiudirekten? Neniu sciis el ili. Houben, la pistonisto ruliĝadis sur la ĉaro malsana. Jordan anstataŭigis lin laŭ la ordono de la ĉemizpantalonulo, kaj la soldatoj marŝis akompanate de akordiono. Houben neniam plu trumpetis. Li havis pulman hemoragion, kaj kiam li jam marŝis tie inter la aliaj pene sin trenate, nek tiam li povis blovi la trumpeton, li nur direktis Jordan-on.

- Ludu Adia-n… - li diris malgaje, kiam oni komandis ekmarŝon – dufoje ripetu ĝin…

Ili ĉiuj timis la ĉemizpantalonulon. Toutain rakontis al ili, ke li estas la diablo mem. Subkaporalo Izabela konstante portis du fusilojn, ĉar Duke of Roswang tute deprimiĝis. Ili perdis kvin ŝarĝportantajn mulojn, kaj la belege vestaĵo jam estis ĉifita, malpura, Felikso, la bela frizisto de la virinoj similis al malsana almozulo. Tamen ili marŝis. Kien? Ĝis kie? Kial? Sed diablo scias, kiu iras avane, li neniam laciĝas, li neniam parolas superflue, kaj ili povas fari nenion kontraŭ li, ĉar nur li konas la dezerton.

Leŭtenanto Renoir sidis sur la ĉaro langvore. Ŝi estis malsana. Aŭ malforta, tre malforta. La uniformo de la marŝalo ĉifoniĝis, sed cetere li sidis freŝe en la selo.

Ilia ombro jam rimarkeble mallongiĝis tagmeze, kiel ili proksimiĝis al la Ekvatoro. Ĝi estis nur deformiĝinta, nigra makulo ĉe iliaj piedoj. Dio mia, kio okazos? Tre malproksime videbliĝas malhela strio inter la ĉielo kaj la dezerto.

La ĝangalo! Saharo finiĝas tie.

La tendaro estas regula, normala, Saharo finis la ekzercadon: ili estis soldatoj.

Fleur de Bac ŝmiris siajn inflamajn okulojn per oleo.

Duke of Roswang kuŝas senmove kun kunpremitaj dentoj. La ĉemizpantalonulo ordonas, ke oni metu lin sur la ĉaron, vindu lin en kovrilon, kiam li komencos ŝviti, li fartos pli bone. Subkaporalo Izabela malesperiĝinte frapetadas la malvarman manon de sia filo, poste ŝi salte leviĝas.

- Diablo! – ŝi krias al la ĉemizpantalonulo. – Kien vi gvidas la homojn!? Tuj diru tion!

Ŝi tenas sian manon sur la bajoneto. Oni ĉirkaŭas la ĉemizpantalonulon minace.

- Kion vi volas de ni! – kriadis Wolfram – ni ĉiuj mortos!

Pugnoj leviĝas minace en la aeron.

- Dum mi estas ĉi tie – diras la ĉemizpantalonulo trankvile -, vi ne mortos, ĉar estas iu, kiu gvidas la kompanion.

La pugnoj malleviĝis. Ili scias bone, ke ili estas en la mano de la diablo. Nun jam nur li sicas, kie ili marŝas.

Kondutu obeeme kaj disciplinite. Tiam estos nenia problemo. Rimarku tion bone.

Post nelonge, kvazaŭ li decidintus alie, paŝis al Jordan.

- Blovsignalu viciĝon!

Houben diras inerte:

- Maĵoro A…

Eksonis la muzikilo por viciĝo. Kiom ŝanĝiĝis ankaŭ tiu ritmo! Anstataŭ akresona pistono malgaja akordiono ploris Aida-n.

Kiam ili viciĝis, la ĉemizpantalonulo staris antaŭ ilin.

- Homoj! – li komencis. – Ni sternu niajn kartojn. Mi intencis erarigi vin eĉ plu, sed mi ne havas forton al tio. La celo ja absolvas min el sub la konsekvenco de mia faro. Tamen… Mi ne scias…

La ĉifonaj, trolaciĝintaj soldatoj de la Nevidebla Legio staris kun sinistra sento.

Venas… venas… la realo… Kaj ĝi estos terura… La ŝiroko kuntrenis pigrajn polvofunelojn kaj ŝutis ĝin susurante sur la tendaron…

- Mi trompis vin – komencis la ĉemizpantalonulo. – Vi ne povas mortigi min, ĉar nur mi povas elkonduki la kompanion el Saharo. Tamen… mi ne povas absolvi min, tial mi diras sincere: mi gvidas vin en tian batalon, kie vi ricevos nenian premion.

- Kiu vi estas?! – paŝis Toutain tre rezolute antaŭ lin.

- Kapitano Durien!

Ili staris konsternite. Felikso fariĝis mortepala.

- Kaj… - demandis Izabela – kien ni marŝas?

- Ni konkeros gravan terenon por Francio. Okazos batalo, por kio vi ne ricevos monon, ĝi estas devo. Mi povintus gvidi vin tien, ke vi devu batali tie. Sed mi ne estis kapabla fari tion. Kiu ne volas lukti, tiu povas ĝisatendi la finon de la batalo en sekura loko.

- Ĉu… vi… trompis nin? – balbutaĉis Fleur de Bac.

- Jes. Okazis tio. Mi eltiradis la palisojn antaŭ vi, poste mi gvidis la kompanion sur falsa vojo al la alia parto de Afriko, kredigante, kvazaŭ ni estus sur la tero Urungi, vi okupos la teron de Kinibalu, kie franca soldato ne rajtas batali. Mi estis malforta al tio. Kiu ne volas batali senpage, pro devo al la patrujo, tiu povas elviciĝi.

- Se la afero statas tiel, mi deklaras, ke rabiiĝu tiu, kiu bedaŭras iom da batalo por Francio – diris la bier-veselkapitano.

- Ankaŭ mi samopinias – aliĝis Wolfram.

Kaj neniu elviciĝis. Ili sekvis la ĉemizpantalonulon.

Kion alian ili povintus fari?…

DEKSEPA ĈAPITRO

1

Polchon vundiĝis pro lanco, kaj ŝtono elbatis du dentojn de la bier-veselkapitano.

Cetere neniu difektiĝis, kaj oni kuiras la vespermanĝon.

- Houben! – diris la ĉemizpantalonulo. – Muziku alviciĝon!

La homoj rapide staris unu apud la alia.

- Ni adiaŭ. Kion vi faris, ne esperu dankon de la nacio por tio. Vi estas bravaj soldatoj. Tiel vi venis ĉi tien, ke vi serĉis la petrolon de Oliver Yolland. Tion vi diru ĉie! Se vi mensogos tion, ke franca oficiro gvidis vin, vi estos malliberigitaj. Ĝis revido, knaboj. Post du tagoj alvenos la militistaro ĉi tien, kaj ili zorgos pri tio, ke vi revenu hejmen en ordo.

Li premis la manon de ĉiu.

Li haltis antaŭ Polchon por momento:

- De kie vi sciis, ke mi estas kapitano Durien?

Ili nun komprenis la scenon, okazintan antaŭ nelonge, kiam la ruĝbarba maristo flustris vorton en la orelon de la ĉemizpantalonulo por pruvi sian senkulpecon. Li sciis, ke sinjoro Guliver estas franca kapitano.

- Li nur konjektis tion – interrompis la marŝalo. – Mi estis tiu, kiu sciis certon.

- Vi donis al mi cigaredon – diris Polchon. – Kaj venis en mian kapon la troa laŭdado pri la funelformaj, albanaj cigaredoj de kapitano Durien. Ankaŭ la via estis funelforma. Mi portis ĝin al marŝalo Podvinecz, kaj ankaŭ li konfirmis mian suspekton.

Poste ili ekspilis barelon.

La ĉemizpantalonulo serĉis Renoir-on, kiu jam konvaleksis.

- Maria – li diris al la „oficiro” -, vi faris stultaĵon, ke vi venis ĉi tien. Tamen mi pensas, ke ekde nun ni pli bone amos unu la alian…

- Ĉu vi… pardonos… min?

Li brakumis ŝin.

- Mi tute ne koleris. Mi nur sentis tiel, ke mi ne povas esti feliĉa kun virino, kiu ne trasentas, kion signifas ladevo ĉe la soldatoj. Sed mi pensas, ke nun jam vi vidis kaj spertis… nun jam vi komprenas tion.

- Ho… mi tre bone komprenas tion. – Kaj alpremiĝinte al sia fianĉo, ŝi ripetis: - Tre bone…

- Nun ni iru!

Ili ekiris silente. La rumoro de la festantaj soldatoj aŭdiĝis malantaŭ ili.

Ili ne iris malproksimen. Ĉe la renkontejo de la arbara vojo kaj dezerto, tri motora aviadilo surteriĝis, kaj ili sidis en ĝin.

La aeroplano ekfugis al norodo.

- Ho, Jules – ploris la knabino -, mi estis tiel stulta. Ĉu vi povas pardoni min?

- Ni aranĝos ĉion laŭ la etiketo de la kavaliroj, sinjoro ĉefleŭtenanto.

Ili brakumis unu la alian feliĉe, kaj la aviadilo jam flugis tiel alte, ke Saharo ne estis videbla sube…

2

Sir Yolland finis sian vojaĝon lace, anime rompita. Kiam Kratochvill raportis ekscitite, ke li trovis enigman skribaĵon en sia dosiero anstataŭ sia romano, la grafo estis klarvida pri tio, kio okazis.

La ĉemizpantalonulo foje estis en lia tendo kun sia dosiero, kaj dum li dormis, li interŝanĝis la romanon kun la dokumentoj. Iu korvo pikas la okulojn de la alia.

Amara sento kunpremis lian gorĝon. La multnoma virino certe havis malagrablaĵon pro tio.

Kaj bonan nokton al tiu treege malgaja historio…

3

Alveninte en Marokon, li diris al la personaro, ke li akceptos neniun. Li volis ripozi ankoraŭ nur unu tagon en Afriko.

Sufiĉe, sufiĉe. Li vojaĝos al la maro. Por unu jaro… Jes… Li pasigos unu jaron sur ŝipo, kaj li vidos nenion, neniun, nur la maron.

- Sinjoro Wilkie – raportis la ĉambristo.

- Diru al sinjoro Wilkie, ke du mil pundoj estas ĉe mia sekratario por kvitigi liajn elpagojn, sed neniokaze mi povas akcepti lin. Neniokaze.

- Sinjoro Wilkie havas tiajn informojn…

- Bedaŭrinde, kiel mi diris tion.

Andreo eliris.

La grafo sidis ĉe la fenestro. La ĉambristo revenis.

- Sinjoro Wilkie deklaris, se vi ne akceptos lin, Sir, tiam li montpafos sin antaŭ la pordo.

- Nu… Se neniel povas temi pri enirejo de alia apartamento… sed nur tiuokaze… mi volonte akceptos sinjoron Wilkie.

Kaj li venis. La malalta homo maldike, brune, sed rikanante.

- Bonvolu sidiĝi, sinjoro Wilkie. Mi ne volis ofendi vin, sed la vojaĝo tre lacigis min. Mi volis esti sola.

- Sir, ĉar mi eksciis de la lakeo, ke vi ne legas ĵurnalojn, mi devis perforte penetri al vi, pro kio mi estas tre malgaja.

- Bedaŭrinde mi povas konsoli vin per nenio.

- Sed mi devas raporti ion al vi. Ĉu vi scias, Sir, ke la tuta mondo ridas pri Harlington?

- Hm… Ĉu vere? – li demandis acerb-miene.

- Sensacion promesante, li venigis la gazetaron en Urungi-on, li pagis multegan monon al la magiisto-tribestro, kaj evidentiĝis… pardonon… hahaha…

- Sed sinjoro Wilkie!…

- Mi ne povas reteni mian ridon! Tia trompo ankoraŭ ne okazis! La tribestro de Urungi koluziis kun nia inĝeniero, sub la bora turo estis cisterno, kiun demalproksime pumpilo… hahaha… mil parodonojn… Do, la ŝprucanta petrolo fontis ne el la tero… sed per pumpilo… hahaha… oni pumpis… hahaha… antaŭ la reporteroj… iu fakulo… konstatis, ke hahaha…

- Sed mi petas vin…

- Sir! Rafinita oleo ŝprucis el la tero!

Nun ankaŭ la grafo konsterniĝis. Poste lia vizaĝo komencis ruĝiĝi. Dio mia… Se la knabino ne ŝtelintus la aktujon, tiam la mondo nun ridus pri li… Li irintus tien… Li ne sciis, kial batas lia koro tiel forte.

„…Ho! Freneza grafo Yolland. Ĉu vi kredas tion, ke la knabino volis ne ŝteli, sed savi vin?… Vi maljuniĝas…” Li diris tion al si mem.

- …Cisterno estis sub la bora turo… oni preparis la trompon antaŭ monatoj… Ankaŭ la inĝeniero… hahaha… estis ilia homo…

- Ĉu… mia inĝeniero?…

- Male… tute ne! La inĝeniero kaj la negra, Urunga tribestro apartenis al trompista societo. Ili investis kvin mil pundojn por prepari tion… haha… sed ĝi valoris… Ili ricevis kvindek mil pundojn. Ĝi estis… hihi… en ĉiu ĵurnalo de la mondo… La negro jam estas trans montoj kaj valoj… kun la kvindek mil pundoj kaj kun la inĝeniero… Kaj Harlington staris tie en magnezia lumo, inter la venigitaj eminentuloj de la gazetaro, kaj rafinita ole ŝprucis el la tero. Kaj ve… hihi… kaj la ĵurnalo Sunday Evening Post publikis ĉefartikolon… kun la titolo: Natura benzinstacio en Afriko. Ne estas novaĵo sub la suno, sed sub la tero jes!… Lordo Harlington akaparis tion antaŭ vi.

- Mi ne komprenas… - balbutis la grafo.

- Sir, genia malamiko staras malantaŭ la afero.

- Livingstone!

- Jes. Livingstone oferis sian ĉiun havaĵon por ridindigi vin, Sir. Sed Harlington falis en la kaptilon. Kaj tiu sensaciemulo venigis tien ne nur Forster-on, sed ankaŭ la plej kritikeman reporterinon, fraŭlinon Mildstone.

- Kiel?… Kiun?

- Fraŭlinon Mildston. Kiu famiĝis pro la afero de Adrienne Grovescu. Ŝi interjuvis la danĝeran, fuĝantan spioninon sur ŝipo.

- Kaj… kiel ŝi nomiĝas?

- Mildstone… Sed ne tio estas ŝia vera nomo.

- Ĉu tiu virino havas veran nomon? – demandis la grafo malgaje.

- Jes. Ŝi estas la filino de tiu sinjoro, kiun vi tiel longe ne bonvolas koni, Sir, ŝia nomo estas Anna Livingstone…

4

Lia filino! Ŝi estas la filino de Livingstone! Sed ŝi ja sciis pri la plano de sia patro… Kaj ŝi ŝtelis la aktujon, ke lin…

„Interese – pensis Wilkie -, kiel brilas liaj okuloj, kaj kiel ruĝa li estas. Ĉu eble li drinkis?”

Li ne drinkis. Sed ia stranga, narkota sento ekregis lin. Do, la knabino… savis lin per tio, ke la aktujon…

- Tiu virino – daŭrigis sinjoro Wiliie – trompis ankaŭ nin. Mi eksciis, ke Forster kaj ŝi konsentis, ke li pagos cent pundojn al ŝi por ĉiu artikolo. Ŝi havis la taskon trudiĝi en vian proksimon, Sir, kaj skribi surlokan artikolserion pri la petrobatalo. Kaj nun… ne koleru, Sir, ke mi perforte penetris al vi.

La grafo deklaris tiaĵon, kion ankoraŭ neniu aŭdis de Sir Yolland.

- Sinjoro Wilkie! – li diris. – Ekde nun vi povas enveni al mi kiam ajn sen antaŭa anonco.

FINIĜO

1

La grafo mire spertis, ke li fajfadas antaŭ la spegulo, ligante sian kravaton. Ĉar la ŝtatsekretario atendis lin vespere, de kiu li esperis informojn pri sia malaperinta armeo. Poste li forvojaĝos. Ĝi estis lia lasta tago en la hotelo Mannunia.

Paŝinte sur la koridoron de la hotelo, li renkontis subkolonelon.

Li estis la aŭtisto!

Li ekhaltis antaŭ li. Ankaŭ la subkolonelo haltis, ĝentile kaj mirante.

- Sinjoro Guliver…

- Ĉu vi deziras ion? Mia nomo estas Durien.

La grafo fermis siajn okuloj kaj mane viŝis sian frunton.

- Ĉu vi deziras ion? – interesiĝis la subkolonelo afable.

- Ĉu vi… volas diri tion… ke vi ne konas min?

- Mi ne memoras, ke ni renkontiĝis iam. Ĉu eble en Nico? Ĉar mi alvenis hejmen hieraŭ vespere post mia ferio. Mi ripozis ĉe la riviero.

La grafo rigardadis la pinton de siaj ŝuoj kaj kapbalancis.

- Vere… pardonu min, sinjoro subkolonelo. Mi vidas nun, ke mi eraris. Tiu homo, kiun mi memoras, estas multe pli alta, ol vi… Mi bedaŭras…

- Faras nenion, mi tre ĝojis – diris la subkolonelo ĝentile kaj varme ekpremis la manon de la grafo, etenditan al li. Multe pli varme, ol tion motivis la parolado.

Sur la brusto de la subkolonelo pendis tute nova, militista honormedalo…

2

La grafo eksciis la veron nur de la ŝtatsekretario, kiam ili restis duope en la salono: li aŭdis, ke lia armeo venkis Kinibalu-on.

- Ili estas bravaj knaboj – diris la ŝtatsekretari – ili jam estas survoje tute sanaj. Ili ricevos iom da premio de la ŝtato.

- Kompreneble mi pagos tiun sumon, kion mi promesis, kvazaŭ mi estus atinginta mian celon. Mi do zorgos pri ili.

- Vi estas tre grandanima.

- Krome jen estaas kapitano, kiu feriis en Nico tiel heroe, ke li fariĝis subkolonelo kaj ricevis honormedalon…

La ŝtatsekretario rigardis siajn ungojn enpesiĝinte.

- Li estas eminenta homo.

- Tio certas.

- La hotelpordisto rakontis, ke marŝalo Podvinecz kaj lia amiko planas misagon en la nomo de la kapitano. Sed Durien ne ĝenis ilin en la trompo. Li estis ferianta, li do povis laŭplaĉe direkti la aferon en la fono, kiel civilulo kaj sub pseŭdonomo. Iom post iom li sukcesis regi viajn homojn kaj gvidi ilin sur la teron de Kinibalu anstataŭ Sudano. Anticipe li diris al mi, kion li volas. Se okazos ia problemo, tiam petrol-esplorista sinjoro estas la kulpa, sed se evidentiĝos, ke Kinibalu ne havas armilojn, tiam ni okupos la landon. Ĝi okazis tiel. Vi, Sir, estas iu el la kvin homoj, kiuj scias pri la fono de la afero.

Malsuprenirinte al la pordo, li sidis en fiakron.

- Ni veturos al Anglio, sinjoro Strudl!

- Tion la ĉevalo jam ne eltenos. Dez ist doch ka dromedar… Hot…

- Ne timu! Ni ne plu uzos la fiakron por longa turniro.

- Hee! Hoot… Diendl… Du Ass!

Kaj ili ekveturis sku-ruliĝante.

3

Alvenis la aŭtuno en Denham-on. La maljuna Sir Archibald ankoraŭ vivis, sed li jam apenaŭ povis iri. Sir Yollan rigardadis la poŝton. Li forĵetis la gratulajn leterojn nelegite. La ĵurnaloj publikis, ke li aranĝis la konton de Francio kun la rabista tribestro Kinibalu.

Tio ne interesis lin.

Leteroj, kalkulraportoj. Jen la manskribo de Kratochvill. Ili ĉiuj tre dankas la galantan premion de la grafo. Houben kaj Jordan malfermis sian amuzejon. Fleur de Bac kaj Toutain aĉetis ŝipon, kaj nomis ĝin Lukrecia, sed ili decidis ne kartludi en nuba vetero.

- Ĉu tio?.. Kio ĝi estas?

…Johannes Livingstone kaj Anna Livingstone vizitos grafojn Archibald kaj Oliver Yolland la 15-an de la kuranta monato…

La grafo longe sidis en la mano kun la papero, poste li respondis. Ke la grafoj volonte akceptos ilin...

Kaj la 15-an alvenis la gastoj.

Bedaŭrinde la voĉtono de la knabino apenaŭ ŝanĝiĝis, kaj ŝi estis iom stranga kun sia vulgareco inter la antikvaj muroj. Sed la grafo tute ne rimarkis tion. Li rimarkis nenion. Li nur rigardis la knabinon.

- Vi estas terura homo, oldulo mia – diris Livingstone. – Mi konas vin dudek jarojn, sed nek nun mi scias, kiu vi estas?

- Mi des pli bone – diris Anna kaj ŝi radiis pro feliĉo. – Li estas obstina! Obstina infano! Jes, jes, vane vi rigardas, kara sinjoro konkeranto! Mi tudiĝis en vian proksimon por ridindigi vin. Poste mi fariĝis ridinda… Mia patro preparis la hontigan kompromiton en Urungi, kaj mi devintus publikigi ĝin. Mi malamis vin, ĉar mi sentis tiel, ke ĉiu problemo, kiu trafis nin, estas pro vi. Poste… Subite mi ne povis vin malami… Kaj nun jen tio fariĝis el la afero…

- Kio?… - demandis la grafo avide.

La knabino ruĝiĝis.

- Kiam vi rakontis ĉion malsana kaj diktis la leteron… Tiam jam… Do… Mi volis savi vin… Sed mi devis skribi la riporton, ĉar mi jam konsentis kun Forster. Tial mi portis la aktujon al Harlington, kaj estis riporto. Ĝi estis efika! Tiu fia Harlington meritis ĝin. Mi imagas, kion vi pensis tiam pri mi. Sed mi ne povis klarigi al vi la aferon de la tero Urungi, ĉar mi ne volis malkaŝi mian patron. Nek al vi.

- Ĝi estis malbona sento – ĝemis la grafo.

Baldaŭ ili restis solaj. Sir Archibald akompanis la gastojn en sian ĉambron pro ia malnova mineralŝtono, sed Anna kaj la grafo haltis en la malluma salono de blazonoj.

- Nu? – diris la knabino. – Ĉu vi tute saniĝis? Ĉu la febro ne reaperis?

- Jes… kelkfoje mi denove vidas ĉion. Precipe unu vizion… kion mi sonĝis dum mia febro. Kvazaŭ vi estus kisinta min…

Ili silentis.

- Vi ne sonĝis tion – flustris la knabino.

- Ĉu vi memoras ankoraŭ?

Anna pensadis…

- Ne tute. Atendu nur… kiel ĝi okazis? Mi sidis tiel, kaj mi kliniĝis pli proksimen… jes, mi jam scias – ŝi flustris. – Ĝi okazis tiel…

Kaj la sceno ripetiĝis.

La ombroj de la grandegaj naĝeroj estis videblaj tra la subtila kurteno de la vitropordo.

La ombroj de la grandegaj negeroj estis videblaj tra la subtila kurteno de la vitropordo.

- Kiam mi vidis vin la unuan fojon, tiam mi ankoraŭ malamis vin – diris Anna. – Mi pensis vin orgojla, vanta, malica homo. Mi volonte estus mortiginta vin. Poste mi tre hontis, kiam mi vidis, ke vi estas bona, kuraĝa, fidela, grandanima…

- Ĉu mi vere estas tia?

- Jes…

Ili ĵus estus ripetintaj la scenon antaŭ nelonge forgesintan, sed la pordo malfermiĝis, kaj venis la domprizorgisto el la direkto de la vestiblo. Li deskuis la neĝon de sur sia pelerino kaj tramplis kelfoje.

- Guten Abend, Herr graf… So a blödsin voa no nett da… Muzeo volis aĉeti la ĉevalon Diendl… Dez Rindfi…

- Ĉu vi vendis ĝin?

- Dez scho nett. Mi bezonas iun, kiun mi povas riproĉi kaj ami… Por Herr grafo fianĉino, por maljuna fiakristo ĉevalo… Dez Rindfi is gvorn, multe vidinta en la mondo… Mahlzeit.

Kaj li foriris plandŝove…

[<<< REEN AL LA CXEFA PAGXO]